

EL POPOLO

中國新道

CINQUE

12

1985





*Drako sur la tegmento de antikva konstruaĵo*


Foto de JAN ĜONGJI



## Enhavo

### Esperanto:

Revuo al la kreskanta esperantistaro de Ĉinio . . . . .	2
La Scienca Eldona Centro de UEA en Budapeŝto . . . . .	49
[Sur nia librobreto] Libreto utila . . . . .	54
[Por komencantoj] Rakonto pri serpentvino . . . . .	67
Esp-novaĵoj . . . . .	52
Pri junuloj: Junularo, espero de Ĉinio . . . . .	12
Tibeto hieraŭ kaj hodiaŭ (12): La energio de Tibeto . . . . .	56
Malfermitaj urboj: Ŭenĝoŭ, eksterkomerca haveno ĉe la Orienta Ĉina Maro . . . . .	8
Medi-protektado: La media polucio kaj kontraŭmetodo en Pekino . . . . .	16
Politiko: Signifoplena konferenco . . . . .	15
Scienco: Antaŭ kaj post granda terŝoviĝo . . . . .	18
Literaturo: Klara baseno (Novelo) . . . . .	38
Nunaj ĉinoj: Li amas kokobredadon . . . . .	19
Nacimalplimulta regiono: En Singĵang . . . . .	36
Vojaĝo tra Ĉinio:	
Harbin, urbo por somerumado kaj vintra ekskurso . . . . .	31
Vizito al Liĝjang ĉe Julong-montaro . . . . .	28
Enciklopedieto de Ĉinio: Legendo pri drako . . . . .	64
Por via sano: Memmasaĝo kontraŭ kapdoloro . . . . .	43
Memore al ĉina marnavigisto: Pioniro pretiganta silkan kaj porcelanan marvojon . . . . .	26
Amikeco:	
Renkontiĝo de ĉinaj kaj francaj junuloj . . . . .	22
Renkontiĝo de ĉinaj kaj koreaj junuloj . . . . .	24
Hungaraj artistoj en Ĉinio . . . . .	41
Bulgaraj artistoj en Ĉinio . . . . .	42
Internacia problemo: Savu la arbarojn . . . . .	47
Kurantaj aferoj . . . . .	44
Ĉinlingva kurso . . . . .	68
Sur la kovrilo: La 7-jara esperantisteto Ŝaŝa en la Unua Ĉina Kongreso de Esperanto	
	Foto de LI ĈUNGENG
Sur la dorskovrilo: Umefloroj kaj pigoj (Ĉinstila pentraĵo)	de JAN BOLONG
Interne de la kovrilo: Drako sur la tegmento de antikva konstruaĵo	Foto de JAN GONGJI
Interne de la dorskovrilo: [Fotofaritaĵoj de E-istoj]	
1. Ŝtonmonumentoj antaŭ 4 000 jaroj	de BOLLA ERNEST (Francio)
2. La monto Norikura	de FUSACUGU KIDO (Japanio)



*Vortoj skribitaj de s-ro Ĉu Tunan, prezidanto de la societo "Amikoj de Esperanto", por la kongreso*



*Reprezentantoj de la Ĉongĉing-a Esperanto-Asocio prezentas flagon ĉe la inaŭguro.*

## REVUO AL LA KRESKANTA ESPERANTISTARO DE ĈINIO

— Pri la Unua Ĉina Kongreso de Esperanto

raportistino de EPĈ ĜANG ĈINGĜEN

Aŭguste ĉijare, la bela urbo Kunming en sudokcidenta Ĉinio fariĝis tre alloga Esperanta urbo. Tie kolektiĝis 600 esperantistoj de 28 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio por la Unua Ĉina Kongreso de Esperanto. Tio estas longe dezirata granda afero de la pli ol 200 000 esperantistoj de Ĉinio.

Pasis pli ol 80 jaroj post kiam Esperanto enkondukiĝis en nian landon. La ĉina E-movado trapasis zigzagan vojon kaj nur en la lastaj 30 jaroj rimarkinde disvolviĝis, precipe en la lastaj kelkaj jaroj ĝi venis en senprecedence prosperan periodon en sia historio. Ĝuste tiam UEA deklaris, ke la 71-a UK okazos en Pekino de Ĉinio. Tio estas vera stimulo al la ĉinaj esperantistoj. La Unua Ĉina Kongreso de Esperanto okazigita en tia situacio, estas revuo de la ĉina esperantistaro. Ĝi sendube estas tre necesa kaj ĝustatempa kunveno por fari pensan kaj organizan preparon por la Pekina Kongreso.

La 23-a de aŭgusto de 1985 estas memorinda tago en la historio de la ĉina E-movado. Je la 9-a matene de tiu tago solene inaŭguriĝis la Unua Ĉina Kongreso de Esperanto en la Zamenhofa Halo.


La inaŭguron ĉeestis Ĝu Ĝjabi, prezidanto de la loka komitato de la Unua Ĉina Kongreso de

Esperanto, ĝia vicprezidanto Fang Ĝongbo kaj Ĝang Ĉjiĉeng kaj aliaj famaj esperantistoj kaj vicprovincestro de Junnan-provinco Daŭ Ĝudong kaj prezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco de Ŝandong-provinco Ding Fangming kaj aliaj Esperanto-amikoj.

Komisiite de UEA, s-ro Umeda Yosimi, ĝia vicprezidanto speciale veturis tien por ĉeesti kaj gratuli la kongreson.

La kongreso estis enhavoriĉa kaj varma. La kongresanoj aŭskultis raportojn pri la internacia E-movado kaj la 70-a UK. En la kongreso oni okazigis akademian prelegojn, fakajn kunvenojn, diskuton pri instru-programoj de Esperanto, modelan instruadon de Esperanto, kursojn de Esperanta fonetiko kaj konversacio k.a. Ŝanhajaj samideanoj eksponis valorajn fotojn pri la historio de la Ŝanhaja E-movado.

*Kunveno de delegaciestroj*





En la kongreso oni diskutis ĉefe pri la kongresa temo "Vojo kaj Perspektivo de Esperanto en Ĉinio". Reprezentantoj de diverslokaj Esp-organizaĵoj prezentis valoran sperton kaj proponojn, rememorante la historion de sialoka E-movado. Ili opiniis, ke la ĉefa tendenco de la ĉina E-movado estas bona. Precipe en la lastaj jaroj, dank' al subtenado de la registaro kaj koncernaj departementoj kaj penado de la diverslokaj samideanoj, Esperanto rapide disvastiĝis en Ĉinio. Kompreneble la ĉinaj esperantistoj devas fari ankoraŭ pli da klopodo precipe en firmigo de la akiritaj sukcesoj kaj en senĉesa levo de lingvo-nivelo.

La kongreso revuis la ĉinan esperantistaron, kies fortoj manifestiĝas per la senĉesa kresko de la nombro de la esperantistoj kaj evidenta leviĝo de ties lingva nivelo. Kompreneble kompare kun la internacia nivelo inter tiu kaj tiu de la ĉinaj esperantistoj troviĝas granda distanco, sekve la ĉinaj esperantistoj havas nenian motivon por memkontentiĝi. Plejparto de la kongresanoj estas gejunuloj, kaj ili energie lernas Esperanton kaj gajnis kelkajn sukcesojn. Gejunuloj estas espero de la ŝtato kaj tiu de Esperanto. La pliaĝaj esperantistoj estis ĝojaj pro tio ke en nia E-movado estas senlacaj daŭrigantoj. La pli-ol-60-jaraj firma-volaj samideanoj ankoraŭ daŭrigas sian lernadon por levi sian lingvo-nivelon. En la kunsido de la maljunaj esperantistoj ili esprimis, ke ili daŭre faros kontribuojn al la idealo de Esperanto. Oni vidis, ke en Ĉinio Esperanto jam enkondukiĝis en scienc-teknikan kaj aliajn kampojn. En la kongreso kunsidis sciencist-teknikistaj esperantistoj kaj tiuj de la kulturaj, artaj, medicinaj kaj goaj esperantistoj. Inter la kongresanoj estis nemalmultaj nacimalplimultanoj, kio montris, ke Esperanto estas popularigita ankaŭ inter la nacimalplimultoj de Ĉinio. Tio spegulis penetran disvolviĝon de la ĉina E-movado.

Oni povas diri, ke la 1-a kongreso de la ĉinaj esperantistoj estas ekzerco por la Pekina Kongreso

*Stevardino Li Maŭĉin (la tria de dekstre) inter junaj esperantistoj*



en la venonta jaro. La kongresanoj estis bone ekzercitaj en la penso, organizado kaj konversacio kaj plicertigis la memfidon de la ĉinaj esperantistoj por brilsukcesa aranĝo de la Pekina Kongreso.

La kongreso donis bonajn okazojn por vasta kontakto de esperantistoj de diversaj lokoj de Ĉinio. En la Interkonatiĝa Vespero de la 22-a, la samideanoj senescepte parolis Esperante, sen distingo de nacieco, aĝo, sekso, ofico kaj socia pozicio. Ili konatiĝis kaj interparolis korverŝe unu kun alia. La vespero daŭris ĝis profunda nokto. La malgrandaj kunvenoj aranĝitaj de la kongreso kaj tiuj organizitaj proprave de diverslokaj esperantistoj donis al la kongresanoj okazon interŝanĝi sperton en lernado kaj apliko de Esperanto kaj akcelis ilian interkomprenon kaj amikecon. Dum la paŭzoj de la kunvenoj la ĉeestantoj kelkope interparolis, en kio plej viglis junaj esperantistoj. Ili donacis Esperantaĵojn kaj aliajn memoraĵojn unu al alia. Plejparto de ili neniam antaŭe vizitis Kunming, la ĉiam printempan urbon. Ĉu troviĝas homo, kiu ne volas pririgardi la faman pitoreskan urbon? Tamen ili tre domaĝis la tempon. Li Maŭĉin, stevardino de la Ŝanhaja Aviad-buroo diris: "Ĉiu minuto kaj eĉ ĉiu sekundo en la kongreso estas kara por ni. Baldaŭ okazos la 71-a UK. La fremdlandaj esperantistoj vidos nin, stevardojn, pli frue ol ĉiujn ceterajn. Nia tasko estas peza. Ĉi-foje ni 17 stevardoj venis ĉefe por ekzerci nin en interparolo por bonvenigi fremdlandajn esperantistojn de la 71-a UK en la venonta jaro."

En la kongreso oni okazigis Esperantan vesperon, balon kaj ekskurson al la famaj pitoreskejoj Ŝtona Arbaro kaj Drak-pordo sur la Okcidenta Monto. Inter ili la Esperanta amuz-vespero impresis plej profunde, ke esperantistoj de diversaj lokoj de la lando prezentis sian programeron kun loka kaj nacieca karaktero. La pekina opero, Anhuj-a opero, amuza dialogo, kanto, danco kaj popolaj kantoj estis varme aplaŭdataj de la ĉeestantoj.

*Kongresanoj interesiĝas pri la raporto de la internacia Esperanto-movado.*



S-ro Umeda Yosimi partoprenis en la kongreso kaj estis varme bonvenigita de la kongresanoj. En la kongreso li faris du prelegojn, krom modela instruado. Kun granda intereso li ĉeestis la amuzan vesperon. Li proponis al la lokaj estroj, ke oni nomu iun straton en la urbo Zamenhof-strato por memori la kongreson.


S-ro Umeda diris, ke Ĉinio donis grandan atenton al la kongreso. Li diris, ke ĝenerale la simila landa kongreso de Esperanto daŭras nur 3 tagojn, dum tiu ĉi de Ĉinio duoble. Li aldonis, ke en tiel vasta lando kiel Ĉinio la esperantistoj malgraŭ longa vojaĝo kaj laciĝo kolektiĝis en tiu

landlima urbo kaj estis mirigaj ankaŭ la amplekso de la profesioj kaj la nombro de la kongresanoj.


Pro nesufiĉeco de sperto kaj preparado por la kongreso estiĝis ankaŭ iaj neperfektaĵoj, tial kelkaj aktivadoj ne venis al dezirata rezulto.

Malgraŭ tio, la kongreso rikoltis evidentajn sukcesojn. La situacio kaj perspektivo de la ĉina E-movado prezentitaj de la kongreso multe inspiris kaj akcelis la ĉinan E-movadon en diversaj lokoj. Ding Fangming, prezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco de Ŝandong-pro-

*S-ro Ding Fangming (la dua de maldekstre) kaj membroj de la Ŝandong-a delegacio*



*Gaja dancado*



vinco kaj eks-vicprovincestro de Ŝandong diris, ke li venas al la kongreso ja por propraokule vidi la staton de la hodiaŭa movado de Ĉinio. En la kongreso li kaj Ŝandong-aj reprezentantoj interkonsiliĝis pri la fonda de la Ŝandong-a E-asocio. Estis informite, ke post la kongreso baldaŭ fondiĝos E-asocio de la provincoj Gansu kaj Hebej.

Je la 3-a ptm de la 29-a de aŭgusto finiĝis la 7-taga kongreso en la impona kanto "La Espero".





*La kongresejo*

*Kongresanoj*





*Esperantistoj de la Ĉina Civila Aviada Administra-  
cio bone servos al partoprenantoj de la venonta  
UK.*







*Ĉinaj esperantistoj petas subskribon de s-ro Yosimi Umeda, vicprezidanto de UEA.*

*Esperantistoj en la interkona vespero*

*Kongresanoj vizitas la Ŝtonan Arbaron.*



*Kongresanoj en balo*





Uengou

MALFERMITAJ URBOJ

## Uengou, eksterkomerca haveno ĉe la Orienta Ĉina Maro

de ĜENG ĜENGĜJE

Fotoj de LI ĈUNGENG

*Laboristino faras tondilon  
kun landfama marko  
"Duobla Sago".*

Bazaro en Uengou





Ŭengou situas ĉe la marbordo de la Orienta Ĉina Maro kaj mal-supra parto de Oŭĝjang-rivero, la dua granda rivero en Ĝeĝjang-provinco. Legendo diras, ke blanka cervo kun floro enbuŝe trairis la urbon dum ĝia fondiĝo en Ĉin-dinastio en la 4-a jarcento p. K., kio estis rigardata bona aŭguro, kaj pro tio oni ankaŭ alinomas ĝin Cerva Urbo.

Ŭengou kun pli ol 11 700 kvadrataj km. kaj ĉ. 6 100 000 loĝantoj havas 9 guberniojn sub sia administrado. La orienta parto de Ŭengou estas fekunda ebenaĵo, kie fluas multaj riveroj kaj abunde kreskas rizo, tritiko, oranĝarbo, sukerkano, kolzo, matopajlo, juto kaj aliaj ekonomiaj plantoj. En la okcidenta, suda kaj norda partoj sin trovas montaj kaj montetaj regionoj kun pli ol 840 000 hektaroj da arbaroj. Tie ĉefe kreskas pino, abio, cipreso, kverko, morusarbo por papero kaj kastanopso (*Castanopsis*) kaj ankaŭ ekonomiaj arbaroj kiaj tearboj, tungo-arboj, ole-kameliaj arboj, moso-bambuoj k. a. Krome, mineraloj prospektoritaj en la montregionoj jam superis 40 specojn, inter la nemetalaj minoj la rezervaĵoj de alunito, granito kaj pirofilito, la ĉefa materialo por porcelanaĵoj kaj ŝtonaj skulptaĵoj, estas la plej multaj. Aluno estas vaste uzata en la vivo, farmacio, industrio kaj agrikulturo. Gongŝan-urbeto de Cangnan-gubernio sub Ŭengou produktas alunon el alunito, kies produktokvanto okupas 80% de tiu de Ĉinio kaj pli ol 60% de tiu de la mondo kaj pro tio ĝi ricevis la nomon "aluna urbo". Interne de la urbo la rezervita kvanto de granito sole en Dalŭomonto estas 5 miliardoj da kubmetroj, la kasteloj, pontoj kaj kolonoj de temploj konstruitaj el granito tie produktita antaŭ kelkcent eĉ mil jaroj bone konserviĝis

ĝis nun. Granito kun pli ol 20 naturaj koloroj, griza, blanka, nigra, bruna kaj rozkolora, havas debiton en- kaj eksterlande.

Ĉe la marbordo de Ŭengou 355 km. longa estas multaj insuloj, vasta marareo kaj dekoj da specoj de fiŝoj. La fajna kaj mola malprofundaĵo estas taŭga por breĉi konkojn, algojn, fiŝojn kaj salikokojn. La jara produktokvanto de sinonovakuloj (*Sinonovacula constricta*), anadaroj (*Anadara*) kaj aliaj konkoj atingis 15 milionojn da kilogramoj en Leĉing-golfo. Gastronomio de Ŭengou, unu el la famaj ĉinaj gastronomiaj sistemoj, famiĝis pro sia alta kuirarto de fiŝoj kaj salikokoj. Oni ankaŭ disvolvis bredadon de salikokoj, marĉevaloj kaj vizonoj en la lastaj jaroj.


Ŭengou, unu el la 18 bonaj havenoj en Ĉinio, enviciĝis inter la eksterkomercaj havenoj frue en Song-dinastio (960-1279). Hodiaŭ en la haveno jam troviĝas 20 kajoj, grandaj kaj malgrandaj, inter kiuj 9 povas akcepti ŝipojn de 3 000 ĝis 5 000 toneloj. La naviglinioj interligas Ŭengou kun Ningbo, Ŝanhajo, Ljanjungang, Nantong, Daljan, Ĉinhŭangdaŭ, Fuĝou k. a. kaj ankaŭ malfermiĝis oceanaj linioj al Hongkong, Japanio, Koreio k. a.


En Ŭengou tradicie viglas metioj, komerco, martransportado kaj ekstera komerco. Nun la tradiciaj metioj tute noviĝis, moderna industrio rapide disvolviĝis kaj jam formiĝis kompleta sistemo de porcelana, manĝaĵa, leda, kemia, tekstila, plasta, metala, maŝina, ŝipkonstrua, metalurgia, elektroenergia kaj konstrumateriala industrioj. En 1985 5658 industriaj entreprenoj estis statistikitaj en la urbo. En la lastaj jaroj tie ankaŭ aperis mikrokomputeroj, elektronikaj mezurinstrumentoj kaj aliaj novaj produkta-

ĵoj. Krom la supre menciitaj aluno kaj granito, la loko eksportas pli ol 270 specojn de produktaĵoj kiaj marproduktaĵoj, ladmanĝaĵoj, laktaĵoj, kaheloj, vestoj, ŝuoj, metiartaĵoj k. a. La eksportataj laktaĵoj okupas pli ol duonon de tiu de la tuta lando. Kaheloj de Ŭengou uzataj en necesejoj kaj tualetejoj por altklasaj hoteloj jam enviciĝis inter neekzamenendaj varoj en la merkato de Hongkong. La tradiciaj metiartaĵoj kiel brodaĵo, silkaĵo, skulptaĵo, ŝtona gravuraĵo kaj skulptaĵo kaj pajlomato havas grandan debiton internacie pro siaj malkareco, bona kvalito, fortikeco kaj bunta speco. Krome la loko eksportas ankaŭ vivajn kraĵojn, epinefelojn (*Epinephelus*), angilajn fraĵojn, moluskojn k.a.

En la lastaj jaroj rapide disvolviĝis la subdistriktaj kaj urbataj industrioj en Ŭengou. Nun tie

*La skulptaĵo "Cervodresado" simbolas la urbon Ŭengou.*





*Gjangŝin-parko*

diversaj lokoj de la lando. Ĉiutage 2 000 klientoj venas ĉi tien de diversaj lokoj por negoco, la vendokvanto atingis 4 milionojn da butonoj kaj la negocsumo meznombro superas centmil jŭanojn (2.87 jŭanoj egalas unu usonan dolaron).

Ŭenĝoŭ havas ankaŭ multajn turismajn vidindaĵojn ĉefe el montoj kaj akvoj kiel siajn trajtojn. El ili la plej fama estas Norda Jandang-monto, alinomata "La Unua Monto en Sudorienta Ĉinio" kaj insuleto alte staranta en ondanta Oŭĝjang-rivero.

Post sia enviciĝo inter la 14 marbordaj malfermitaj urboj de Ĉinio, Ŭenĝoŭ ankaŭ difinis Longŭan-subdistrikton, situantan ĉe la malsupra parto de Oŭĝjang-rivero, 14 kilometrojn for de la urbo, kiel regionon por ekonomia kaj teknika disvolvo kun totala areo de 18 kvadrataj km. Laŭ la plano la regiono konsistos el kvin partoj, t.e. ekonomia administra centro, kvartalo por industria disvolvo, kvartalo por scienca kaj teknika disvolvo, kvartalo por eksterkomerca transportado kaj kvartalo por turismo kaj vivo. Laŭ la unua projekto oni unue konstruos sur areo de 2.2 kvadrataj kilometroj kaj fun-

estas 7 400 industriaj entreprenoj. En la vilaĝoj de la naŭ gubernioj aperis pli ol 280 specialigitaj vilaĝoj kaj subdistriktoj kaj formiĝis dek produkta-vendaj bazlokoj por specialigitaj varoj. Ekz., Ĉjaŭtoŭ-urbeto de Jongĝja-

gubernio, kun malmultaj loĝantoj, starigis pli ol 40 butonfarejojn kaj pograndaĵojn kaj merkatojn de butonoj. Tie kolektiĝas kaj konkuras miloj da specoj da riĉe koloritaj butonoj en 12 kategorioj produktitaj de butonfarejoj de

*Diversaj modaj ŝuoj produktitaj de Ŭenĝoŭ*



*Sjŭan-papero produktita de Ŭenĝoŭ*







*Haveno de Üenĝoŭ*


damente finos la konstruadon en 1987. Iom post iom formiĝos nova urbeto kun ĉ. 100 000 loĝantoj.

Ĉar la nunaj kondiĉoj de trafiko, telekomunikado k. a. estas relative malbonaj en Üenĝoŭ, tial la konkrete praktikataj paŝoj de malfermado ne povas esti samaj al tiuj de aliaj marbordaj malfermitaj urboj kun bonaj kondiĉoj. La lastatempa laboro gravitas ĉefe ĉirkaŭ meto de bona fundamento por krei favorajn kondiĉojn por estonta disvolvo, penante akiri rimarkindan rezulton en la venontaj tri jaroj kaj relative grandan ŝanĝiĝon en kvin jaroj, t. e. facila trafiko, facila komuni-

kado, avangardaj teknikoj kaj prospera ekonomio. La ĉefaj konstruadoj entreprenataj aŭ komencotaj konsistas el ponto super Fejjun-rivero, Hangĝoŭ-Üenĝoŭ-Fuĝoŭ-a samaksa kablo, larĝigo kaj rekonstruo de la ĉefaj stratoj en la urbo, Üenĝoŭ-a Aerodromo, Ĝinhŭa-Üenĝoŭ-a Fervojo, kajo ĉe Longŭan por centmil-tonela ŝipo kaj programe regata telefonio kun 16 000 kanaloj. Cetere oni pretas konstrui grandan hidroelektron por laŭplane utiligi la riĉan akvoforton. Koncerne industrion oni jam decidis fari la unuajn 126 eksterlandajn kunlaborajn projektojn de ekonomio kaj tekniko, reformadon

al la nunaj entreprenoj kaj sinteze utiligi riĉajn fontojn de alunito. Koncerne agrikulturon, sufiĉe utiligante la favorajn kondiĉojn de la montoj kaj maro oni marŝos al vasteco kaj profundeco de la produkto. Koncerne eksterkomercadon kaj disvolvon de turismo oni disvolvos eksportajn superecajn produktaĵojn, konstruos hotelojn kaj surmaran distran centron kaj rekonstruos vidindejojn ktp.

Por rapidigi utiligon de fremdaj kapitaloj kaj paŝojn de teknika enkonduko oni donos privilegion al la komercistoj, kiuj venas investi, observe al la koncernaj difinoj de la ĉina registaro.



*Liŭ Jandong (maldekstre) kaj nia raportistino*

# JUNULARO, ESPERO DE ĈINIO

— Intervjuo al la prezidanto de  
la Ĉina Junulara Federacio

*Kial la nuna ĉina junularo estas la plej esperiga generacio? Kion ĝi aspiras? Kaj kiel ĝi laboras kaj vivas? Kun tiuj demandoj nia raportistino intervjuis Liŭ Jandong, prezidanton de la Ĉina Junulara Federacio.*

**La Red.**

**Demando:** Kiom da junuloj estas en Ĉinio kun miliardo da loĝantoj? Kiajn karakterizaĵojn ili havas?

**Respondo:** Ĉinio estas antikva lando kun pli ol 4 000-jara historio de kulturo, sed ĝi estas unu el la plej junaj landoj en la mondo laŭ la aĝo-strukturo. Inter la miliardo da ĉinaj loĝantoj estas 300 milionoj da 14-28-jaraj junuloj, kiuj konsistigas 30% de la totala nombro.

En la periodo de la granda nova socia transformiĝo de la ĉina nacio la nunaj ĉinaj junuloj havas rimarkindajn karakterizaĵojn, nome ili amas la patrolandon, decidas fari reformadon, diligente laboras kaj lernas kaj scias bone pensadi. Ili vidas belan perspektivon de la moderniga konstruado de la lando, komprenas sian mision kaj forte deziras servi kaj prosperigi la patrolandon. Por realigi tiun deziron, ili konkuras por iri antaŭe en la ekonomia reformado, pene laboras kaj faras kontribuon al la prosperigo de la lando kaj riĉigo de la popolo; ili diligente studas en sia laborejo por fariĝi kompetentuloj. Do, ni povas diri, ke la glora tradicio de la ĉinaj junuloj de diversaj generacioj, ami kaj servi la patrolandon, enkorpiĝis en la karakterizaĵoj de la nunaj junuloj, kaj la grandaj ŝanĝoj okazintaj en la lastaj jaroj en Ĉinio igis ilin iri sian vojon post la pripensoj kaj praktiko.

**D:** Kian pozicion la ĉinaj junuloj havas en la konstruado de la lando? Kaj kian rolon ili ludas en ĝi?

**R:** La ĉinaj junuloj konsistigas 60% de la totala nombro de la oficistoj kaj laboristoj en la urboj kaj 70% de la totala nombro de la laborantoj en la kamparo. Plejparto de ili, ŝargita per multaj laboroj, fariĝas tagon post tago ĉefa forto kaj ludas rolon de sturmantoj en la konstruado de la lando. La aktivado por fariĝi sturmanto de la Nova Longa Marŝo vaste disvolvata tutlande de post 1979 multe mobilizis la aktivecon de multaj junuloj por la moderniga socialisma konstruado. Nuntempe en Ĉinio estas pli ol miliono da sturmantoj de la Nova Longa Marŝo.

Laŭ la ĉefa enhavo de la ekonomia konstruado de la lando kaj la produkta tasko de la entreprenoj, la junuloj en la kampoj de industrio, trafiko, fundamenta konstruado, financo kaj komerco aktive partoprenis en administrado, faris multe da altkvalita produktaĵo, organizis aktivadon sin ekzerci en lerta laboro, lerni kaj apliki sciencojn, kaj akiris brilajn sukcesojn en la skalo de la lando kaj entrepreno. En la Saĝo-pokala Konkurso de Malgrandaj Inventoj, Malgrandaj Renovigoj, Malgrandaj Reformoj, Malgrandaj Projektoj kaj Malgrandaj Proponoj oni rikoltis pli ol 400 000 novajn fruktojn, kiuj plenigis multajn mankojn en tekniko. Surbaze de la laŭkontrakta laborsistemo kaj reguligo de industria strukturo la junuloj de la kamparo klopodas por sin riĉigi. Ili specialigis sian familion, donis ekzemplon en popularigo de sciencoj kaj teknikoj, partoprenis en konkursoj por plej alta produktokvanto kaj por multflanka kapablo. En tio aperis 12 000 000 elstarantoj.



La ĉinaj junuloj faras arboplantadon tra la lando. Por ŝanĝi la aspekton de la dezerta montaro en nordokcidenta Ĉinio, junuloj de diversaj lokoj kolektis semojn de herboj kaj arboj por subteni la verdigadon de nordokcidenta Ĉinio. En la lastaj ses jaroj la ĉinaj junuloj arbarizis 2 460 000 hektarojn kaj senpage plantis naŭ miliardojn da arboj.

En la aktivado de sturmantoj junaj intelektuloj plene montris sian superecon de inteligenteco. Multaj junuloj fariĝis iniciatemaj kaj promesplenaj ekonomiaj pioniroj, elstaraj fabrikestroj (aŭ direktoroj) kaj aktivuloj de reformado. Kaj ankaŭ multaj sturmantoj senlace laboras en eduko, scienc-esplorado, kulturo, arto, sporto, sanprotektado, servado k.a.

**D:** Kion opinias la junuloj pri la nuna ekonomia reformado de Ĉinio?

**R:** Kiel mi diris supre, partopreni reformadon estas unu el la rimarkindaj karakterizaĵoj de la nunaj ĉinaj junuloj. Esence, la junuloj estas la plej aktiva kaj vigla forto de la socio. Ilia deziro estas intime ligita kun la reformado. Fakte, la junuloj vidis la viklecon alportitan de la reformado en la lastaj jaroj al la ĉina ekonomia konstruado kaj komprenis, ke la reformado estas intime ligita kun la interesoj de la nacio kaj individuo, sekve ili senhezite staras en la antaŭa vico de la reformado. En la tajdo de la reformado multaj bravaj kaj talentaj junaj fabrikestroj, direktoroj kaj aktivuloj de reformado malfermis novan vojon kaj donis valoran sperton por administrado de entreprenoj, kiuj akomodiĝas al la bezono de la moderna produktado. La junuloj tre ŝatas diskuti pri la temo "se mi estus fabrikestro (aŭ direktoro)". Ili prezentis bonajn opiniojn pri reformado por rapidigi ĝiajn paŝojn.


*Junaj laboristoj de Sanhajo enskribiĝas por studi en la Sanhaja Postlabora Politekniko.*

**D:** Kiel vi opinias pri la aserto de iuj fremdlandanoj, ke "ekzistas krizo de kredo en la ĉina junularo"?

**R:** La aserto pri "krizo de kredo" estas neĝusta juĝo pri iuj portempaj kaj supraĵaj fenomenoj aperintaj en la pasintaj jaroj inter la ĉinaj junuloj. Tuj post la dek-jara ĥaosa kultura revolucio ne nur la junuloj, sed ankaŭ la tuta popolo ege malamis la ultramaldekstran linion iam furorantan kaj tre dubis pri pseŭdosocialismo, kiu konfuzis pravon kaj malpravon. Se ekzistas krizo de kredo, do estas krizo de kredo al tiaj linioj kaj "socialismo". Tio estas bona afero. Ĝi signifas la vekigon kaj maturigon de plejparto de la junuloj. Kompreneble, malmultaj homoj ne fidis la Komunistan Partion de Ĉinio kaj socialismon, tamen la ĉinaj junuloj ĉiam respektas fakton, denove konfidis kaj amas la Komunistan Partion de Ĉinio kaj havas fidon al la ĉina socialisma afero, ĉar ili vidis propraokule, ke estas neniu alia ol la Komunista Partio de Ĉinio, kiu kuraĝe konfesis siajn erarojn kaj gvidis la tutan popolon forigi la ĥaoson, liberigi la penson kaj restarigi Marksismon kaj Leninismon en ilia propra formo, kaj ĉar ili trovis bona la politikon por riĉigi la popolon kaj avantaĝa la socialisman sistemon en la grandpaŝa antaŭenmarŝo de la ĉina ekonomia konstruado. Oni povas antaŭdiri, ke la junuloj fortigos tagon post tago sian kredon al la socialisma sistemo kaj konfidos pli kaj pli la Komunistan Partion de Ĉinio, kun la plia perfektigo de la diversaj ĉinaj politikoj kaj kun la daŭra disvolviĝo de la ekonomia konstruado kaj leviĝo de la nivelo de la popola vivo.

**D:** Kia vivmaniero plaĉas al la ĉinaj junuloj kaj kiajn ĉagrenojn ili havas en sia ĉiutaga vivo?

*Li Ljangjŭan, juna laboristo de la Fubej-a Instrumenta kaj Mezurila Fabriko en Sanhajo, memlernis sciojn pri radioteleregado, bone aplikis ilin al renovigo de produktaĵoj kaj per tio fariĝis modela laboristo en Ĉinio.*



**R:** Pro la altiĝo de la popola viv-nivelo alportita de la sukceso de la ĉina ekonomia konstruado, ŝanĝiĝis la ideologio kaj la vivmaniero de la popolo, precipe de la junuloj. Por adaptiĝi al la moderna vivmaniero, ili postulas, ke oni faru ĉiujn aferojn rapide kaj efike, pliriĉigu ilian materialan kaj kulturan vivon sub la kondiĉo de disvolviĝo de produktado kaj plialtiĝo de enspezo. Ili esperas plivastigi sian socian kontakton por lerni de talentuloj kaj larĝigi la vidkampon en aktivadoj kultura, arta, sporta k.a. Plejparto de la junuloj povas bojkoti konscie la influon de postiginteco, malklereco kaj degenero en la ĉiutaga vivo.

Kompreneble, la junuloj havas ĉagrenojn en sia ĉiutaga vivo. Ekz. multaj junuloj profunde sentas, ke ilia klereco ne povas kontentigi la bezonon de la moderniga konstruado, ĉar ili vane pasigis la tempon pro la longa politika movado; iuj junuloj ĉagreniĝas pro manko de ideala profesio, ĉar en la 50-60-aj jaroj Ĉinio ne limigis naskon kaj tio kaŭzis nun malfacilon ricevi okupon; kaj certaj junuloj ne povas progresi kaj ludi rolon en la socia vivo pro la influo de la ultramaldekstra penso en tiuj jaroj, malnova ideologio kaj malnova kutimo postlasitaj de la ĉina feŭda socio. Sed ĉio tio estas nur portempaj malfaciloj. La ĉinaj junuloj havas firman decidon kaj memfidon por ilin solvi per sia propra forto, sub la prizorgo kaj subteno de la popola registaro.

**D:** En kiuj flankoj la ĉina registaro prizorgas kaj subtenas siajn junulojn?

**R:** La ĉina registaro ĉiam donas grandan atenton al la junuloj. Ĝi kreas laŭeble bonajn kondiĉojn por sana kresko de la junuloj, postulante, ke ĉiuj porjunulaj laborantoj fariĝu iliaj intimaj amikoj. Unuflanke, ni per diversaj enhavoriĉaj aktivadoj puŝas la junulojn fariĝi homoj kun idealo, moralo, klereco kaj disciplino, ĉar ili estas tre viglaj kaj entreprenemaj, sed malriĉaj je sperto de la socia vivo kaj nestabilaj ideologie. Aliflanke, ankaŭ nia registaro multe zorgas pri diversaj problemoj de junuloj, helpas ilin ĝuste solvi siajn konfliktojn en la socia vivo kaj klopodas por aranĝi iujn aferojn por ili. Tion mi pri-traktos kiel jene.

1. Ekspluati la inteligentcon de la junuloj kaj kulturi generacion da talentuloj. En Ĉinio la lernoĝaj infanoj, knaboj kaj junuloj rajtas ricevi elementan, mez- kaj altgradan edukon. Sed pro la vasteco de la ĉina teritorio kaj malek-

vilibro de la ĉina ekonomia kaj kultura disvolviĝo, nun oni popularigas malsuperan mezlernejan edukon nur en la urboj, ekonomie evoluintaj regionoj de la marbordaj provincoj kaj landinterno, kies loĝantaro konsistigas 1/4 de la tutlanda loĝantaro. Ĉinio decidis efektiviĝi, dum preskaŭ dek jaroj, 9-jaran devigan edukon en la lokoj, kies loĝantaro konsistigas 3/4 de la tutlanda loĝantaro, por ke ĉiuj tieaj lernoĝaj infanoj kaj knaboj ricevu edukon 6-jaran elementlernejan kaj 3-jaran malsuperan mezlernejan.

Rapide progresas ankaŭ la ĉina altgrada eduko. La nombro de akceptitaj lernantoj pliiĝis jaron post jaro. Ĉi-jare la diversaj altlernejoj de la lando akceptis pli ol 1 160 000 lernantojn, je 22.6% pli multe ol en 1984. Tamen tio ne kontentigis la bezonon de la junuloj, kiuj deziras viziti altlernejon. Por ĝenerale altigi la klerecon de la junuloj kaj kulturi multajn kapablulojn taŭgajn por la moderniga konstruado, la registaro tre atentigas investi por inteligenteco. Ĝi disvolvas edukon diversmaniere, ekz. starigi por memlernantoj konsilajn komitatojn, help-staciojn, konsultejojn, diversajn kulturajn kaj teknikajn trejnajn kursojn, postlaborajn lernejojn, centrojn por ekspluato de inteligenteco, junulajn grupojn por librolegado ktp., kaj kuraĝigas la junulojn al memlernado por fariĝi kapabluloj. Laŭ nekompleta statistiko, en Ĉinio ekzistas pli ol 25 000 000 junaj memlernantoj kaj ĉiujare preskaŭ 10 000 personoj partoprenas en ekzamenoj por alta eduko de memlernantoj. La sukcesintoj de la ekzamenoj ĝuas la egalrajtecon kiel la diplomitoj de ordinara lernejoj. Ankaŭ la junuloj, kiuj jam havas altlernejan diplomon, povas akiri alifakajn diplomojn per memlernaj ekzamenoj por pliriĉigi siajn sciojn. En 1984 ni laŭdis multe da avangardaj memfaritaj fakuloj. Nun pli kaj pli multiĝas junaj memfaritaj talentuloj.

2. Solvi la problemon de senlaboreco de junuloj. Ĉinio havas ĉiujare 3-4 milionojn da urbaj junuloj, kiuj devas eklabori. En la lastaj jaroj la registaro ŝanĝis la malnovan sistemon de labordistribuo kaj ekpraktikis la novan politikon, t.e. labordonaj administracioj peras al junuloj laboron aŭ junuloj memvole sin organizas en ian okupon aŭ mem serĉas profesion. La porjunulaj organizoj, unuflanke, energie propagandas la novan politikon de la registaro por kuraĝigi junulojn mem serĉi okupon kaj, aliflanke, funkciigas por senlaboraj junuloj kursojn de kuirarto, tajlorado,

(Daŭrigo sur p. 21)




# SIGNIFOPLENA KONFERENCO

De la 18-a ĝis la 23-a de septembro ĉi-jare okazis en Pekino la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio, kiun ĉeestis 992 reprezentantoj.

La temoj de la konferenco estis: Diskuti kaj aprobi la proponon pri ellaboro de la Sepa Kvinjara Plano (1986-1990); kaj elekti pliajn membrojn por la Centra Komitato de la Partio.

venonta printempo, ke ĝi akceptu kaj publikigu ĝin post diskutado.

Post la Dekdua Tutlanda Kongreso de la Partio en 1982 la nuna konferenco faris alian grandan paŝon antaŭen en anstataŭigo de malnovaj kadroj per novaj. La konferenco kontentigis la peton de 131 veteranoj ne plu labori kiel membroj de la Centra Komitato, la Centra Konsila Komisiono



*La Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio*

La jaroj 1986-1990 estos ekstreme grava periodo por disvolviĝo de la ĉina ekonomio. La propono pri ellaboro de la Sepa Kvinjara Plano aprobita de la reprezentantoj post diskutado, laŭ la ĉefa principo konstrui socialismon kun ĉinaj karakterizaĵoj kaj laŭ la ĝenerala politiko malfermi la pordon al la eksterlando kaj vigligi ekonomion enlande, prezentis la gvidan penson kaj celon de la ĉina ekonomia laboro por la kvin jaroj, strategiajn principojn, ĉefajn politikojn kaj rimedojn de la ekonomia kaj socia disvolviĝo, kaj sugestojn kaj paŝojn por reformo de la ekonomia strukturo, kiuj estas ĝustaj kaj praktikeblaj, ĉar ili konformas al la aktuala cirkonstancaro de Ĉinio. Surbaze de tiuj principoj kaj politikoj, la Ŝtata Konsilantaro ellaboros projekton de la Sepa Kvinjara Plano kaj prezentos ĝin al la Kvara Sesio de la Sesa Tutlanda Popola Kongreso okazonta en la

kaj la Centra Komisiono por Disciplina Inspekto, kaj alte taskis ilian bonan agon aboli la dumvivan gvidantecon kaj akceli reformon de la kadra sistemo. Post diskutado la konferenco elektis energio-plenajn honestajn kaj talentajn personojn por la Centra Komitato de la Partio kaj samtempe iujn personojn por la du komisionoj. En la tuj sekvinta Kvinna Plena Sesio de la Dekdua Tutlanda Kongreso de la Partio la konsisto de la Politika Buroo de la Centra Komitato kaj ĝia sekretariato parte ŝanĝiĝis per elekto kaj reordigo. Tiel la meza aĝo de la membroj de tiuj organoj fariĝis iom pli juna. Tia anstataŭigo organize garantios la sendependecon kaj memstarecon de Ĉinio, ĝiajn demokration kaj leĝan sistemon kaj la kontinuecon de ĝia politiko malfermi la pordon al la eksterlando kaj vigligi ekonomion enlande kaj garantios ĝian glatan socialisman konstruadon.

# LA MEDIA POLUCIO KAJ KONTRAŬMETODO EN PEKINO

La media protektado estas unu el la plej gravaj problemoj alfrontataj de la nuna mondo, precipe la ekonomie evoluintaj landoj. Kun rapida disvolviĝo de ekonomio, la media protektado en la urboj, precipe la grandaj urboj, estas aparte atentata de la registaroj de diversaj landoj. Pekino, ĉefurbo de Ĉinio, estas unu el la plej grandaj urboj de la mondo. Kiel multaj aliaj urbegoj de la mondo, Pekino en rapida disvolviĝo estas minacata de ĉiam pli serioza media polucio kaj ekologia detruo. Kiel efike protekti la medion en la ekonomia disvolviĝo estas unu el la nunaj ĉefaj taskoj plenumendaj por la Pekina magistrato.

Nun Pekino estas suferanta de polucio de akvo, gaso, ruboj kaj bruo. Laŭ statistiko, pro la atmosfera polucio la mortokvanto de urbanoj pro pulmokancero grandigas kaj pro la akva polucio la malmoleco de la subtera akvo en Pekino altiĝas kaj malboniĝas la akva kvalito de la riveroj kaj lagoj. Al iuj lagoj kaj riveroj mankas vizitantoj pro serioza polucio. La urba rubo pliiĝas je 6-7% ĉiujare kaj jam estas malfacile trovi pli da lokoj por teni ĝin. La ruboj ĵetitaj sur kampoj multe malutilas al la grundo por konservi nutron kaj akvon. La bruo, skuo kaj elektromagneta ondo jam malbone influas la radio-komunikadon kaj la vivon kaj sanon de la popolanoj. Kaj tio kaŭzis eĉ konfliktojn inter fabrikoj kaj loĝantoj.

La media polucio, tiu okulfrapa socia problemo, ne nur malbone influas la vivon kaj laboron de la popolo, sed ankaŭ kaŭzas grandan perdon de energio kaj aliaj riĉfontoj. Laŭ takso, ĉiujare la media polucio perdigas ĉ. 200-300 milionojn da jŭanoj (2.8 jŭanoj egalas al unu usona dolaro).

Antaŭ dek jaroj Pekino ekfaris kontraŭmetodon al media polucio. Kvankam la polucio ankoraŭ ne estas tute bridita, tamen grandaj sukcesoj estas atingitaj, precipe en la lastaj jaroj.

Koncerne al la serioza atmosfera polucio kaŭzita ĉefe de hejta karbo, la Pekina magistrato unuflanke transformis la fornegojn de la urbo por elimini fumon kaj polvon, aliflanke aplikis metodon koncentre liveri varmon por malpliigi fornegojn kaj ŝanĝi la speciojn de hejtaĵoj. Ĝis la fino de 1984 la fornegoj de la urbo estis plene transformitaj. La areo de domoj kun koncentra varmolivero pliiĝis je 8.8 milionoj da kvadrataj metroj. Kvankam la uzita hejta karbo de la urbo pliiĝis je 3 milionoj da tunoj, tamen la kvanto de falinta polvo restas fundamente senŝanĝa.

Por protekti la akvofonton la koncernaj departementoj de la magistrato rapidigis la konstruadon de la kloaka reto kaj instalaĵoj por trakti malpuran akvon, difinis la protektejojn de akvofonto por la akvorezervejoj Mijun, Ĝuanting kaj Hŭajjoŭ kaj ellaboris regulojn pri protektado kaj

administrado de akvofonto. Dank' al polucio-elimino, reformo, kunigo, translokigo kaj fermo, pli ol 300 fabrikoj ne plu ĝenas la loĝantojn nek faras polucion, oni fermis ĉ. 200 muldejojn, varmotraktejojn kaj galvanizejojn. Dank' al tio, la ellasaj kvantoj de fenolo, ciano, hidrargo, kadmio, arseno kaj aliaj venenajĵoj malpliigis je pli ol 80 % kompare kun tiuj de 1973, kio mildigis la polucion de riveroj kaj subtera akvo.

Por severe bridi la trafikbruon la magistrato publikigis la "Regularo por Protekti la Medion kaj Elimini la Bruadon (projekto)". Ĉiuj motorveturiloj de la urbo estas provizitaj per kornoj sonantaj mallaŭte. En la urbaj kvartaloj estas malpermesite sonigi kornon. Kvankam motorveturiloj pliiĝis je 8%, tamen la trafika bruo reduktiĝis je 1 ĝis 6 decibeloj, sub la normo difinita de la ŝtato.

Ĉi-jare kun plua laboro super la polucia fonto kaj unuopa polucio en loĝkvartaloj, Pekino plenergie faris sintezan reordigon de la urba medio. La ses lagoj (Ŝiĉaŝjihaj, Hoŭhaj, Ĉjanhaj, Bejhaj, Ĝonghaj kaj Nanhaj) en la urbocentro antaŭe estis imperiestraj ĝardenoj, sed post la Liberiĝo fariĝis lokoj ekskursaj kaj ripozaj por la popolo. En la pasintaj jaroj, pro neglekto de media protektado, la regiono estis poluciita certgrade. Ĉi-jare la magistrato decidis fari al la regiono



## ABONU "EL POPOLA ĈINIO"!

Nun komenciĝas 1986-a abonvarba kampanjo por EL POPOLA ĈINIO. Tiuj, kiuj abonas aŭ reabonas nian gazeton en la kampanjo (de 1985 10 01 ĝis 1986 02 28), ricevos Esperantan kalendaron. La abonvarbantoj ricevos ĉinstilajn memoraĵojn laŭ sia kontribuo en la varbado.

Sendu la abonilon al nia peranto en via lando aŭ rekte al ni: Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

reordigon kaj beligon. La eluzita akvo de industrio en la regiono devas esti tute traktita. La eluzita gaso kaj bruo de industrio devas esti sub la normoj difinitaj de la ŝtato. La fornegoj kaj kamenoj hejtataj per karbo devas esti reformitaj. Kolektiva varmoliverado estas disvastigata. La rubo devas esti tenata kaj transportata en ujoj. La medio devas esti plu verdigita kaj beligita, por ke la pitoreskejoj estu pli agrablaj.

Ĉi-jare en Pekino aperos naŭ puraj kaj belaj loĝkvartaletoj, kies medio estas sub la poluciaj normoj difinitaj de la ŝtato.

Kompare kun alilandaj urboj, Pekino estas ne bone verdigita. La parkoj en la urbo konsistigas nur 3.2% de la urba areo, sed tiu en Londono — 13.8% kaj en Parizo kaj Vaŝingtono — 20% respektive. En la lastaj jaroj Pekino rapidigis la verdigadon kaj la verdigita areo pliiĝas iom post iom. Sole en la unua duonjaro de 1985 la urbo transplantis 1.41 milionojn da arbidoj, herbojn sur miliono da kvadrataj metroj kaj plivastigis la verdigitan areon je 107 hektaroj. Aparte menciinde, ke oni verdigis 80% de la verdigenda areo en la naŭ loĝkvartaletoj. La verdigitaj lokoj povas servi kiel ripozejoj por cent mil personoj.

Kvankam la media protektado de Pekino akiris certajn sukcesojn, tamen la tiea media polucio estas ankoraŭ serioza, ĉar la loĝantaro kaj industrio kreskis tro rapide, kaj plie, la dispozicio de industrio ne estis racia kaj la konstruado de la urbaj publikaj instalaĵoj antaŭe ne estis sufiĉe atentata. La nombro de aŭtoj de Pekino kreskis de cent kvardek mil en 1981 al ducent dekmil, sed kontraŭmetodo de la gaso ellasita de aŭtoj estas preskaŭ nulo, la

(Daŭrigo sur p. 55)

### ABONTARIFO DE EPĈ

(Ekvalidas de 1-a de Oktobro)

Lando	Valuto	1 jaroj	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	\$A	14.00	24.00	34.00
Aŭstrio	Sch	200	340	480
Belgio	BF	550	930	1300
FR Germanio	DM	30.00	50.00	70.00
Britio	£	8.00	13.60	19.00
Finnlando	Fmk	64.00	108.00	150.00
Francio	FF	90.00	150.00	210.00
Hispanio	Ptas	1200	2000	2900
Italio	Lit	18000	30600	43000
Japanio	Yen	3000	5400	7500
Jugoslavio	Din.	500	900	1300
Nederlando	Gld.	34.00	58.00	82.00
Nov-Zelando	NZ\$	20.00	34.00	48.00
Portugaliao	Esc	1100	1800	2600
Svisio	SF	25.00	42.00	60.00
Usono	US\$	12.00	20.00	28.00
Kanado	Can\$	13.00	22.00	30.00
<b>Por aliaj landoj en Eŭropo:</b>				
	£	8.00	13.60	19.00
	US\$	10.00	17.00	24.00
<b>Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:</b>				
	£	5.00	8.50	12.00
	US\$	6.50	11.00	16.00

VARBILON KAJ SENPAGAN SPECIMENON  
NI SENDOS LAŬ PETO.

# ANTAŬ KAJ POST GRANDA TERŜOVIĜO

La 12-an de junio ĉijare okazis granda terŝoviĝo de monto mil metrojn alta ĉe la urbeto Ŝintan sur la norda bordo de Jangzi-rivero en la gorĝo Ŝjiling. Tio vekis atenton de multaj en- kaj eksterlandaj personoj. Terŝoviĝo estas natura katastrofo samkiel rokfalo kaj kotŝtona fluo. Ĉinio estas lando kie kompare ofte okazas terŝoviĝoj. En 1981 okazis nur en la provinco Siĉŭan miloj da terŝoviĝoj kaŭzita de pluvego, sed ne tre grandaj. Ankaŭ en aliaj landoj ofte okazas terŝoviĝoj. Terŝoviĝo de Svisio en 1932 pereigis 5 000 homojn.

De antikve Ŝintan estas terŝoviĝema regiono, de la jaro 100 p.K., granda montokorpa moviĝo okazis post ĉiuj 400-500 jaroj. Ĝis nun estis registritaj pli ol 20 terŝoviĝoj. Sed pro manko de koncernaj scioj, oni ne povis sin gardi de la katastrofoj kaj multe da loĝantoj mortis pro tio. Sur la norda bordo de Jangzi ĉe Ŝintan estas "skeleta pagodo", kie amasiĝis kaj enteriĝis skeletoj de sennombraj viktimoj.

Antaŭ kelkaj jaroj iuj geologoj diris en oficiala raporto: En Ŝintan ne okazos tutkorpa glitado de danĝeraj krutaĵoj. Jam estis registroj pri geologia aktivado de Ŝintan-regiono en miloj da jaroj, ĉu tiu aktivado vere ĉesis por ĉiam? Por precize respondi la demandon kaj protekti la popolamasojn kaj iliajn riĉaĵojn, scienc-esplorantoj de la rokfalo-esplora fako de Hubej-provinco komencis

en 1974 ampleksan sintezan esploradon al la regiono. La kvin scienc-esplorantoj de la fako, diplomitaj en altaj lernejoj kaj vivintaj sur ebenaĵo, forlasis sian hejmlokon kaj venis al Ŝintan. En la pasintaj pli ol dek jaroj ili trairis densajn arbarojn sur altaj montoj kaj valoj de Ŝintan, piedirinte proksimume okdek mil km. Ili aranĝis ĉirkaŭ la glitemaj deklivoj de Ŝintan 72 observajn punktojn kaj 9 simplajn observajn punktojn, starigis 15 koordinatajn interkruciĝajn punktojn, triangulan observ-regan reton kiu konsistas el 6 punktoj kaj difinis 5 nivelajn liniojn. Ĝis majo de 1984 ili jam formis perfektan kontrolan reton en la tuta glitema regiono.

Analizinte kaj esplorinte ĉiujn observitajn registrojn, ili prezentis en 1983 aserton pri reviviĝo de la supra regiono de Ŝintan. Post nelonge la reviviĝa regiono sinkis je 3 metroj kaj aperis plumformaj fendoj. 13 milionoj da kubmetroj da tero kaj rokoj estis en tutkorpa glita tendenco. Post marto de 1985 la reviviĝa regiono sinkis pliajn 15 metrojn, la pasintaj fontoj malaperis, sed en antaŭaj senfontaj lokoj elfluis fontoj. La okula observo kaj aparata mezurado montris, ke okazos montkorpa glitado, la scienc-esplorantoj de la rokfalo-esplora fako decidis fari alarmon.

La 9-an de majo la unua alarmon informo estis dissendita al di-

versnivelaj gvidaj departementoj. La 6-an de junio ĉiuj sciencistoj de la fako venis al la glita loko, matene, je la 5-a de la 8-a de junio leviĝis montetoj unuj post aliaj sur la tersurfaco. Tio montris, ke la subtera akvo tuj trarompos la tersurfacon sub la premo de la glitanta montkorpo. Tiam la montkorpo sinkis 1-2 metrojn ĉiutage. Je la 9-a de junio la sciencistoj venis al la glitanta loko por akiri precizajn donitaĵojn. Ili vidis, ke ĉie troviĝas fendoj, vaporo leviĝas supren kaj subtera akvo disfluas ĉien. Tamen ili ankoraŭ persistis en la observado ĉeloke kaj ĝustatempe raportis al la supera instanco la koncernan staton. La situacio fariĝis ĉiam pli danĝera. La sciencistoj sendis al la gvidaj institucioj urĝan telegramon kun propono tuj transloki la loĝantojn. Je 15 minutoj post la kvara matene de la deka de junio, ĉ. 700 000 kubmetroj da tero kaj rokoj glitis de la montosupro. Tio montris, ke tuj okazos granda terŝoviĝo.

Je la 11-a de junio la sciencistoj iris rekte al la plej danĝera loko, kunportante teodoliton, termezurajn nivelilojn kaj mezurbandojn, kaj daŭrigis la lastan observadon. Tiam la deklivo tremis senĉese kaj ŝtonpecoj disfluis, fetora odoro de tempo al tempo atakis la nazon, la glitanta deklivo sinkis ĉiuhore 1-2 metrojn. En tiu ĉi kriza momento la sciencistoj aplombe observis kaj akiris



multajn valorajn donitaĵojn. Posttagmeze la deklivo sinkis pli rapide, eĉ per la nudaj okuloj oni povis vidi la moviĝon de la monto. La tero tremis pli forte. Ĉiuj aparatoj ne funkciis. Ili jam ne povis daŭrigi la observadon. Nur tiam la sciencistoj, kiuj sendormiĝis kvin sinsekvajn tagnoktojn, retiriĝis el la danĝera loko.

Frumatene, je 35 minutoj post la tria, la 12-an de junio, komenciĝis granda montokorpa terŝoviĝo, 30 milionoj da kubmetroj da tero kaj rokoj moviĝis, aŭdiĝis tondra obtuza bruego. La monta glitado estigis grandan magnetan kampon, ke la elektrolampoj malproksimaj je 500 metroj mallumiĝis kiel kerosenaj lampoj. Pli ol miliono da kubmetroj da tero kaj rokoj falis en Jangzi-riveron kaj levis ondegojn je 80 metroj altajn, ŝipo je 7 km. for de la loko de terŝoviĝo renversiĝis de la ondegoj. En malpli ol kvin

minutoj tute malaperis la urbeto kun 457 familioj.

Antaŭ la terŝoviĝo, dank' al ĝustatempa prognozo de la sciencistoj, la gvidantoj de la provinco, subprovinco kaj gubernio tuj rapidis al la danĝera loko kaj organizis provizoran urĝsavan komandantaron, kiu senhezite faris decidon kaj rapide translokis la loĝantojn al sekura loko. Tamen la transloko ne estis facila, precipe iuj maljunuloj loĝis tie dekojn da jaroj, preskaŭ ĉiutage aŭdis la ŝtonruliĝon, ne kredis, ke okazos montoglitado, kaj neniel volis forlasi sian hejmon.

Dank' al pacienca admonado de la kadroj, la loĝantoj plejparte forlasis la danĝeran lokon. La urĝa situacio postulis senprokrastan agadon. La nekonvinkitajn loĝantojn oni devis surdorse aŭ vekte porti al sekura loko. Nokte de la 10-a pluvegis torente, pa-

trolantoj trovis malfortan lamplumon kaj tuj rapidis tien por certigi pri la afero. En la domo ili trovis paralizitan maljunulinon, kiu ne volis forlasi sian hejmon. La patrolantoj vektportis ŝin al sekura loko per simpla brankardo farita el ligna ŝtuparo kun koton-remburita litkovrilo sur ĝi. Poste, ili refoje traserĉis la pli ol 1 500 ĉambrojn de la urbeto kaj forlasis la danĝeran lokon.

La 1 371 loĝantoj de la urbeto senescepte translokiĝis al sekura loko. La najbaraj institucioj, kastroj kaj loĝantoj cedis siajn oficĉambrojn kaj loĝejojn al la plagitaj loĝantoj. Ili ĉiuj ricevis provizoran loĝejon kaj diversajn ĉiutagajn bezonaĵojn donitajn de la ŝtato. Post la terŝoviĝo la maljunuloj, kiuj siatempe ne volis forlasi la hejmon, esprimis sinceran dankon al la sciencistoj pro ilia preciza informo kaj petis ke la ŝtato ilin premiu.

## NUNAJ ĈINOJ

# LI AMAS KOKOBREDADON

de GANG ĈINGGEN

En Ljaŭning-provinco, nordorienta Ĉinio, estas fama kokobreda servokompanio, kiu, kvankam negranda, estas bazloko de centoj da kokobredaj familioj de la norda parto de la provinco. La plej novaj kokobredaj teknikoj kaj kurzo-informoj interfluas tie. La servokompanio estis fondita de la 27-jara kokobredisto Ĝaŭ Ping.

Nun Ĝaŭ Ping jam fariĝis direktoro de la servokompanio, kiu ĉiumonate gajnis pli ol 10 000 jŭanojn da profito. Por bredi pli da bonaj kokoj, li sen-

ĉese serĉis novan sperton kaj elhakis brilan vojon en malfavoraj kondiĉoj.

La patro de Ĝaŭ Ping en sia juneco diplomitiĝis en brutobreda kaj brutokuraca lernejo kaj estis fama loka specialisto pri brutoj. Influate de sia patro, Ĝaŭ Ping jam en la infaneco ekŝatis brutojn kaj lernis de sia patro sciojn pri bestokuracado. Tiam la vilaĝanoj ofte petis lian patron kuraci iliajn brutojn. Kelkfoje lia patro ne estis en la hejmo, li do kun kuracaj instrumentoj eliris por doni helpon al

la vilaĝanoj, tial ili nomis lin "malgranda veterinaro".

Post kiam li finis la mezlernejan studon en 1977, li vere fariĝis bestokuracisto de la vilaĝo. Poste li estis sendita labori en la bestokuraca stacio de la subdistrikto. La profesio estis kontentiga kaj la vivkondiĉo komforta. Kial li intencis fondi la kokobredan servokompanion? Tion oni devas rakonti dekomence.

Iun tagon de 1983, en la vilaĝo okazis kokoepidemo. Malantaŭe de la bestokuraca stacio



*Gaŭ Ping telefonas pri kokobredado.*

loĝis maljuna kamparano nomata Ĵong Ĵuecaj. Plejparto de liaj 120 kokoj mortis en unu tagnokto. Pro tio maljunulo ege malĝojiĝis. Antaŭ la larmanta maljunulo Gaŭ Ping tre maltrankvilis kaj pensis en si: mi estas teknikisto pri brutoj, sed ne povas garantii la vivon de la kortobirdoj de la vilaĝanoj. Propraokule mi vidis ilian grandan perdon, kiel honta mi estas!

Tiam Gaŭ Ping laboris en la bestokuraca stacio kiel kontisto, statistikisto, epidemi-preventisto kaj gardanto de medikamentoj,

kaj pro tio li ne povis zorgi pri la kokobredado de la vilaĝanoj. La maltrankvilo kaj ĉagreno kreskigis ĉe li ideon fondi kokobredan servokompanion.

Tamen lia propono tuj ricevis oponon de multaj homoj. Liaj estroj kaj kolegoj ne komprenis lin kaj liaj gepatroj kaj edzino ne subtenis lin. Foje lia patro iris al la nordorienta parto de Ljaŭning-provinco por disvolvi la kokobredadon en la hejmloko. Sed pluraj repuŝoj deprimis lin. Neatendite, lia ununura filo volis

*Gaŭ Ping kaj specialigita kokobredisto interŝanĝas opiniojn por pli bone bredi kokojn.*



sekvi lian vojon. Por fari kokobredadon, oni devas elteni grandajn malfacilojn kaj tamen ne estas certa pri sukceso. La maljunulo maltrankviliĝis, flamiĝis kaj malhelpis. Ankaŭ la edzino de Gaŭ Ping opiniis, ke li estas malprudenta, kaj kolere revenis kun la infano al la hejmo de sia patrino.

Malgraŭ tio, Gaŭ Ping ekloĝis sola en kokobredejo, hejtis fornon, pendigis la ŝildon de la kokobreda servokompanio kaj komencis sian aferon.

Post nelonge li renkontis malfacilan problemon, ke multaj kamparanoj ne kredis sciencan kokobredan metodon. Foje li iris kun vakcino al la hejmo de iu kamparano por senpage kuraci liajn kokojn. Li estis rifuzita. Li ankaŭ vidis, ke 300 kokoj bredataj de alia familio ĉiutage demetas nur 60 ovojn pro nekonvena nutrado kaj la familio ne povis kovri la bredkoston. Pro tio Gaŭ Ping tre ĉagreniĝis.

Kiamaniere kredigi sciencojn al la vilaĝanoj? Post pripensado Gaŭ Ping donis tri garantiojn en kunveno de la vilaĝanoj, ke, unue, se okazos epidemio al la kokoj, al kiuj estis injektita la vakcino de lia servokompanio, ekzamenita de la gubernia bestokuraca stacio, lia servokompanio volantas laŭ la merkata prezo kompensi 50% de la perdoj de la kokobredaj familioj; due, se ovojn demetas malpli ol 70% de la kokoj nutritaj per la furaĝoj de lia servokompanio, do la servokompanio volantas kompensi ĉiujn perdojn; trie, la servokompanio laŭ la merkata prezo aĉetos kaj vendos kokojn kaj ovojn.

La tri garantioj vekis grandan eŝion de la kamparanoj. Ili tre miris, ke la servokompanio sen-



page preventos koko-epidemion. Ĝaŭ Ping havis grandan certecon. En la lastaj jaroj li studis ĉiujn kursojn de la brutobreda kaj brutokuraca kolegio, konsultis multajn kokobredajn librojn, lernis instruan materialon de usona kokobreda specialisto kaj faris rilatajn eksperimentojn. Gvidate de la scienca teorio, li esploris la tutan procezon de koko-epidemia prevento kaj akiris sukceson. La Furaĝa Kompanio de Ĝingou konstatis, ke lia furaĝo n-ro 150 por kokidoj kaj lia furaĝo n-ro 136 por maturaj estas science preparitaj kaj rimarkinde efikaj.

La tri garantioj trankviligis la kokobredistojn. Ĝis la dua tagdeko de aprilo 1985 li injektis vakcinon al 110 000 kokoj. Post unu jaro ili restis tre sanaj. Li jam vendis pli ol 350 tunojn da furaĝoj preparitaj de li. Ĉiujare pli ol 75% de la kokoj nutritaj per liaj furaĝoj demetis ovojn. La 300 kokoj bredataj de la supre menciita kamparana familio povis ĉiutage demeti pli ol 200 ovojn post nutrado per liaj furaĝoj.

Post tio la kokobreda servokompanio rapide famiĝis. Tre multaj kamparanoj venis tien por mendi liajn ovojn kaj furaĝojn kaj deziris lerni liajn kokobredajn metodojn. Iu kamparana kultivejo unufoje mendis liajn 30 000 vakcinitajn ovojn. Antaŭe la kamparanoj estis maltrankvilaj en kokobredado pro koko-epidemia. Nun ili trankvile bredas siajn kokojn. Oni humure diris: "Ni havas fidindan asekuran kompanion."

Eble oni pensis, ke Ĝaŭ Ping multe profitis el la prevento de koko-epidemia. Fakte li povis nur ricevi tiom, kiom la investita sumo. Li ankaŭ senpage servis al la malriĉaj familioj.

Sciencoj pli kaj pli akcelis la aferon de Ĝaŭ Ping. Li faris eksperimentojn pri kovado en printempo anstataŭ en aŭtuno, pri varmokonservo per plasta membrano por stabiligi la ovodemetan procenton kaj pri hibridigo de fremdlandaj kaj lokaj kokoj, kaj verkis la libron "Kokobredado de Specialigitaj Fami-

lioj" kun 50 000 ĉinaj ideografiaĵoj, kio estis atentata kaj laŭdata de fakuloj.

La senĉesa disvolviĝo de la afero de Ĝaŭ Ping komprenigis multajn homojn. Vidinte, ke la politiko de la ŝtato por la kamparo favoras lian aferon, lia patro venis al li por doni konsilojn. Ankaŭ lia edzino fariĝis lia bona helpanto en kokobredado.

La celo de Ĝaŭ Ping estas helpi kamparanojn ŝanĝi tradiciajn metodojn de entreprenado, posedi avangardan teknikon kaj fariĝi novtipaj kamparanoj, kiuj scipovas administradon. En la lasta jaro li fondis pli ol 20 kokobredajn kursojn, en kiuj lernis pli ol 2 500 kamparanoj. Kiam iuj junuloj superis lin kvante kaj kvalite en kokobredado, li do iris gratuli ilin kaj modeste lerni de ili.

En 1985 Ĝaŭ Ping estis elektita kiel pioniro de la Nova Longa Marŝo de la lando. Tamen li ne fieris pro tio, li daŭre strebas por multe kontribui al la popolo.

(Daŭrigo de p. 14)

riparado kaj popularigo de scioj pri elektra aparato, maŝino k.a. kaj helpas ilin disvolvi la terciaran industrion. Ekz. Tjanĝin havigis laboron al 4 800 junuloj, sen peti monhelpon de la ŝtato. En 1979-1984 51 000 000 junuloj en la ĉinaj urboj ricevis okupon, tiel fundamente solviĝis la problemo de senlaboreco de junuloj.

3. Gvidi kaj helpi junulojn solvi la problemojn de amafero, geedziĝo kaj familia vivo. Kun subteno de la registaro kaj diversaj sociaj rondoj, ni organizis balon, koncerton, vojaĝon, amuzkunvenon kaj svatagentejon, por ke gejunuloj interkonatiĝu, havu ĝustan vidpunkton de geedziĝo kaj batalu kontraŭ interveno en ilian geedziĝon kaj

kontraŭ diskriminacio, mistraktado kaj turmentado al junulinoj.

4. Organizati sanajn kaj utilajn aktivadojn de kulturo kaj sporto post la laborado por riĉigi la vivon de junuloj kaj plivastigi arenon por ilia agado. En Ĉinio estas pli ol 600 geknabaj kaj junularaj domoj konstruitaj per ŝtata subvencio. Ĉio tio helpas larĝigi la vidkampon, ekspluati la inteligentecon kaj altigi la kulturnivelon.

Krome, nia registaro defendas, laŭ la konstitucio, la leĝajn rajtojn de la junuloj per la forto de porjunulaj organizoj kaj diversaj institucioj, malhelpas ĉiajn agojn atencantajn la spiriton, saĝon kaj interesojn de la junuloj kaj punas per leĝo grandajn malbonfarantojn.



*Liū Jandong (dekstre), prezidanto de la Ĉina Junulara Federacio, manpremas la estron de la Franca Junula Delegacio.*

*De la 11-a ĝis la 20-a de julio la Franca Junula Delegacio el 438 membroj vojaĝis en Pekino. Ili vizitis la Imperiestran Palacon, la Pekinan Universitaton, la Grandan Muron kaj pasigis dek agrablajn tagojn kune kun lokaj junuloj.*


*Kun ĉina aktorino Ŝjaŭ Ŝjong (dekstre)*



*Ĝojo akompanas dulandajn junulojn.*

# RENKONTIĜO DE ĈINAJ KAJ FRANCAJ JUNULOJ

Fotoj de ĈEN ZONGLJE kaj ĜANG ĜINGDE










*Dancado en vespero*

*La francaj gastoj ĝuas programeron en la Ĉefurba Ŝtala Kompanio.*



*En la Imperiestra Palaco*

*Franca junulo faras pentraĵon sur la Granda Muro.*



# RENKONTIĜO DE ĈINAJ KAJ KOREAJ JUNULOJ

Fotoj de LI ŜUANDE

*Laŭ invito de la Centra Komitato de la Komunisma Junulara Ligo de Ĉinio, la 500-membra Amika Vizitgrupo de Junuloj de la Korea Demokratia Popola Respubliko vojaĝis en Ĉinio 14 tagojn ekde la 13-a de aŭgusto. La koreaj gastoj havis gajan aktivadon kun ĉinaj junuloj kaj vizitis fabrikojn, vilaĝojn, vendejojn, lernejojn, loĝkvartalojn, konstruejojn, kulturajn organizojn, centrojn por geknaba aktivado kaj historiajn sanktejojn en 12 urboj. Ĉie ili estis bone akceptataj.*



*Amika renkontiĝo*





*Liŭ Jandong (meze), sekretariino de la Centra Komitato de la Komunisma Junulara Ligo de Ĉinio, interparolas kun la estro de la vizitgrupo.*



*Ĉina junulino kaj korea junulo reciprokas donacojn.*



*En la Pekina Centro por Geknaba Aktivado*



*Koreaj junuloj bonvenigataj en Ĉinio*



*En la Imperiestra Palaco*

# PIONIRO PRETIGANTA SILKAN KAJ PORCELANAN MARVOJON

— Memore al la 580-jara Datreveno de la Ekspedicioj de Ĝeng He



*La portreto de Ĝeng He*

En la unua duono de la 15-a jarcento okazis granda evento en la monda marnaviga historio, t.e. Ĝeng He, kiel sendito de Ming-imperio (1368 — 1644 p.K.), gvidis grandan floton sepfoje al la Okcidento en 28 jaroj kaj vizitis pli ol 30 aziajn kaj afrikajn landojn, kiuj situis en Hindia Oceano, kaj ĉe la marbordoj okcidente de la Suda Ĉina Maro. La lasta ekspedicio de Ĝeng He okazis en 1433, je duonjarcento pli frue ol la nova trovo de la mondfamaj marnavigistoj Cristoforo Colombo kaj Vasco de Gama pri la nova naviglinio.

Ĝeng He estis alinomata Sanbaŭ. Lia patro estis islamano kaj

ofte rakontis, kiel li siatempe transpasis marojn al Mekko por pilgrimi al la sanktejo. Ĝeng He en la infanaĝo jam forte aspiris al la misteraj maroj kaj fremdaj pejzaĝoj. Estis malfeliĉe, ke frue mortis lia patro. 12-jara Ĝeng He estis kaptita de armeo de Ming-imperio en milito kaj poste fariĝis eŭnuko ĉe la kvara princo Ĝu Di. Tiu lasta kaptis la regpotencon de Ming-imperio en milita ŝtatorenverso kaj fariĝis imperiestro (1403 — 1424 p.K. en trono). Ĝeng He do estis promociita al ĉefeŭnuko pro siaj militaj meritoj.

Ĝu Di estis talenta kaj ambicia imperiestro. Nelonge post sia surtroniĝo li abolis la malpermeson pri mara navigacio kaj decidis sendi Ĝeng He kiel diplomaton al la najbaraj landoj por restarigi kaj disvolvi amikajn rilatojn kaj fari negocon kun ili, kaj samtempe altigi sian internacian reputacion.

Ĝeng He kun plezuro akceptis la taskon kaj aktive faris preparon. Li organizis floton el pli ol 200 marŝipoj kun pli ol 27 000

personoj. La plej grandaj ŝipoj ĉiu estis ĉ. 147 metrojn longa, 60 metrojn larĝa kaj kun 9 mastoj, 12 veloj kaj ŝarĝkapacito de mil tunoj. Krom sufiĉe da greno, dolĉakvo, salo, sojfabo saŭco, teo, alkoholaĵo, kuiroleo, kandeloj, brulaĵo, karbo kaj aliaj ĉiutagaj bezonaĵoj, la ŝipoj portis ankaŭ donacojn, kuprajn monerojn, silkaĵojn, brokatojn, porcelanaĵojn kaj aliajn varojn. En la floto ankoraŭ servis nombro da fakuloj, inter kiuj estis fakuloj de kompasoj, fremdaj pilotoj, direktilistoj, arkaj, sagaj kaj pafilaj riparistoj, lignaĵistoj kaj feraĵistoj, interpretistoj, traktaj fakuloj, ĉefmaristoj, kuracistoj, kuiristoj k.a. La maristoj plejparte estis ŝipanoj spertaj en navigacio el marbordaj regionoj de la provincoj Fuĝjan, Ĝeĝjang kaj Gŭangdong.

La 11-a de julio, 1405 estis serena tago. En tamburado kaj fajfado la floto komandata de Ĝeng He ekveturis de la haveno Liŭĝjagang (la nuna urbeto Liŭhe, Tajcang-gubernio de Suĝoŭ) rekte al Ĝanceng (en la nuna suda Vjetnamio). Poste trapasin-

*Skema mapo pri veturo de la ĉina ŝip-floto tra la Hinda Oceano, konservata en la nacia muzeo de Tanzanio*





te Surabaya de Java al la haveno Balembang sude de Sumatro, ĝi atingis Mancigja (la nuna Malako) en la okcidenta bordo de Malaja Duoninsulo. Tie Ĝeng He konstruigis staplojn kaj garnizonejojn. Post iom da ripozo ĝi ekveturis al la regno Sumatrio norde de Sumatro, okcidenten al Cejlona Monto (la nuna Cejlona Insulo). Kaj preterveturinte la sudan ekstremon de la Hinda Duoninsulo, ĝi sin turnis norden al Gelan (en la nuna sudokcidenta marbordo de Hindio), Koĉin kaj Guli (en la nuna sudokcidenta bordo de Hindio). Fine en aŭtuno de 1407 ĝi revenis al Ĉinio.

Ĝeng-He sep-foje ŝipveturis al la Okcidento kaj atingis pli ol 30 landojn kaj marbordajn regionojn de la Sudorienta Azio, Hindia Oceano kaj la orienta Afriko. Lia lasta ekspedicio okazis en 1432. Ĉi-foje lia floto veturis plej malproksimen kaj trapasis plej multajn landojn. La floto ekveturis de Long'uan de Ŝjaguan, Nankino. Atinginte Guli, li sendis grupeton al Mekko por pilgrimado kaj revenis al la patrolando en 1433. Tiam li jam estis 63-jara kaj baldaŭ forpasis.

Dum la navigado Ĝeng He aplikis stelo-observan metodon por gvidi noktan navigadon, difinis la orientiĝon per akva kompasoj kaj faris konvenan aranĝon por konservi dolĉakvon, stabiligi la ŝipojn, preventi ŝipan dronadon ktp. Tial la floto sukcese ve-

turis tage kaj nokte kaj malofte suferis neatenditajn averiojn eĉ en ondantaj maroj. En la praktiko Ĝeng He iom post iom konis la leĝon de fluso, musono, oceana fluo k.a., faris detalajn markojn, registradon kaj desegnadon pri ekvetura tempo, ankrojo, rifo kaj malprofundaĵo, fine li plenumis la famkonatajn verkojn "Navigacia Mapo" kaj "Kompase Mezura Mapo" (jam perdita), kio multe kontribuis al la mara geografio de la mondo. Ankaŭ liaj interpretistoj Ma Huan, Fej Ŝin kaj Gong Ĝen faris verkojn pri navigacio, moroj, montoj kaj riveroj de la vizititaj landoj kaj produktado, vivo de tieaj loĝantoj. Tiuj ĉi verkoj antaŭ longe estis tradukitaj en alilandajn lingvojn kaj eldonitaj kaj fariĝis valoraj materialoj por la ĉinaj kaj fremdlandaj instruituloj en esplorado de marnavigacio, historio kaj geografio de la koncernaj landoj.

Ĝeng He kiel diplomato kaj komerca delegito de Ming-imperio faris al la reĝoj, tribestroj de la vizititaj landoj valoran donacon kaj esprimis al ili sian amikecon. Dank' al la interkonsento de ambaŭ flankoj ili faris negocon de reciproka profito. La floto interŝanĝis oron, arĝenton, mone-rojn, silkaĵojn, porcelanaĵojn k.a. kontraŭ specialaj lokaj produktaĵoj kaj metiartaĵoj de diversaj landoj kiaj eburo, tinkturo, parfumo, pipro, sulfuro, gemoj k.a.

Ĝeng He plurfoje gvidis la ekspedicion al la Okcidento kaj starigis pacan kaj amikecan rilaton kun multaj aziaj kaj afrikaj landoj. La reĝoj kaj tribestroj de multaj landoj ne nur solene akceptis la ĉinan floton, sed ankaŭ sendis delegitojn viziti Ĉinion per la revenantaj ŝipoj de Ĝeng He. Ekz., la reĝoj de Mancigja kaj Brunejo vizitis Ĉinion. Per la 6-a ekspedicio en 1423 pli ol 1200 senditoj kaj komercistoj de pluraj landoj venis al Nankino (ĉefurbo de Ming-dinastio en la komenco). Tiam pli multaj ĉinoj transloĝiĝis eksterlanden. Ili dise loĝis en la Suda Azio, funkciiis kiel pioniraj ekspluatantoj de la regiono kaj faris siajn kontribuojn al disvolviĝo kaj prosperiĝo de tiuj lokoj.

Por memori pri la elstaraj atingoj faritaj de Ĝeng He, oni nomis iujn lokojn kaj famajn historiajn vidindejojn per lia nomo, ekz., la urbo Sampo (t.e. Sanbaŭ) kaj puto Sampo en Malako, Semarang (ankaŭ signifas Sanbaŭ) en Javo, templo Sampo kaj pago-do Sampo en Tajlando. En Srilankao ĝis nun ankoraŭ konserviĝis platŝtono starigita de Ĝeng He per la de li donacita mono al Budhisma templo.

La 11-a de julio ĉi-jare estis la 580-a datreveno de la ekspedicioj de Ĝeng He, la koncernaj departementoj kaj instruituloj, specialistoj kaj profesoroj de navigacio, historio, kulturo solene okazigis kunvenon en Nankino, kie Ĝeng He longe vivis, por memori pri tiu granda marnavigisto. Oni kompilis kaj eldonis librojn pri la ekspedicioj de Ĝeng He, konstruis memorhalon pri Ĝeng He, faris akademiajn diskutojn kaj aliajn aktivadojn. La Centra Televida Stacio de Ĉinio dissendis la televidan filmoserion "Ekspedicioj de Ĝeng He".



*La puto Sampo fosita de membroj de la floto gvidata de Ĝeng He post ilia alveno al Malako*

# VIZITO AL LIĜJANG ĈE JULONG-MONTARO

Hengdŭan-montaro en la okcidenta parto de la Junnan-a Altebenaĵo famas pro siaj groteskeco kaj kruteco kaj multeco de valoj, torentoj kaj pitoreskaj ebenaĵoj, kie loĝas diversaj nacimalplimultoj. Eble pro malfacila trafiko la nacimalplimultoj nun ankoraŭ konservas antikvajn morojn.

La neĝkovrita Julong-montaro en okcidenta Junnan-provinco, havanta dek du montpintojn, serpentas en norda-suda direkto, kun longeco de 35 km. Ĝia ĉefa pinto Ventumila Krutaĵo altas 5 596 m. super la marnivelo. Rigardate de malproksime, la montaro aspektas kiel jada drako kuŝanta en nuboj. La Ventumila Krutaĵo blanke vestita ŝajnas vualita knabino.

## VIDAĴO DE LIĜJANG

En la templo Jufeng sur Julong-montaro dekkelkajn km. okcidente de la urbo estas kame-lio-reĝo, kiu donas pli ol dek mil florojn jare kaj ĉiam allogas la turistojn.

De la unuaj tagoj de februaro ĝis la komenco de majo la kame-lio floras pli ol dudek fojojn, disvolvante sume 20 000-30 000 florojn en jaro. La arbokrono kiel ombrelo donas sian ombron al la tuta templo. La rozkoloraj floroj en grandeco de manplato, havas po naŭ stamenojn kaj dek ok petalojn. Maljuna lamao de la templo diris, ke en 1711, kiam la templo estis ekkonstruita, la arbo jam fariĝis granda. Tial oni tak-

sas, ke ĝi travivis almenaŭ 400 jarojn.

Liĝjang estas antikva urbo konstruita en la dektria jarcento. Kiam Kublaj-Ĥano (1215-1294), la unua imperiestro de Ĵŭan-dinastio, faris suden-ekspedicion, lia armeo kampadis tie, konstruis trejnejojn kaj tenejojn de provianto. En la centro de la urbo estas malgranda placo, de kie etendiĝas kvar stratoj, kiuj interligiĝas per multaj stratetoj kaj ŝtonaj pontoj. La klara akvo de la fonto Hejlongtan trafluas la urbon de okcidente orienten. Ŝin-hŭa-strato, pavimita per ŝtonplatoj, estas borderita per antikvecaj lignaj etaĝdomoj kaj butikoj. Tie mi aŭdis marteladon de kupraj objektoj, kiel seruroj, sonoriloj, skatoloj kaj aliaj ornamaĵoj. Naŝi-aj virinoj, sidante antaŭ sia domo, brodas pasamentojn kaj aliajn garnaĵojn de vesto.

*La Kvinfeniksa Domo en Liĝjang*



La placo nun fariĝis vigla komerca centro. Naŝi-oj, ĵi-oj kaj baj-oj loĝantaj en la proksimeco portis tien per dorso, vekto aŭ ĉaro siajn legomojn, fruktojn, drogherbojn kaj aliajn montajn produktaĵojn. Iuj kolportistoj vendis diversajn kostumojn, kiuj estas produktitaj de Ŝanhajo, Kantono, Kunming kaj aliaj urboj kaj ne malpli belaj ol tiuj furorantaj en Pekino. La placo estas ĉirkaŭita de diversaj butikoj vendantaj porproduktajn ilojn kaj industriajn produktaĵojn, kiel televidiloj, magnetofonoj kaj





*Julong-montaro en malproksimo*



*Kamelifloroj*

aliaj hejmaj elektraĵoj. Manĝaĵ-vendejoj viciĝas unu apud alia. Ili servas klientojn per bongustaj rizvermiĉeloj, vaporumitaj farĉitaj farunaĵoj kaj frititaj pastaĵoj.

### **LOKO DENSE LOĜATA DE NAŜI-OJ**

En Liĝjang loĝas 150 000 el la 230 000 naŝi-oj de Ĉinio.

Naŝi-nacieco navas longan historion. Ĝi travivis longan transiran periodon de la matriarka socio al la patriarka kaj spertis la ŝanĝiĝon de la primitiva socio al la sklava eble en la tria jarcento. De la dektria jarcento ĝi evoluis al la feŭda socio. Sed pro la mal-ekvilibro de sociaj evoluoj nun ankoraŭ restas postsignoj de la matriarka socio. En la longa historia evoluo la naŝi-oj kreis sian riĉan kulturon. Antaŭ pli ol mil jaroj jam aperis ilia Dongba-lingvo el ideogramoj. Kaj per ĝi oni notis multajn belajn popolajn legendojn kaj poemojn. Dongba-sutro, religia klasikaĵo de la naŝi-oj, registris diversajn flankojn de la socia vivo de la antikvaj naŝi-oj, tial ĝi estas valora materialo por studi la skriban lingvon, historion kaj religion de la naŝi-oj. (Dongba-religio estas politeismo, kiu rigardas kiel diojn la naturajn

fenomenojn kaj objektojn.) La popolkantoj de naŝi-oj prikantas belajn pejzaĝojn de Julong-montaro kaj Ĝinŝa-rivero kaj iliajn laboron kaj amon. Ankaŭ tre riĉa estas la folkloro de la naŝi-oj. Post la Liberiĝo ili eldonis la epopeon "La Deveno de Naŝi-nacieco", "La Literatura Historio de Naŝi-nacieco" kaj aliajn librojn.

La arkitekturo, skulpturo kaj pentrarto de la naŝi-oj havas sufiĉe altan nivelon. Ili sorbis tradiciajn stilojn de la han-oj kaj tibetanoj kaj portas originalan lokan karakteron. Tia estas la fama Kvinfeniksa Turo konstruita en 1601. Antaŭe ĝi staris sur monto 15 km. norde de Liĝjang kaj poste translokiĝis en la parkon Hejlongtan. La turo altas je dudek metroj, kun tri tegmentoj unu super alia, 24 suprenlevitaj tegmentanguloj kaj 32 kolonoj. Ĝiaj skulptaĵoj kaj pentraĵoj havas budhisman kaj taoisman stilojn.


La naŝi-aj virinoj sin vestas per grandmanika kostumo, bunta veŝto, plisita antaŭtuko, pantalono kaj ŝafleda ŝalo. Meze de la ŝalo estas bele broditaj sep steloj kaj ĉe ĝiaj du randoj — suno kaj luno, kiuj simbolas laboremon. La viroj vestas sin preskaŭ same kiel la han-oj.

### **VIRINA LANDO ĈE LUGU-LAGO**

Lugu-lago pli ol cent km. for de Liĝjang estas natura altebenaĵa lago, kiu altas je 2 700 m. super la marnivelo, kun areo de pli ol cent kvadrataj kilometroj. Ĝi situas ĉe la limo inter Junnankaj Siĉŭan-provincoj. En la gubernio Jongning okcidente de la lago troviĝas iuj naŝi-aj familioj, kiuj vivas ankoraŭ laŭ la matriarka klana sistemo. Tie patrino ĝuas la plej altan aŭtoritaton kaj en sia hejmo kaj en la socio. La posedaĵon de la familio heredas virinoj. Oni aranĝas genealogion de virinoj. Konforme al tio, oni praktikas primitivan geedziĝan sistemon. Tie la virinoj ne edziniĝas kaj viroj ne edziĝas. La geamantoj loĝas respektive en sia patrino hejmo. La viro tranoktas ĉe sia amatino kaj revenas al sia patrino hejmo la sekvantan matenon. Estas nenia ceremonio por tia geedziĝo. Se geviroj amas unu la alian, ili povas vivi kune.

Oni ofte vidas, ke grupoj da gejunuloj, renkontiĝinte survoje, fajfas kaj kantas por esprimi sian amon.

Junulo kantas: "Mi estas bovlakto kaj vi — fontakvo. Ili povas sin miksi." Tio signifas, ke la



*Naŝi-aj knabinoj*

junulo volas fariĝi kunvivanto de la junulino. Se ne, li do kantas: "Du floroj belaj floras sur du malsamaj arboj, sed oni ne povas kunmeti ilin." Kaj junulino kantas: "Ora kaj arĝenta kokoj estas

kokoj, sed unu kun longa vosto kaj la alia kun mallonga." Post tio ili disiĝas.

Tage virinoj sin okupas pri terkulturo kaj ŝpinado, teksado kaj bredado de kokoj en publika loko. Vespermanĝinte, ili revenas al sia propra loĝejo kaj atendas sian amaton.

La unuafoje venintaj amatoj estas kondukataj de siaj amatinoj en domon. Iuj geamantoj devas alterne kanti amkantojn kiel jene:

**Viro:** Mi faris longan ĉirkaŭiradon apud viaj suda kaj norda ĉambroj. Kuloj forte pikas, amatinon mi ankoraŭ ne vidis.

**Virino:** Amato kara, mia patrino ankoraŭ ne endormiĝis, ne faru bruon, atendante en la korto.


**Viro:** Kuloj pikas, hundoj boas. Mi ne plu eltenos.

**Virino:** Do eniru en la dormejon, senbrue kaj silente.

Poste se unu el ili ne volas daŭrigi la kunvivadon, li (aŭ ŝi) povas libere ĉesigi tian vivon. La gefiloj apartenas al sia patriino. Ili scias nur siajn onklojn de la patrino flanko, sed ne sian propran patron. En sia tuta vivo gefiloj povas havi dekojn ĝis centon da kunvivantoj.

Nun, kun la apero de la fenomenoj de geedziĝo, adopto kaj loĝigo de edzo en la hejmo de edzino, malaperis la pure matriarka sistemo en la matriarkaj vilaĝoj. Naskiĝis koncepto pri patriarkeco kaj aperis patriarkaj familioj. Kaj tie nun ekzistas miksa vilaĝoj de patriarkeco kaj matriarkeco.

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO




1. Pekino
2. Kunming
3. Liĝjang
4. Ŭenĝou
5. Harbin
6. Lhasa
7. Kantono
8. Conghŭa
9. Ĝjanhe
10. Ŝjan
11. Tajĉang
12. Ŝjilingŝja



# HARBIN, URBO POR SOMERUMADO KAJ VINTRA EKSKURSO

de ĈEN ĜJANPING\*



Harbin en nordorienta Ĉinio estas fama pro siaj ĉarmaj pejzaĝoj kaj bona klimato. Ĝi estas ideala loko por somerumi kaj rigardi vintrajn vidaĵojn. Pro tio oni nomas ĝin Glacia Urbo kaj Perlo sub Cigna Kolo. Ĝuante ĝiajn belaĵojn, vi trovos, ke ĝi meritas tian laŭdon.

Se vi rigardos Harbin somere en aviadilo, vi vidos ĝin sur vasta kampo kvazaŭ perlon sur verda veluro.

Multaj pitoreskejoj en la urbo povas plezurigi vin.

La parko Stalin, la plej longa ĉrivera parko en Ĉinio, situas sude de Songhŭa-rivero en la urbo, kun areo de dek hektaroj. En la parko buntas floroj, balanciĝas plorsalikoj kaj inter ili bele pozas diversaj vivoveraj statuoj artisme faritaj. Promenante tie, vi sentos agrablan malvarmetan venton kaj havos belan ĝuon. Tie servas restoracio en klasika rusa stilo apud la rivero kaj klubo etendiĝanta duone al la akvo.

Apud la rivero imponas la Kontraŭinunda Monumento, kiu atestas la forton de la popolo de la urbo batalanta kontraŭ la naturo.

La insulo Suno, pitoreska parko bone konata de multaj ĉinaj kaj alilandaj turistoj, estas sabla insulo kun areo de ĉirkaŭ 1 960 hektaroj. Ĝi troviĝas ĉe la norda flanko en Songhŭa-rivero, vid-alvide al la movoplana urbo en la sudo. Ĝi estas abunda je arboj, herboj kaj floroj. Sanatorioj de diversaj stiloj kuŝas en verdaj arbaroj. Tre kvietaj vidiĝas antikvecaj restoracioj, laŭboj kaj kioskoj sub la lazura ĉielo kaj apud la verda akvo. La plaĝo de la insulo kun flaveta sablo kaj pura akvo estas ideala naĝejo.

En ĉiu varma somera tago la insulo akceptas pli ol 200 000 turistojn. Super ĝia larĝa ringa bordo ne mankas ilia gaja rido. Naĝantoj portas diverskolorajn vestojn. En malproksimo ili aspektas kiel bunta borderaĵo de la insulo.

Tiu parko havas ankaŭ la pejzaĝon "Akva Pavilono en Nubaro", kiun oni nomas ĝardeno en parko. Estas alloga la akva kurteno antaŭ kaverno de la monto "Suno" en la ĝardeno. Trembrilas la lago "Suno", glata kiel spegulo. Sur la teraso de kvadrata kiosko pli ol dek metrojn super la lago, oni havas panoraman vidon al la belaĵoj de la insulo. La ondetanta Songhŭa-rivero fluas de okcidente orienten. Geamantoj boatas en la rivero, kaj zefiro disportas ilian kanton "Sur la Bela Insulo Suno". La pentrinda bildo certe ravis vin kaj forgesigos al vi hejmenrevenon.

Ĉiu gasto en Harbin volas viziti la Infanan Parkon en originala stilo, kun areo de 17 hektaroj. La parko estas ekipita per diversaj porinfanaj amuziloj, kiel malgranda trajno, elektraj aviadiloj, kosmoŝipoj, raketoj al la luno

\* La aŭtoro estas laboranto de la Turisma Servo de Hejlongĝiang-provinco en nordorienta Ĉinio.



*La hotelo Cigno por turistoj*

kaj runde kurantaj ĉevaloj. La malgranda trajno estas plej bona al la infanoj. Kun dizela lokomotivo kaj sep vagonoj, ĝi kuras sur du kilometrojn longa fervojo. Ĝi povas veturigi pli ol 300 pasaĝerojn unufoje. La loko vere estas lando de infanoj: La lokomotivisto, la trajnestro, la konduktoj, la trajna policano, la staciestroj kaj la interpretistoj, ĉiuj estas lernantoj sub la 13-jara aĝo. Se vi estos en tiu mondo de infanoj kaj partoprenos en ilia ĝojo, vi ricevos la impreson, ke

la trajno reportas vin en la infanan tempon kaj vi multe rejuniĝas.

Estas bela ne nur la somero de Harbin, sed ankaŭ ĝia vintro. Vintre turistoj de diversaj landoj vojaĝas al la glacia urbo kaj vidas ĝin blanke vestita. Kvietiĝas Songhŭa-rivero. Ĝi silente preterfluas la urbon kaj ekdormas dolĉe sub mola neĝa kovro.

Tamen la frosta vintro ne povas silentigi la urbon. Kun gajaj glaciaj aktivadoj la urbo eniras en alian oran sezonon. La ĉefaj glaciaj aktivadoj estas velado, sledado, sketado, spektado al vintra naĝado kaj vizito al ĝardeno de glaciaj lanternoj.

Tiu lasta estas unu el la plej karakterizaj aktivadoj en la glacia urbo. Glacia lanterno estas tradicia formo de arto propra al norda Ĉinio. Oni lerte skulptas dometojn kaj pejzaĝojn el natura glacio, ornamitajn per koloraj lampoj. La skulptaĵoj formas apartajn glaciajn vidaĵojn. Laŭdire, en la antikva tempo ĉevalisto uzis glacian lanternon por nokta lumigado. Sed nun oni prenas glaciajn blokojn el Songhŭa-

rivero, ĉiu kun pezo de unu tuno, por fari glaciajn lanternojn. El la lertaj manoj de artistoj aperas tiaj aŭ aliaj plaĉaj glaciaj verkoj. En Ĝaŭlin-parko de la urbo viglas aktivado de glacia arto. Tie turistoj sentas sin kiel ŝvebantaj feoj en kristala palaco. La glaciaj lanternoj de Harbin estas granda mirindaĵo en norda Ĉinio.

10-foje de post 1963 oni aranĝis ĝardenon de glaciaj lanternoj. Pasintjare oni karakterizis kiel Feston de Glacio la vintran glacian aktivadon okazantan unufoje ĉiujare. La festo daŭras unu monaton ekde la 5-a de la unua monato laŭ la ĉina luna kalendaro. Hodiaŭ la glacia aktivado en Harbin fariĝas pli kaj pli fama en kaj ekster la lando kaj ĉiujare altiras multajn vizitantojn de diversaj partoj de la mondo.


Rigardinte la belajn pejzaĝojn de la urbo, vi povas ĝui bongustajn pladojn de norda Ĉinio, kiel ursaplando, alkanazo, hidno kaj tetrao, kiuj impresos vin neforgeseble.

Harbin estas tre interesa. Venu do, amikoj, por satigi viajn okulojn.

*Katedralo en Harbin*



*Unu el la historiaj restaĵoj en Harbin*








*Harbin*


*Turistoj sur la insulo Suno*





*Turistoj remas sur Songhŭa-rivero.*

*La pitoreskejo Tjanjunge sur la insulo Suno*





# Indekso de EPC 1985

## POR LA 35-JARA JUBILEO DE EPC

	Nr. pĝ.		Nr. pĝ.
1. Vortoj skribitaj de Hujucz, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola Kongreso kaj prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo . . . . .	5. 2	28. La Esperanto-Ligo por Norda Ameriko alrigardas la estontecon . . . . .	1. 24
2. Gratulo de Jaŭ Jilin, vic-ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko . . . . .	5. 3	29. 70 jaroj de Esperanto-movado en Siĉŭan-provinco . . . . .	2. 20
3. Vortoj skribitaj de Bakin, prezidanto de la Ĉina Verkista Asocio kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA . . . . .	5. 4	30. Kanto al lumo . . . . .	2. 23
4. Vortoj skribitaj de Ĉu Tunan, prezidanto de la "Amikoj de Esperanto" por la 35-jara jubileo de la fondiĝo de "El Popola Ĉinio" . . . . .	5. 5	31. Retrospektive kaj perspektive . . . . .	3. 20
5. Vortoj skribitaj de Lu Ĝjaŝji, prezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj . . . . .	5. 4	32. Ĉinio jam havas Esperanto-eldonejon . . . . .	3. 23
6. Por nia komuna afero . . . . .	5. 6	33. 20-jara jubileo de la ĉina Esperanta disaŭdiĝo . . . . .	4. 21
7. Tri memorindaj renkontiĝoj . . . . .	5. 18	34. Solidaj paŝoj de Esperanto-movado en Ŝandong-provinco . . . . .	4. 24
8. La mondo atentis vin . . . . .	5. 18	35. La motoro de la evoluo estas la uzado de la plej granda nombro . . . . .	4. 27
9. Vivu "El Popola Ĉinio" . . . . .	5. 19	36. "Montara Vilaĝo" de Chun-Chan Yeh eldonita . . . . .	4. 26
10. Ĝi apartenas al la internacia Esperanto-komunumo . . . . .	5. 20	37. Esperanto en Junnan-provinco . . . . .	6. 27
11. Mi revenos al la urbo . . . . .	5. 20	38. La pekina universala kongreso de Esperanto en perspektivo . . . . .	7. 2
12. Kiel mi konatiĝis kun Ĉinio? . . . . .	5. 21	39. Kunsidis "Amikoj de Esperanto" . . . . .	7. 6
13. Gratulaj leteroj el Jugoslavio . . . . .	6. 24	40. Per Esperanto tra Ĉinio . . . . .	7. 8
14. Ĉiam amike kaj samideane . . . . .	6. 25	41. Aŭgsburgo bonvenigos vin . . . . .	7. 10
15. Pensoj pri 35 jaroj de El Popola Ĉinio, kaj pri "profito" . . . . .	6. 26	42. La E-movado de la Interna Mongolio en disvolviĝo . . . . .	8. 17
16. Festo de esperantistoj . . . . .	9. 5	43. Multlingveco kaj kultura evoluo en evoluantaj landoj . . . . .	8. 19
17. Gratulo kaj espero . . . . .	9. 10	44. Granda humanisma faro . . . . .	9. 18
18. En rolo de Esperanto EPC havas ankaŭ sian parton . . . . .	9. 12	45. La naskiĝo de neologismoj . . . . .	9. 20
19. Grava funkcio de EPC . . . . .	9. 13	46. Esperanto — perspektiva lingvo . . . . .	10. 20
20. La socia prestiĝo de Esperanto en Ĉinio . . . . .	9. 14	47. Esperanto kaj junaj kripluloj . . . . .	10. 22
21. Krei interkomprenon kaj amikecon . . . . .	9. 15	48. IUPAK kaj Esperanto . . . . .	10. 24
22. Per "EPC" ni scias ĝuste Ĉinion . . . . .	9. 15	49. Pri la 70-a UK . . . . .	11. 2
23. Gratulaj vortoj de polaj kaj usonaj esp-istoj . . . . .	9. 16	50. Vojaĝo en Jugoslavio . . . . .	11. 20
24. Gratuloj de niaj legantoj . . . . .	10. 19	51. Revuo al la kreskanta esperantistaro de Ĉinio . . . . .	12. 2
25. Gratulo kaj espero . . . . .	11. 18	52. La Scienca Eldona Centro de UEA en Budapeŝto . . . . .	12. 49
26. Al "El Popola Ĉinio" . . . . .	11. 19	<b>POR KOMENCANTOJ</b>	
<b>ESPERANTO</b>		53. Pineto . . . . .	5. 47
27. Ĉinaj esperantistoj-sciencistoj pri Esperanto . . . . .	1. 21	54. Mia patrino . . . . .	6. 47
		55. Nesatigebla lupoj . . . . .	7. 65
		56. Geëdziĝa festo . . . . .	8. 23
		57. Kiu estas la mastro de la kabano? . . . . .	9. 17
		58. Akvoguto kaj ŝtupo . . . . .	10. 25
		59. Arbo kaj grundo . . . . .	10. 25
		60. Kiel kreigiĝis segilo . . . . .	11. 49
		61. Ĝang Heng nombris stelojn . . . . .	11. 49
		62. Rakonto pri serpentvino . . . . .	12. 67

## SUR NIA LIBROBRETO

63. Du bukedoj el la manoj de Tibor Sekelj . . . . . 1. 28  
 64. Legu kaj lertiĝu . . . . . 5. 62  
 65. Pli ampleksan albumon pri Zamenhof! . . . . . 8. 22  
 37. Esperanto en Junnan-provinco . . . . . 6. 27  
 66. Du majstraj tradukoj poeziaj . . . . . 11. 22  
 67. Libro utila . . . . . 12. 54

## POLITIKO

68. Konstrui socialismon kun ĉinaj trajtoj . . . . . 3. 2  
 69. Pri la tria sesio de la Sesa Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio . . . . . 7. 25  
 70. Ekonomiaj leĝoj de Ĉinio en la ekonomia struktura reformo . . . . . 7. 26  
 71. Kiel Ĉinio traktas junajn krimulojn? . . . . . 8. 41  
 72. Signifoplena konferenco . . . . . 12. 15

## EKONOMIO

73. Uverturo de la reformo . . . . . 1. 2  
 74. Entrepreno rompinta egalismon . . . . . 1. 6  
 75. Modelo de industria reformo . . . . . 1. 8  
 76. Viglas komercoj . . . . . 1. 10  
 77. Riĉa vilaĝo en norda Ŝanŝji . . . . . 3. 28  
 78. Esploro pri la ĉinaj urbetoj kaj ilia industrio . . . . . 4. 2  
 79. En kamparaj urbetoj . . . . . 4. 6  
 80. Sekura kaj rapida servo de la ĉina civila aviado . . . . . 4. 18  
 81. Vizito al Horgos — komerca haveno ĉe la ĉina-sovetia landlimo . . . . . 5. 58  
 82. En la manĝaĵ-foiro de Tjanĝin . . . . . 6. 20  
 83. La leviĝanta terciara industrio de Ĉinio . . . . . 7. 21  
 84. Familiaj kultivejoj . . . . . 8. 6  
 85. Pasaĝera hejmo . . . . . 9. 28  
 86. Reformo de urba ekonomia strukturo en Ĉinio . . . . . 10. 2  
 87. En akvo-vivaĵaj kulturejoj . . . . . 11. 12

## MALFERMITAJ URBOJ

88. Jantaj . . . . . 1. 16  
 89. Marborda urbo Ĉingdaŭ . . . . . 2. 16  
 90. Daljan, pordo de nordorienta Ĉinio . . . . . 3. 16  
 91. Ĉinhŭangdaŭ, la plej granda karbohaveno de Ĉinio . . . . . 4. 12  
 92. Tjanĝin, la tria granda urbo de Ĉinio . . . . . 5. 36

93. Naturdotita haveno Ljanjungang ĉe la Flava Maro . . . . . 6. 16  
 94. Nantong — nova bazo de eksportado . . . . . 7. 16  
 95. Ŝanhajo — granda urbo en la mondo . . . . . 8. 12  
 96. Kantono — la suda pordo de Ĉinio . . . . . 9. 36  
 97. Ĝanĝjang — havenurbo en suda Ĉinio . . . . . 10. 6  
 98. Banjana urbo Fuĝoŭ . . . . . 11. 8  
 99. Ŭenĝoŭ, eksterkomerca haveno ĉe la Orienta Ĉina Maro . . . . . 12. 8

## KULTURO, EDUKO KAJ SCIENCO

100. Eksperimentado de "ekologia agrikulturo" . . . . . 1. 58  
 101. Solvinto de la "enigmo de blindiĝo de la napoleonaj soldatoj" . . . . . 2. 47  
 102. Ekologio en peklujo . . . . . 2. 48  
 103. Lulilo de ĉinaj marnavigistoj . . . . . 4. 39  
 104. Sincera koro, fonto de entuziasmo . . . . . 4. 41  
 105. Holografio en Ĉinio . . . . . 5. 29  
 106. Por ĉiuflanka disvolviĝo de la element-lernejanoj . . . . . 6. 2  
 107. Kiel mi plenumas la ĉefinstruistan devon . . . . . 6. 6  
 108. Interesa instruado . . . . . 6. 8  
 109. Edeno de infanoj . . . . . 6. 10  
 110. La unua gazeto eldonata de ĉinaj geknaboj . . . . . 6. 40  
 111. La progreso de ĉinlingva informa traktado . . . . . 7. 28  
 112. Sovaĝa kamelo en Ĉinio . . . . . 8. 29  
 113. Magiaĵo de l' vortoj . . . . . 8. 45  
 114. Ĉina esplora bazo en Antarkto . . . . . 11. 36  
 115. Antaŭ kaj post granda terŝoviĝo . . . . . 12. 18

## ĈINLINGVA KURSO

116. Dekdua leciono: La han-lingva fonetika alfabeto . . . . . 6. 46  
 117. Dektria leciono: Saluto . . . . . 7. 67  
 118. Dekkvara leciono: Salutoj . . . . . 8. 68  
 119. Dekkvina leciono: Kiel vi nomiĝas? . . . . . 9. 24  
 120. Deksesa leciono: Interkonatiĝo . . . . . 10. 67  
 121. Deksepa leciono: Ŝtataneco kaj lingvo . . . . . 11. 68  
 122. Dekoka leciono: Demandi pri adreso . . . . . 12. 68

## LITERATURO KAJ ARTO

125. Somera travivaĵo (novelo) . . . . . 1. 40; 2. 43



124.	Sur monta vojeto (mikronovelo)	3.	40
125.	Ĉivespera siringo (mikronovelo)	3.	41
126.	Heroa kaj ĉarma "Legendo pri Mulan"	3.	11
127.	Mej Lanfang kaj la pekina opero	3.	36
128.	Tragedio de ĵaba-oj	4.	36
129.	Plej antikvaj odoj "Ĝiŭ Ge" surscenigitaj	5.	56
130.	Aŭtuna rememoro (mikronovelo)	5.	41
131.	Rigardi malproksimen (poemo)	6.	47
132.	La baletto "Ljang Ŝanbo kaj Ĝu Jingtaj"	7.	36
133.	Al la kverko (poemo)	7.	47
134.	Humuraĵoj ĉinaj kaj alilandaj	7.	27
135.	La elemento manka (tajlanda popolrakonto)	7.	58
136.	Iom pri la ĉinaj papertranĉaĵoj	7.	38
137.	En pluvfadenetoj (mikronovelo)	8.	46
138.	La lasta flugo (poemo)	8.	50
139.	Pentraĵoj de Jiĝjun-aj kamparanoj	8.	36
140.	La lanterna festo en antikva ĉefurbo	8.	7
141.	Pri la internacia kajta festivalo en Ŝejfang	9.	59
142.	Kiam pluvis (novelo)	9.	42
143.	Kantistino honorita per floroj	9.	40
144.	Kvieta rivero (mikronovelo)	10.	45
145.	La novela verkado de Ĉinio en la lastaj dek jaroj	11.	45
146.	Klara beseno (novelo)	11.	46
		12.	39

### HIGIENO KAJ SPORTO

147.	Post reveno de Los-Anĝeleso	2.	27
148.	Kiel kuraci malsanojn per akupunkturo kaj mokso	3.	4
149.	La plej fruaj akupunkturo kaj mokso kaj ilia nova disvolviĝo	3.	7
150.	Akupunkturo kaj mokso servas al la homaro	3.	10
151.	Konkurso de drakboatoj	3.	42
152.	28a-generacia ĉinmedicinisto He Ŝiŝji	5.	26
153.	Dek plej elstaraj sportistoj de Ĉinio	7.	40
154.	Ĉinio batalas kontraŭ kanceraj	8.	2
155.	Post la internacia gimnastika turniro	8.	26
156.	Kiel sportas kamparanoj de Ŝandong?	9.	45
157.	Pri la sanprotekto de la virinoj kaj infanoj en la ĉina kamparo	11.	26

### POR VIA SANO

158.	Masaĝo hejme praktikebla	2.	61
159.	Masaĝo por forigi sendormecon	4.	43
160.	Protekto de oreloj, nazo, okuloj kaj lipoj per masaĝo	6.	62
161.	Cerbosaniga ekzercado	8.	65
162.	Centpaŝa ekzercado	10.	47
163.	Memmasaĝo kontraŭ kapdoloro	12.	43

### SOCIA VIVO

164.	Ĉinaj kamparaninoj hodiaŭ	1.	36
165.	Vojo de malliberulo	1.	45
166.	Privata infanvartejo	2.	59
167.	Viglaĵ ĉinaj virinoj	3.	45
168.	Kiel vivas kripluloj en Ĉinio	4.	46
169.	Ĉinaj gejunuloj kaj moderna vivmaniero	5.	22
170.	Novaj ŝanĝiĝoj en ĉinaj kamparaj familioj	7.	44
171.	Antaŭen strebantaj junuloj de Ĉinio	9.	25
172.	Posteuloj de garnizonanoj antaŭ 220 jaroj	9.	48
173.	Nova vivo de la kamparanoj de Ŝjigŭan	10.	13
174.	Por ardigi ilian malfruan amon	10.	39
175.	Steloj el la limregionoj	11.	41
176.	Junularo, espero de Ĉinio	12.	12
177.	La media polucio kaj kontraŭmetodo en Pekino	12.	16

### NUNAJ ĈINOJ

178.	La unua blinda romanisto de Ĉinio	2.	39
179.	Ĉina juĝisto de la Internacia Kortumo de Justico	4.	44
180.	La kreinto de argilaj homfiguroj animitaj	6.	67
181.	Matematikistino, dommastrino kaj "sekretariino"	8.	38
182.	Brava elektreveldistino	10.	28
183.	Li amas kokobredadon	12.	19

### HISTORIO, HISTORIAJ OBJEKTOJ

184.	Ding-o	1.	56
185.	Granda scenejo en la Somera Palaco	2.	36
186.	Silkaĵoj de la antikva Ĉinio	3.	56
187.	Ĉarmaj bludesegnaj porcelanaĵoj	4.	60
188.	Raraj elterigitaj antikvaĵoj	5.	66
189.	Fosilia simi-homo antaŭ 200 000 jaroj	6.	57

190. Jadaj homfiguroj en tombo de reĝa kromedzino antaŭ 5 000 jaroj . . . 7. 56  
 191. Antikva urbo antaŭ 5 600 jaroj . . . 10. 56

### VOJAĜO KAJ VIDINDAJ LOKOJ

#### TIBETO HIERAŬ KAJ HODIAŬ

192. (1) Tibeto, la sudokcidenta limregiono de Ĉinio . . . . . 1. 48  
 195. (2) Lhasa, antikva urbo sur altebenaĵo . . . . . 2. 49  
 194. (3) Bela Ŝjigaze . . . . . 5. 50  
 195. (4) Tibeta popolo, la mastro de sia hejmloko . . . . . 4. 55  
 196. (5) Baji-urbeto, perlo sur la altebenaĵo . . . . . 5. 50  
 197. (6) Nord-tibeta stepo . . . . . 6. 51  
 198. (7) Eksaristokratoj de Tibeto . . . . . 7. 51  
 199. (8) Agrikulturo de la altebenaĵo . . . . . 8. 54  
 200. (9) La religia kredo de tibetanoj . . . . . 9. 61  
 201. (10) Buntaj literaturo kaj arto . . . . . 10. 54  
 202. (11) Prosperas la tibeta loĝantaro . . . . . 11. 57  
 205. (12) La energio de Tibeto . . . . . 12. 56

#### VOJAĜO TRA ĈINIO

204. Antikva urbo Pekino . . . . . 1. 51  
 205. Ŝjian, natura muzeo de la ĉina historio . . . . . 2. 51  
 206. Lŭojang, urbo abunda je antikvaj restaĵoj . . . . . 5. 51  
 207. Ĝengĝoŭ kun "pendanta" rivero, historiaj restaĵoj kaj famaj temploj . . . . . 4. 51  
 208. Ĉangŝa — granda urbo en centra Ĉinio . . . . . 5. 51  
 209. Kantono — fenestro de suda Ĉinio . . . . . 6. 51  
 210. La antikva urbo Nankino . . . . . 7. 51  
 211. Uŝji, perlo ĉe Tajhu-lago . . . . . 8. 50  
 212. Ĝardena urbo Suĝoŭ . . . . . 9. 50  
 215. Ŝanhajo — ĉarma urbo . . . . . 10. 50  
 214. Belaj pejzaĝoj de Hangĝoŭ . . . . . 11. 50  
 215. Harbin, urbo por somerumado kaj vintra ekskurso . . . . . 12. 51  
 216. Ŝihezi — nova urbo en Gobio . . . . . 2. 2  
 217. Trezoro sub "Demona Urbo" . . . . . 2. 5  
 218. Kaŝi — antikva urbo ĉe la okcidenta landlimo . . . . . 2. 8  
 219. Familio sur stepo . . . . . 2. 11  
 220. Miljara templo de ĉina taoismo . . . . . 5. 60  
 221. Vojaĝo tra la antikva Nangŝaŭ-regno . . . . . 10. 42  
 222. Vizito al Liĝjang ĉe Julongmontaro . . . . . 12. 28

### AMIKECO KAJ INTERNACIA PROBLEMO

225. Ekonomia prosperiĝo en la azia kaj pacifika regiono . . . . . 1. 65  
 224. La bavaria ŝtata opertrupo de FR Germanio en Ĉinio . . . . . 1. 66  
 225. Nova teknika revolucio kaj energia perspektivo de la mondo . . . . . 2. 66  
 226. "Floro de Orienta Eŭropo" en Ĉinio . . . . . 5. 62  
 227. Finna kamparano Hoffren kaj Ĉinio . . . . . 5. 65  
 228. Por nova internacia ordo de informado . . . . . 4. 65  
 229. "Depresio" kaj "reprosperiĝo" de la Okcidenta Eŭropo . . . . . 6. 65  
 250. Ĉinaj kamparanaj geedzoj vizitis Francion . . . . . 6. 65  
 251. Alte tenu la standardon de paco kaj disvolvo . . . . . 8. 65  
 252. Memoru lecionojn de la milito, defendu la mondpacon! . . . . . 9. 54  
 255. Paco, kunlaboro kaj disvolviĝo . . . . . 10. 65  
 254. Protekto de "vivpana korbo" de la homaro . . . . . 11. 55  
 255. Pioniro pretiganta silkan kaj porcelanan marvojon . . . . . 12. 26  
 256. Savu la arbarojn . . . . . 12. 47

### ALIAJ ASPEKTOJ

257. EPĈ salutas vin . . . . . 1. 68  
 258. Kion rimarkigis niaj legantoj . . . . . 7. 50


### ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO

259. Termofontoj de Ĉinio . . . . . 1. 59  
 240. Fazanedoj en Ĉinio . . . . . 2. 56  
 241. Ĉinaj naciecoj . . . . . 4. 62  
 242. Raraj animaloj de Ĉinio . . . . . 5. 48  
 245. Raraj plantoj de Ĉinio . . . . . 6. 59  
 244. Pagodoj de Ĉinio . . . . . 7. 11  
 245. Budhismo en Ĉinio . . . . . 8. 48  
 246. La arkiva konservado de Ĉinio . . . . . 9. 57  
 247. Etiketo de ĉinoj . . . . . 10. 66  
 248. Moroj de ĉinoj en manĝado . . . . . 11. 55  
 249. Legendo pri drako . . . . . 12. 64

### INTER NI

250. El leteroj de legantoj . . . . . 2. 50  
 251. El leteroj de niaj legantoj . . . . . 3. 67  
 252. Kiel opinias niaj legantoj . . . . . 6. 61  
 255. Proponoj kaj kritikoj . . . . . 7. 66  
 254. Kritikoj kaj proponoj . . . . . 9. 27  
 255. Kuraĝigoj de niaj legantoj . . . . . 11. 56





*Eksterlandaj turistoj bonvenigataj de malgrandaj konduktoroj*

*Plezurŝipo sur Songhŭa-rivero*





*Malgrandaj kant- kaj dancamantoj*



## En Ŝingĵang

Fotoj de ĜAJ ŬANSIN




*Sub vinberujoj*

Foto de ŜIN HŬA





*Paŝtistaj familioj en Tjansan-montaro*



*Fontakvo apud vilaĝo*

*Mezlerneĵanoj*



# KLARA BASENO

(Daŭrigo)

Melon-koboldo ne venis en du tagoj. Ŝju Baŭce diris: "La Koboldo eble forgesis nin maljunulojn." Frato la Sesa diris: "Nin maljunulojn li povas forgesi, sed akvomelonojn ne." Ŝju Baŭce aldonis kapjesante: "Ankaŭ la maron li ne povas forgesi — tiu etulo estis transformita simple el fiŝo. Li devas fariĝi fiŝisto, sed li volas labori kune kun ni. . ."

Ĉe la lastaj vortoj Frato la Sesa rememoris ion. Li turnis sin al

Ŝju Baŭce: "Oni diris, ke la kampoj de la kolektivo estos dividitaj al individuoj laŭkontrakte. Sed ne estas certe, ĉu ankaŭ la melonkampoj estos dividitaj."

Ŝju Baŭce diris kun rideto: "Pro kio vi maltrankviliĝas? Certe la tasko falos sur nin ambaŭ. Neniu el la vilaĝo havas la kuraĝon preni sur sin la kulturadon de melonkampoj — por tio necesas sperto!"

Frato la Sesa kapjesis: "Jes. Ni devas insisti pri tio por ke neniu forrabu de ni la taskon."


Estis eksterordinare varme. Ĉe la tagmezo Melon-koboldo venis de la maro, kun jaketo sur la brako. Ŝju Baŭce, sidante sur la kuŝejo, de malproksime vidis lin kaj ĝoje ekkriis: "Ho, vi bubaĉo, kie vi perdiĝis en tiuj tagoj?"

La knabo balanciĝe aliris kun okuloj duonfermitaj kaj duonridetantaj, kvazaŭ ebriiĝinta. Li kuŝiĝis kaj ekkriis: "Mi volas melonon!"

"Kia Melon-koboldo!" Ŝju Baŭce salutis Fraton la Sesan kaj prenis el sub la kuŝejo grandan melonon. Ho, kiel bela melono! Kiu havis la feliĉon ĝui tian melonon!

Iu venis el la vilaĝo kaj informis Ŝju Baŭce kaj Fraton la Sesan, ke vespere en la vilaĝo okazos kunveno pri divido de la kampoj, kaj unu el ili ĉeestu la kunvenon.

Longe ĝojis la du maljunuloj. Ŝju Baŭce volis iri al la kunveno, sed tion ne konsentis Frato la Sesa: "Ĉe decida tempo vi estas hezita. Mi iru." Fine ili ambaŭ venis al la interkonsento, ke Frato la Sesa ĉeestos la kunvenon.





Ĉe vesperiĝo Frato la Sesa iris al la kunveno kaj revenis nur en noktomezo.

La ĝoja mieno de Frato la Sesa trankviligis Ŝju Baŭce. Li demandis: "Ĉu oni asignis al ni la melon-kampojn?"

Frato la Sesa respondis kapjesante: "Se ne ni, kiu kuraĝus preni la taskon? Kiam mi ekparolis, neniuj oponis. Mi fingrostampis la kontrakton anstataŭ vi. Mi antaŭkalkulis, ke en la jarfino ni gajnos almenaŭ po 500 ĵuan-ojn!"

"Ha, ha" Ŝju Baŭce ĉirkaŭprenis Fraton la Sesan je la talio, kriis, frapis lin kaj ĝoje diris: "Melon-koboldo estas saĝa, sed fakte vi estas pli saĝa ol li. Kalkulante per la fingroj, vi jam tekis ruzaĵon. Bone, ni dankas al la respondeca sistemo de laŭkontrakta produktado. Kiu difinis la novan politikon? Mi volas vidi lin kaj tosti por li."

Ĉe tagiĝo la du maljunuloj kune komencis plekti dornan heĝon inter la soforarbaro kaj melonkampoj. Venis la Koboldo kaj hakis por ili vimenojn. Ŝju Baŭce diris al li, ke la vilaĝo asignis la melonkampojn al ili kaj la kampoj fariĝis preskaŭ iliaj propraj. Ege ĝojiĝis la knabo. Frato la Sesa mute faris plektadon de la barilo kun mallevita kapo. Li ĵetis rigardon al la Koboldo kaj daŭrigis sian laboron.

Melon-koboldo proksimiĝis malantaŭ lian dorson kaj ektuŝis per mano lian talion. Frato la Sesa forĵetis la vimenojn kaj kriis kun larĝe malfermitaj okuloj: "Vi bubaĉo, kial vi tiel forte batis min?"

Frato la Sesa montris timindan mienon, kio surprizis la Koboldon, kaj tiu faris paŝon malantaŭen.

Ŝju Baŭce mirigite rigardis al Frato la Sesa kaj diris: "Ĉu vi estas tiel delikata?"

Frato la Sesa ruĝiĝis, daŭre laboris kun klinita kapo.

La triopo laboris la tutan antaŭtagmezon kaj finis la plektadon de la barilo. La tagmanĝo estis el fiŝviandaj buloj kaj maiza flano. Melon-koboldo manĝis malmulte. Li sin donis al la kuŝejo kun la vizaĝo supren kaj torcadis sian korpon. Zumante kantone, li kutime metis la piedojn sur la glatan dorson de Ŝju Baŭce. Frato la Sesa estis fumanta kun sulkigitaj brovoj. Kiam li vidis la faron de la Koboldo, li tuj diris: "Kia frivolulo! Li laboris la tutan tagon kaj multe laciĝis, sed vi metis la piedojn sur lian dorson. Vi aĉulo!" Antaŭe en tia okazo la Koboldo ĉiam retiris siajn piedojn kaj metis ilin sur la dorson de Frato la Sesa, sed ĉifoje, vidinte lian malserenan vizaĝon la Koboldo senbrue metis la piedojn sur la kuŝejon.

Post vespermanĝo estis kutima programo manĝi akvomelonon. Trovinte ke Frato la Sesa ne volis manĝi, Ŝju Baŭce iris sola en la kampon kaj revenis kun du melonoj. Sed Frato la Sesa nur fumadis anstataŭ manĝi melonon. Kiam Melon-koboldo foriris, Ŝju Baŭce kaptante al Frato la Sesa la ŝultron kaj demandis:

"Frato la Sesa, kio malagrabilis vin?"

Frato la Sesa daŭre fumadis.

Li frapetis la pipon, diris kun tirata voĉo kaj seriozita mieno: "Ne ofte venigu la Melon-koboldon, li ne estas bona infano."

Ŝju Baŭce spiroblovis tra la nazo kaj flankigis la rigardon: "Li estas bona infano."

Tiu tago estis la plej malagraba por ili. Ili interparolis

malmulte kaj faris sian aferon aparte.

De tiam, se venis la Koboldo, Frato la Sesa ĉiam tenis sin fore de li. Kaj la fiŝoj alportitaj de la Koboldo ne povis vekti plu la atenton de Frato la Sesa. Se la Koboldo iris baniĝi en la baseno, nur Ŝju Baŭce sola sekvis lin. Foje sen ĉeesto de la Koboldo Ŝju Baŭce diris al Frato la Sesa: "Frato la Sesa, vi estas tro maltolerema. Ŝajne vi ne povas plenumi grandan aferon!" Frato la Sesa kontraŭdiris: "Mi ne trovis, ke vi iam plenumis grandan aferon!"

Oni ne sciis en kiom da tagoj la Koboldo ne venis. Ŝju Baŭce ofte atende rigardadis al la marbordo. Sed krom grupo da fiŝistoj en la foraĵo, neniun li vidis. Nokte, kiam li kuiris ion kaj parolis en la kampoj, li sentis solecon.

Iun matenon, vekiginte, li diris al Frato la Sesa: "Nokte, en songo mi vidis ke venis la Koboldo kaj ni kuiras fiŝan supon sude de la kampo, ĉe la heĝo."

Frato la Sesa diris kapjesante: "Vi kuiru."

Ŝju Baŭce diris skuante la kapon: "Mi songis, ke li koleriĝis kaj diris, ke li ne venos plu. . ."

Ironia rideto ekludis sur la lipanguloj de Frato la Sesa.

En alia tago, Ŝju Baŭce estis akvumanta melonojn. Li levis la rigardon kaj vidis Koboldon staranta sur la marbordo. Li forĵetis la sitelon kaj kuris al li kun krio:

"Estas vi, Koboldo! Kial vi ne venas? Koboldo, Koboldo. . ."

Sed la knabo apatie staris senmove, rigardis tempeton kaj foriris balanciĝe.



Frato la Sesa diris al li: "Ne voku plu la bubon, li ne venos plu. Foje, vi forestis, li formangis unu melonon kaj petis la duan. Mi rifuzis kaj li foriris en kolero."

Je la diro Ŝju Baŭce turnis la rigardojn al Frato la Sesa kun miro.

Konsternite de lia mieno, Frato la Sesa movis sin iom flanken kaj penis eviti liajn rigardojn.

Sed Ŝju Baŭce fiksitis siajn rigardojn sur lin. Post momento li reportis grandan melonon, forte jetis ĝin kontraŭ la tranĉtabulon, kaj la melono tuj frakasiĝis en pecojn. Li kunigis la pecojn per tremantaj manoj, ekprenis unu el ili kaj ekmanĝis. Lia vizaĝo estis makulita de melonkarno. Post tio li kuŝiĝis kaj endormiĝis.

Ĉion ĉi senparole observis Frato la Sesa, sed nenion li kuraĝis diri.

Kiam Ŝju Baŭce vekigis, li vidis Fraton la Sesan sidanta spud li. Rigardante al la norda marbordo, Ŝju Baŭce diris: "Antaŭlonge mi komprenis, ke vi domaĝis la melonojn. Vi volas rapide riĉiĝi, tion mi klare scias kvankam vi ne konfesis al mi. Sed kiom multe nin helpis la Melon-koboldo en la kampa laboro? Kiom da fiŝoj li alportis al ni? Ĉion tion vi ignoris. . ."

Ĉitagmeze Ŝju Baŭce iris al la maro por serĉi la Koboldon.

Li trovis la Koboldon en la maro. Li rampis sur la bordon, sidiĝis apud Ŝju Baŭce kaj ekplore. Sed kiam larmoj apenaŭ elfluis, li forviŝis ilin per la malgrasa kaj nigra mano. Ŝju Baŭce petis lin refoje gastigi en lia ŝedo, sed li skuis la kapon kaj montris rezolutan mienon. Fine la maljunulo foriris kun veo.

La du maljunuloj zorgis la kampojn kiel antaŭe. Ili akvumadis, stucadis, kaj nokte gardis la melonojn. Sed ili parolis jam ne tiel laŭte, kaj rido malaperis sur ilia vizaĝo. Ŝju Baŭce malvigliĝis, sentis sin malfortiganta. Fine, en iu tago, li diris al Frato la Sesa:

"Frato la Sesa, mi toleris kelkajn tagojn, kaj hodiaŭ mi devas sciigi vin, ke mi ne laboros plu en la melonkampoj. Vi havu aliulon kiel kunlaboranton. Mi konfesas, ke komence mi penis toleri, sed poste mi jam ne povis tion fari. Ni kune kulturis melonojn multajn jarojn, kaj mi petas vian pardonon, ke hodiaŭ mi decidis forlasi vin."

Surprizite, Frato la Sesa mordetis la pipon kaj rigardadis lin rondirante ĉirkaŭ li: "Ĉu. . . ĉu vi frezeziĝis?"

Ŝju Baŭce diris: "Mi jam decidis, ke hodiaŭ vespere mi revenos en la vilaĝon."

Frato la Sesa komprenis, ke li jam kategorie decidis, kaj kaŭriĝis kun malespero.

Ŝju Baŭce foriris. Post duonmonato, kun iu alia, li prenis sur sin la kulturadon de vinberĝardeno sur strando. Melon-koboldo ofte iris al li kaj ili kune dormis en ŝedo kaj kuiris fiŝan supon en noktomezo.

Iun vesperon la maljunulo kaj la knabo ambaŭ kuŝis en la ŝedo kun la vizaĝo supren. Melon-koboldo denove metis la piedojn sur la glatan dorson de Ŝju Baŭce. Li zumis per sia raŭketa voĉo. La zumado pli kaj pli mallaŭtiĝis kaj fine silentiĝis. Post momento li diris al Ŝju Baŭce: "Mi sopiras pri la melonkampoj. . ."

Ŝju Baŭce diris kun rideto: "Ĉu vi volas melonon? Vi Melon-koboldo!"

Melon-koboldo sidiĝis, obstine skuis la kapon kaj diris rigardante la vastan stelplenan ĉielon: "Al la klara baseno mi sopiras. . . vere la klara akvo. . ."

Ŝju Baŭce nenion diris.

Estis malvarmeta nokto. Vento susuris sur la vinberaj latisoj. Ŝju Baŭce mallaŭte kaj lante diris al si: "Ankaŭ vinbero bezonas akvobasenon. Mi devas fosi unu basenon. . ."

Ekbrilis la okuloj de la Koboldo: "Sed necesas multaj homoj por fosi basenon; ĉu ni ambaŭ sufiĉas por tio?"

Ŝju Baŭce balancis la kapon.

La Koboldo ekridis: "Mi tre sopiras pri la klara baseno. . ."

Iun matenon la maljunuloj kaj la knabo ekfosis sur vakanta tero. Eble la grundo estis malmola, ili malalte klinis sin super la fosado. En la oranĝa matenkrepusko ili pene fosis plu. . .

(Esperantigis Ŭang Ŝijong)





*La kvarteto en ludo*



## HUNGARAJ ARTISTOJ EN ĈINIO

*En la dua tagdeko de septembro, kun granda intereso pekinaj loĝantoj ĝuis prezentadon de la Ĉambra Orkestro "Ferenc Liszt" kaj la Bartoka Kvarteto de Hungario. La orkestro ludis verkojn de Vivaldi, Mozart kaj Handel kaj la kvarteto tiujn de Haydn, Beethoven kaj Schubert. Ilia prezentado ricevis varman aplaŭdon de la aŭskultantoj. La hungaraj artistoj vizitis ankaŭ Ŝanhajon, Ŝenjang kaj Daljan.*



*Prezentado de la Ĉambra Orkestro "Ferenc Liszt"*





*Hungaraj artistoj en la Somera Palaco*

## BULGARAJ ARTISTOJ EN ĈINIO


*En la unua tagdeko de septembro la Dobrudka Dancgrupo de Bulgario vizitis Ĉinion. En Pekino la trupo prezentis belajn dancojn, kiel "Dobrudkaj Dancoj", "En Tago antaŭ la Geedziĝo" kaj "Renkontiĝo ĉe Rivero", kiuj estis bonvenaj al la rigardantoj. Poste la bulgaraj artistoj vojaĝis al Fuĝoŭ kaj Nankino.*

*"En Tago antaŭ la Geedziĝo"*



*"Dobrudkaj Dancoj"*





Bulgaraj artistoj sur la Granda Muro  
Foto de GENG ĜIN

Ĉina kaj bulgara artistinoj interŝanĝas spertojn.



## MEMMASAĜO KONTRAŬ KAPDOLORO

Kapdoloro ofte ne estas memstara malsano, sed simptomo de pluraj malsanoj. Jen ni konigas al vi du metodojn de memmasaĝo por kuraci ordinaran kapdoloron.

A. Kapdoloro ĉe la frunto kaj la tempioj, kaŭzita de malvarmumo kaj infektado de la supra spir-kanalo. La suferanto sentas ŝtopitecon en la nazo, doloron ĉe la gorĝo, febron en la korpo kaj malfortecon ĉe la membroj. Liaj okuloj fariĝas ruĝaj kaj plimultiĝas mukaĵo el la nazo. La dolo-

ron povas mildigi jena memmasaĝo.




1. Pinĉi la punkton *Ĝijin* 5-10 fojojn;
2. Pinĉpremi la tempiojn, pinĉi kaj knedi la punkton *Siĝukong* po kelkdek fojojn;
3. Pinĉpremi la punktojn *Fengĉi*, *Fengfu* kaj *Daĝuj*, pinĉlevi, tiri kaj fingre frapi ilin ĝis ruĝiĝo kaj purpuriĝo, poste froti ilin dekojn da fojoj;
4. Kombe froti kaj beke

frapi la verton per la dek fingroj po 10-100 fojojn.

B. Sango-manka kapdoloro, kaŭzita de anemio aŭ malforteco. La suferanto sentas ofte kapturniĝon. Ĝi fariĝas pli peza, kiam li staras aŭ sin movas. La simptomojn povas moderigi jena memmasaĝo, helpe de alia kuracmetodo.

Laŭvice knedi kaj pinĉi la punktojn *Ŝenŝu*, *Tajŝji*, *Ŭajĝuan*, *Ljeĉjue* kaj *Bajhuj* po 10-100 fojojn.

1. *Bajhuj*    2. *Siĝukong*    3. *Tempio*    4. *Ĝijin*    5. *Fengfu*    6. *Fengĉi*  
7. *Daĝuj*    8. *Tajŝji*    9. *Ŭajĝuan*    10. *Ljeĉjue*    11. *Ŝenŝu*




### SOLENA MEMORIGO PRI LA 40-A DATREVENO DE LA VENKO DE LA KONTRAŬJAPANA REZISTMILITO KAJ KONTRAŬFAŝISMA MILITO

De la meza tagdeko de aŭgusto ĝis la unua tagdeko de septembro Ĉinio okazigis serion da aktivadoj por memori pri la 40-a datreveno de la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj Kontraŭfaŝisma Milito.

La 3-a de septembro ĉi-jare estis la 40-a datreveno de la venko de Ĉinio en la milito kontraŭ la japana agreso. La venko havis grandan historian signifon, ke ĝi montris la vigle kreskantan nacian vekigon de la ĉina popolo kaj la grandegan forton de la nacia unuiĝo. La batalo de la ĉina popolo kontraŭ la japana agreso estis grava konsistiga parto de la Kontraŭfaŝisma Milito de la mondo.

Dum la memoriga aktivado la ĉina gazetaro publikigis multe da artikoloj pri la venko. Diverslokaj popolanoj prezentis florkronojn al la tomboj de komandantoj, soldatoj kaj samlandanoj mortintaj en la milito. Krome, oni aranĝis



*Soleno sur Tjan'anmen-placo en Pekino por memori pri la 40-a datreveno de la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio kaj la Kontraŭfaŝisma Milito de la mondo*

ekspoziciojn, okazigis mitingojn, radioelsendis aŭ prezentis teatrojn, dramojn, kantojn, dancojn, filmojn kaj vidoregistraĵojn.

### SOLENA MITINGO POR LA 20-JARA JUBILEO DE LA FONDIĜO DE LA AŬTONOMA REGIONO DE TIBETO

La unuan de septembro, ĉi-jare, 35 000 diversrondaj popolanoj de Lhasa, la ĉefurbo de Tibeto, solene kunvenis por celebri la 20-jaran jubileon de la fondiĝo de la Aŭtonoma Regiono de Tibeto.

Sub la helpado kaj gvidado de la Centra Registaro, ekstreme profundaj ŝanĝigoj okazis en politiko, ekonomio, kulturo, edukado

k.a. de Tibeto. Kvankam la konstruado trairis zigzagan vojon en la pasintaj jaroj post 1965, tamen la sukcesoj estis rimarkindaj.

La Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Ŝtata Konsilantaro sendis al la kunveno gratulan telegramon kaj sian delegacion. Ankaŭ la Nepala Amika Delegacio partoprenis en la kunveno.


### POST EKVALIDO DE LA ĈINA PATENTA LEĜO

La Ĉina Patenta Leĝo, kiu ekvalidis la unuan de aprilo ĉi-jare, allogis al si multegon da eksterlandaj patentopetantoj. Ĝis la 10-a de aŭgusto, tiaj petoj jam atingis



*Hu Ĉjili, estro de la delegacio de la centra registaro, en kampfajra vespero en Lhasa*





2 821, 31.44% de la totala kvanto de patentopetoj de Ĉinio. La fakto montris, ke la politiko malfermi la pordon al la eksterlando praktikata de Ĉinio gajnis pli kaj pli grandan prestiĝon internacie, kaj ke eksterlandaj scienculoj havas fidon al la disvolviĝo de scienco kaj tekniko de Ĉinio.

El la petoj ricevataj de la Ĉina Patenta Buroo la plejparto estas petoj pri inventaĵoj. Ili konsistigas 46.5% de la totala kvanto de patentopetoj por inventaĵoj de Ĉinio.

### LA PLEJ ALTA SIGNOTURO DE LA TROPIKO DE KANKRO EN LA MONDO

La plej alta signoturo de la Tropiko de Kankro en la mondo estis

konstruita en Tajpingĉang, Conghŭa-gubernio, Gŭangdong-provinco. Ĝia raketosimila korpo estis plenumita la 15-an de julio. La turo estas alta 27.55 metrojn, kun bazo el tri ŝtupoj. La cementa parto de la bazo de la turo estas alta 7 metrojn, kun portaloj ĉe la kvar flankoj, tra kiuj vizitantoj povas eniri. La mezo de la bazo estas farita el marmoro, kun ruĝa agato ĉe la centro, kiu indikas la punkton de la somera solstico. En la fronto de la turo estas gravuritaj oritaj ideogramoj "Tropiko de Kankro". Ĉe la supro estas kupra globo kun diametro de 120 cm., en kies mezo estas ronda turo por ekzameni la rektan lumjetadon de la suno. La turo impresas har-

monie kaj havas valoron en astronomio kaj geografio.

### ĜJANHE-PONTEGO LANĈITA AL TRAFIKO

Ĝjanhe-pontego, kantilevra trusarkponto el antaŭstreĉita cemento, kiu havas la plej longan spanon en Ĉinio, estis lanĉita al trafiko super Ĉingŝuj-rivero en la gubernio Ĝjanhe de la sudorienta parto de Gujĝoŭ-provinco, la 30-an de julio. La pontego kun longo de 241.1 metroj, alto de 30 metroj kaj larĝo de 11.8 metroj havas spanon de 150 metroj.


La provado de la ŝarĝita ponto antaŭ la ekfunkcio montris, ke ĝiaj kvalito kaj portokapablo atingis la normojn de projektado.

### "SERIO DA FOTO-ALBUMOJ PRI NACIMINORITATOJ DE ĈINIO" ELDONATA

La granda "Serio da Foto-albumoj pri Naciminoritatoj de Ĉinio", kompilita de la Ŝtata Komisiono de Naciecaj Aferoj de Ĉinio, eldoniĝas unu post alia. Ĝi prezentas al siaj legantoj belajn pejzaĝojn, riĉfontojn kaj morojn kun diversaj proprecoj de la naciminoritataj regionoj, kiuj konsistigas 60% de la totala teritorio de Ĉinio, per ĉarmaj bildoj kaj facile legeblaj tekstoj.

La albumoj, binditaj kaj kolore presitaj, havas ĉiu dekseksfolian formaton kun ĉ. 160 paĝoj.

*Foto-albumoj eldonitaj de ĉinaj nacimalplimultaj regionoj*



## LA HOTELO BLANKA CIGNO FARIĜIS MEMBRO DE LA ORGANIZO DE UNUAKLASAJ HOTELOJ DE LA MONDO

La unuan de julio la Organizo de Unuaklasaj Hoteloj de la Mondo akceptis kiel sian membron la hotelon Blanka Cigno de Kantono, Ĉinio. El ĉiuj hoteloj projektitaj, konstruitaj kaj administrataj de Ĉinio mem, ĝi estas la unua akceptita kiel membro de tiu internacia organizo.

La organizo fondiĝis en 1928 kaj ĝuas renomon internacie. Nun ĝi havas pli ol 190 altklasajn hotelojn kiel siajn membrojn.

## BICIKLADO TRA LA MONDO

La 10-an de aŭgusto Ĝang Ĝjanŝeng kaj Min Ŝugŭang, reporteraj de la Televido de Ĝeĝjang-provinco, Ĉinio, ekiris de Hangŝou por fari biciklan vojaĝon de ĉ. 50 000 km. tra la mondo. Ili direktas sin de oriento al okcidento tra Anhuj, Henan, Ŝenŝji, Gansu, Ĉinghaj kaj Ŝinĝjang de Ĉinio, poste laŭ la antikva Silka Vojo iros de Mingteke Daban de Ŝinĝjang al Pakistano,

kaj pli poste tra Omano, Unuiĝintaj Arabaj Emirejoj, Katario, Saŭdi-Arabio, Egiptio, Sanmarino, Italio, Svislando, Francio, Belgio, Britio kaj Usono, kaj fine tra Japanio revenos al Ĉinio. La vojaĝo daŭros du jarojn.

## KANADA BALET-AKADEMIO EN PEKINO

Invitite de la Internacia Kultura Interŝanĝa Centro de Ĉinio, la Vankuvera Goh-balet-akademio de Kanado turneis en Pekino en la mezo de aŭgusto. Ĝi faris artan interŝanĝon kun la Centra Baleta Trupo de Ĉinio kaj prezentis kune kun ĝi. Ili prezentis fragmentojn el la ĉinaj kaj fremdlandaj verkoj, kiaj "Songo en la Ruĝa Buduaro", "Diino de Lŭo-rivero", "La Korsaro" kaj "La Nuksorompilo".

## LA UNUA KODAKPOKALA SUB-16-JARA PIEDPILKA KONKURSO DE IPF

De la 31-a de julio ĝis la 11-a de aŭgusto okazis en Ĉinio la Unua Kodakpokala Sub-16-jara Piedpilka Mondkonkurso de IPF. Post

pli-ol-dektaga intensa konkurso la Niĝeria Piedpilka Teamo gajnis la ĉampionecon, tiu de FR Germanio — la subĉampionecon kaj tiuj de Brazilo kaj Gvineo — la trian kaj kvaran lokojn respektive.

Ĉe la ferma ceremonio, s-ro Joan Havelange, prezidanto de la Internacia Piedpilka Federacio (IPF), donis la cirkulan pokalon por disciplinaj rigardantoj en konkurso regiono al Ĉen Ŝitong, urbestro de Pekino, kaj la honoran pokalon de la konkurso al la Ĉina Piedpilka Asocio.

## LA PREPARA KOMITATO DE LA MONDA LUKTARTA FEDE- RACIO FONDITA EN ŜJIAN

La 26-an de aŭgusto okazis en Ŝjian la historia monda luktarta konferenco. La reprezentantoj el 16 landoj kaj regionoj aplaudis la fondiĝon de la prepara komitato de la Monda Luktarta Federacio. La komitato konsistas el reprezentantoj de Ĉinio, Italio, Japanio, Britio kaj Singapuro. Ĉina reprezentanto Ŝju Caj funkcias kiel ĝia prezidanto.

La kunvenantoj opiniis, ke la ĉina luktarto vaste populariĝas en la mondo kaj kiel orienta sporto-branĉo ĝi estas akceptita de multaj landoj kaj regionoj. Por pli vaste popularigi ĝin en la mondo, pli klare evidentiĝas la neceseco fondi mondan luktartan organizon.

Post la fino de la konferenco ĉinaj reprezentantoj kunvokis la unuan kunvenon de la prepara komitato kaj oni interkonsiliĝis pri la laboro en la venonta jaro.

*La ĉina teamo venkis la gvinean teamon per 2:1 en la Unua Kodakpokala Sub-16-jara Piedpilka Konkurso de IPF.*





# SAVU LA ARBAROJN

En la lastaj jaroj la arbaroj de la mondo suferis senĉesan perdon. La arbaroj malaperas ĉi-minute je 20 hektaroj. Laŭ statistiko de la Grena kaj Agrikultura Organizo de UN, ekde 1950, la arbaroj de la tuta mondo jam perdiĝis je duono (ĉefe en disvolviĝantaj landoj).

Por bridi la pluan malpliigon de arbaroj de la tero, en majo pasintjare, la Grena kaj Agrikultura Organizo de UN difinis 1985 la Internacia Arbara Jaro. En la lasta julio la 9-a Monda Forsta Kongreso okazigita en Meksikio oficiale anoncis la decidon, postulante ke en 1985 la membrolandoj alte taksu kaj protektu siajn arbarojn laŭ la vidpunktoj de la ŝtato kaj tuta mondo.

Arbaro estas bazo por garantii grenan produktadon. Protekti na-

turan ekologian ekvilibron kaj beligi medion estas tre grave por disvolvi grenan produkton. Sen arbara protektado, la agraro por vivteni la homaron daŭre malpliigos kaj dezertiĝos.

Statistiko montris, ke en Azio oni ĉiujare forhakas 8.5 milionojn da hektaroj da arbaroj ĉefe por akiri agraron kaj lignon. La senĉesa malpliigo de la arbaroj kaŭzis ĉiam pli seriozan inundon, sekegecon kaj sedimentan ŝtopiĝon de riveroj kaj akvorezervejoj. En Hindio, Pakistano kaj Bangladeŝo ĉiujare 500 milionoj da loĝantoj suferas inundon. En la pasintaj 30 jaroj la areo de la arbaro en Hindio malpliigis je 40%, tio kaŭzis inundon de la rivero Gango en pluva sezono. Sole en 1978 la perdo estigita de inundo superis 2 miliardojn da usonaj dolaroj, dekmiloj da vilaĝoj estis inunditaj, miloj da homoj

mortis, dekmiloj da bestoj estis englutitaj de inundo kaj grandkvanta agraro dezertiĝis.


Du trionoj de la malmolaj lignoj de la mondo produktiĝas en Filipinoj, Sumatro kaj Kalimantan de la sudorienta Azio. Pro la senbrida hakado, en 1990 eble ne plu ekzistos la arbaroj en la malalta regiono de Malajzio kaj Filipinoj. En la pasintaj 10 jaroj Tajlando perdis kvaronon de la arbaroj, sekve multaj bestoj perdis vivan medion. La arbara areo de Srilankao antaŭe konsistigis 70% de ĝia teritorio kaj nun malpli ol 23%. En la lastaj jaroj la areo de ĝiaj arbaroj malpliigis je 1% ĉiujare. La malpliigo de arbaroj ofte kaŭzis erozion, sedimentan

---

\* La aŭtoro estas funkciulo de la Ministerio de Forstumo de la Ĉina popola Respubliko.

*Praarbaro en Hejlongĝiang-provinco, Ĉinio*





*Cinaj sciencistoj esploras primitivan korean pinaron en la Malgranda Sing'an-montaro.*



*Detruita arbaro en Da'an-gubernio*

ŝtopiĝon de akvorezervejo kaj malsufiĉan provizadon de elektro. La arbara areo de Ĉinio konsistigis nur 12% de la tuta teritorio. La troa ekspluatado kaj seriozaj katastrofoj de fajro kaj fiinsektoj kaŭzis al la arbaroj seriozan perdon. En la insulo Hajnan la tropikaj arbaroj malpliigis de pli ol 860 000 hektaroj en la komenco de la kvindekaj jaroj al 240 000 hektaroj nun. En 1949 Ŝjiŝuangbanna havis pli ol 600 000 hektarojn da subtropikaj arbaroj, nun tie troviĝas nur pli ol 400 000 hektaroj. Iuj tipaj naturaj pejzaĝoj, vegetaĵaroj en malsamaj zonoj suferis detruadon malsamgrade.

En Afriko duono de la arbaroj estis forhakita kaj nun la arbaroj malaperas ĉiujare je 891 000 hektaroj. En la regiono sude de Saharo ĉiujare perdiĝas 2 025 000 hektaroj da arbaroj. Pro redukto de la arbaroj, Saharo grandiĝas tagon post tago. En Ĉadio la dezerto jam englutis 200 000 kvadratajn kilometrojn da tero. Estas pli serioza la stato en Maŭritanio. Ĝi havis kvinonan sendezertan teron en la komenco de la sesdekaj jaroj, sed nun nur 2%. 98% de la tuta lando jam dezertiĝis.

Statistiko montris, ke la afrikaj

landoj atakataj de dezerto pliiĝis de 16 ĝis 34. En la tuta Afriko 6 900 000 kvadrataj kilometroj da tero estas minacataj de dezerto. La malapero de la arbaroj en Afriko kaŭzis ne nur grandiĝon de dezerto, sed ankaŭ malboniĝon de la ekologia medio.

Nuntempe, sekegeco minacas pli ol 30 afrikajn landojn, 150 milionoj da loĝantoj alfrontas malsaton kaj morton. Etiopio antaŭe havis multajn arbarojn, kaj eĉ en 1940 ĝia arbara areo superis pli ol 40% de la tuta teritorio. En 1981 analizo laŭ fotoj faritaj de artefarita satelito montris, ke ĝiaj arbaroj kovris nur 3.1% de ĝia teritorio. La malgrandiĝo de arbaroj estas la ĉefa kaŭzo de serioza katastrofo de Etiopio.

Malaperis du trionoj de la arbaroj en Latin-Ameriko. Duono de la kontinento Sud-Ameriko antaŭe estis kovrita de arbaroj, kiuj konsistigis 24% de la arbara areo de la mondo. Sed la arbaroj malaperas ĉiujare je 40 000 kvadrataj kilometroj. En Brazilo la stato estas pli serioza, 20% de la arbarzonoj en la baseno Amazono estis detruitaj kaj la tieaj arbaroj daŭre reduktiĝas je 5% ĉiujare. Nun restas nur kvinono de la arbaroj. En Kolombio an-

taŭe la arbaroj kovris pli ol duonon de la teritorio, sed en la pasintaj 10 jaroj la arbaroj malpliigis je 40%, kio estigis anormalan klimaton.

La varmetzonaj arbaroj en la meza kaj nordokcidenta partoj de Eŭropo suferas seriozan detruon de acida pluvo. En 1983 14% de la arbaroj en FR Germanio estis damaĝitaj, tiuj en 1984 atingis 50%. Rezulte de acida pluvo la okcidenta montregiono de Pollando perdis 100 000 hektarojn da arbaroj. Aŭstrio havas 3 690 000 hektarojn da arbaroj, kiuj konsistigas 44% de ĝia teritorio. Inter ili estas poluciitaj 400 000 hektaroj da arbaroj, tiu nombro duobliĝis kompare kun tiu de la pasintaj jaroj. Svisio havas milionon da hektaroj da arbaroj, kies 14% estas malsamgrade poluciitaj de acida pluvo, 4% proksimiĝas al morto, sekve de tio ofte okazas tie inundo kaj lavango.

Savi arbarojn jam fariĝis problemo de la tuta mondo. Por bridi la malpliĝon de arbaroj la Grena kaj Agrikultura Organizo de UN alvokas ke en la arbara jaro ĉiuj landoj plantu arbojn kiel eble plej multe, fortigu la internacian kunlaboron tiusfere kaj malpermesu senbridan hakadon.



# LA SCIENCA ELDONA CENTRO DE UEA EN BUDAPEŝTO

de D-ro HASZPRA OTTO\* (Hungario)

## Novaj tendencoj por la faka aplikado de Esperanto

Karakteriza fenomeno de la lasta jardeko estas la akceliĝinta disvolviĝo de la scienca kaj teknika aplikado de Esperanto. Tio estas spertebla kaj ene kaj ekstere de la Esperanto-movado.

Enkadre de la movado aperis kaj plioftiĝis la sciencaj konferencoj kaj kreskas la nombro de tiuj esperantistoj, inter ili junuloj, kiuj serioze interesiĝas pri la aplikebleco de la lingvo por fakaj celoj. Disvolviĝas la terminologia agado, riĉiĝas la vortaro de la diversaj fakoj. Pliserioziĝas la enhavo de la esperantlingvaj sciencaj periodaĵoj kaj ankaŭ la ĝenerala esperantista gazetararo komencis aperigi scienco- kaj tekniko-rilatajn artikolojn, aldonaĵojn. Jam ankaŭ multaj landaj asocioj starigis komisionon aŭ komisiis respondeculon pri la zorgado de la scienca kaj teknika aplikado de Esperanto.

Nova kaj tre grava fenomeno de la lastaj jaroj estas, ke ankaŭ en neesperantistaj sciencaj rondoj oni pli kaj pli serioze traktas la lingvan problemon de la internaciaj sciencaj kaj teknikaj kontaktoj, kaj en reputaciaj (eĉ mondlingvaj) fakperiodaĵoj aperas opinioj laŭ kiuj Esperanto signifas la plej bonan solvon.

Estas jam internaciaj sciencaj organizaĵoj kiuj decidis apliki Esperanton kiel laborlingvon en siaj internaciaj konferencoj kaj aperigas la konferenc-materialojn parte esperantlingve.

La rekonon de Esperanto signifas ankaŭ tio, ke kelkloke neesperantistaj entreprenoj emas pagi por aperigo de siaj reklamoj en la Esperanta gazetararo kaj esperantlingvaj fakeldonaĵoj.

## Fondo de SEC

Rekoninte la gravecon de tiuj tendencoj por la estonteco de la Esperanto-movado, ankaŭ la Esperanto-movado, ankaŭ la estraro de UEA decidis fari paŝojn helpantajn la sciencan aplikadon de

la lingvo. La ideo pri eldonado de sciencaj libroj lanĉiĝis jam en la Universala Kongreso en Varna en 1978, sed konkreta paŝo okazis nur en aprilo de 1981, kiam la estraroj de la Hungara Esperanto-Asocio kaj de UEA subskribis kontrakton pri la fondo de la Scienca Eldona Centro (SEC) de UEA kun sidloko en Budapeŝto, enkadre de HEA. La tasko de SEC estas publikigo de sciencaj materialoj surbaze de memstara mastrumado. Por la starto UEA donis financon bazon kaj kompostilon.

Pro la nesufiĉaj financaj fontoj SEC komence dungis nur duontempe laborantan sekretarion. Nuntempe du personoj konsistigas la salajratan stabon.

Tamen krom ili konsiderinda nombro da eksteraj aktivuloj kontribuas al la laboro de SEC kaj enlande kaj eksterlande. Estas speciale menciinda la Terminologia Sekcio de SEC/TeS/, kiu momente havas nur nesalajratajn aktivulojn.

## Ĝisnuna agado de SEC

En la unuaj du jaroj SEC ne aperis kun produktaĵoj en la merkato, ĉar la preparlaboroj konsumis la malgrandan disponeblan energion. Tio — iom rajte — kaŭzis dubojn en la estraro de UEA, ĉu SEC estos vivkapabla.

Tamen en la tria jaro (1983) fakte aperis la unua eldonaĵo de SEC:

### 1. Sciencaj Komunikaĵoj (1982).

Kiel konate, la "Sciencaj Komunikaĵoj" estis ĉiujara aldonaĵo de la "Budapeŝta Informilo" kaj aperis en kvin kajeroj: 1975-1979, redaktitaj de Prof. Haszpra. Ekde nun SEC akceptis la taskon redakti kaj aperigi tiun periodaĵon.

\* La aŭtoro estas honorofica gvidanto de la Scienca Eldona Centro de UEA.

En la kvara jaro (1984) fakte aperis jam kvar eldonaĵoj:

2. Geologio Internacia, Vol. 5,
3. Radioteknika Artikolaro,
4. Dudich: Ĉu vi konas la Teron?
5. Arnaudov: Amuza matematiko por geler-  
nantoj.

Tiuj kvar eldonaĵoj jam komencas montri la spektron de la agado de SEC. La "Geologio Internacia" servas sciencistojn. La "Radioteknika Artikolaro" servas teknikajn fakulojn. "Ĉu vi konas la Teron" servas por inteligenta nefaka legantaro. La "Amuza matematiko" servas por la junularo ankoraŭ lernanta en mezlernejoj. Kompreneble la tri lastaj certe estas interesa legaĵo ankaŭ por fakuloj (geologoj), elektroinĝenieroj, fizikistoj, matematikistoj, parte simple pro la lingvo, parte pro la metodo de prezentado, kiu estas utiligebla interalie en ilia instrua praktiko.

Komence de la kuranta jaro (marto, 1985) jam estas aperintaj du propraj eldonaĵoj kaj unu por kiu SEC-kunlaboris. Estas realisma espero, se ĉio iros glate, ke SEC aperigos ĉ. dek eldonaĵojn dum la jaro 1985 kaj eble komence de la sekva jaro:

- 6-9. Sciencaj Komunikaĵoj (unu kajero jam aperis),
10. Perkomputila tekstoprilaboro (studoj),
11. Nyilasi: Molekuloj (jam aperis),
12. Gál: Kompendio pri organika kemio,
13. Manlibro de la medioprotekta edukado,
14. Novak-Špicka: Ĉapitroj pri sindefendologio,
15. Polgár Zs.: Ŝak-kombinaĵoj; mato en 2 aŭ 3 movoj.

El tiuj libroj n-roj 6-10 donas vastan spektron de sciencaj ĝis popularsciencaj kaj teknikaj artikoloj. N-roj 11-13 prezentas universitatnivelaĵojn lernolibrojn pri certaj sciencobranĉoj. N-roj 14-15 apartenas al sportaj temoj, sed laŭ fake altnivela prezentmaniero.

La redakcio de SEC, krom aperigo de siaj propraj eldonaĵoj, donas fakspertan helpon por sciencaj, popularsciencaj kaj teknikaj organizaĵoj. Dum 1984 ĝi kontribuis kaj en 1985 ĝi kontribuos per redakta, reklamvarba laboro al la aperigo de du periodaĵoj:

— La Mevo (ornitologia periodaĵo),

— Internacia Komputado (Komputteknika informilo, kies unu kajero jam aperis).

La diagramo 2 montras la disvolviĝon de la supreskizita eldona agado laŭ jaroj.

Krom la agado, kiu prezentiĝis aŭ proksimes-  
tonte prezentiĝos rekte en formo de eldonaĵoj, SEC de tago al tago kontaktas fakulojn, ricevas, reviziigas, prijuĝigas manuskriptojn, kaj tiujn manuskriptojn kiuj pro diversaj kaŭzoj (manko de merkato, nekontentiga kunmeto, tamen valoraj detaloj) ne estas aperigeblaj, ĝi konservas en sia manuskriptaro, kaj je peto pretigas kserografi-  
aĵojn por interesitaj fakuloj. De tempo al tempo ĝi publikigas la liston de la disponeblaj manuskriptoj.

Dum la kvar jaroj de sia ekzistado SEC ankaŭ iniciatis aŭ konsile helpis diversajn internaciajn fakkonferencojn, ja el ties laboro povas rezultigi ankaŭ eldonindajn manuskriptojn.

Koncerne la Terminologian Sekcion de SEC, la laboro estas ĉefe informa kaj organiza, ke la multaj fakvortarfarantoj en la mondo estu informitaj unu pri alia kaj ilia laboro estu pli ekonomia, pli unueca. TeS volas doni rekomendojn pri la sekvindaj manieroj de la terminologia-vortarista laboro. Certe tiu agado rezultigos ankaŭ fakvortarojn.

### Eldona politiko de SEC

Kvankam pro parta manko de taŭgaj manuskriptoj la ĝis nun efektivigita laboro ne montras klare, tamen SEC klopodas sekvi bone konceptitan eldonpolitikon, laŭ la plej urĝaj bezonoj de la esperantistaj fakuloj kaj laŭ la bezonoj de la disvolviĝo de la lingvo mem.

SEC intencas disvolvi sian eldonagadon pri la sekvaj tipoj de eldonaĵoj:

1. Popularsciencaj (aŭ scienco-popularigaj) verkoj pri natursciencoj kaj tekniko por inteligenta, sed pri la koncerna fako ne specialisto, ekz. junularo, aŭ alifaka legantaro.

2. Universitatnivelaĵoj lernolibroj pri bazaj natursciencoj (matematiko, fiziko, kemio, biologio kaj ties branĉoj kaj subbranĉoj) por studentoj de la unuaj du studjaroj de natursciencaj kaj teknikaj fakultatoj.

3. Periodaĵoj de scienca kaj popularscienca, ĝenerala kaj specialigita karakteroj por aperigo de natursciencaj kaj teknikaj artikoloj.



4. Altnivelaj natursciencaj kaj teknikaj verkoj pri speciaj temoj por iom malvasta legantaro.

### Financa bazo de SEC

Estas evidente, ke la legantaro de esperantlingvaj sciencaj eldonaĵoj estas ankoraŭ tre limigita. Samtempe tiu legantaro ne apartenas al la plej riĉaj tavoloj de la socio. Sekve oni ne povas atendi ke tolereblaj vendoprezoj estu sufiĉaj por kovri la kostojn de la eldonado. Ŝajnas, ke ekzistas nur unu solvo: Aperigi kiel eble multajn reklamojn en la eldonaĵoj de SEC, ke tio kovru la diferencon inter la efektivaj kostoj kaj la prezo. Eĉ kelkaj eldonaĵoj, kiuj altiras multajn reklamojn, fakte povas subvencii tiujn eldonaĵojn, kiuj — kvankam gravaj — ne altiras ankoraŭ la reklamantojn.

Ĝis nun la akirado de la pagitaj reklamoj sukcesis, sed la reklamojn mendis preskaŭ ekskluzive nur hungaraj entreprenoj. Tio ne povas daŭri longe. Estas absolute necese, ke la esperantistaro varbu reklamantojn kaj mecenatojn ankaŭ en aliaj landoj. Se tio eblis en Hungario, la samo eblos ankaŭ en aliaj landoj. Samtempe kompreneble la aĉetado de la eldonaĵoj ne estas neglektabla parto de la ekonomia ekvilibro.

### Konkludo

SEC faras pioniran laboron, absolute necesan por la evoluigo kaj disvastigo de Esperanto. Por



sukcesigi tiun laboron, ĝi bezonas verkantojn kaj konsilantojn (reviziantojn, kritikantojn, proponfarantojn) unuparte, kaj aĉetantojn, reklamantojn, mecenatojn aliparte. Do SEC bezonas la helpon de ĉiuj esperantistoj kiuj aŭ estas interesitaj pri la scienca aplikado de Esperanto, aŭ simple komprenas la gravecon de la scienca-faka aplikado en nia moderna mondo.

## HUMURAĴOJ

### POVON ANKAŬ SUPER VI!

Sekretario venis al la hejmo de la fabrikestro. Aperis ĉe la pordo knabineto kun demando: “Kiun vi volas?” “Nian fabrikestron.” “Mia patro forestas, sed mia patrino estas hejme.” “Ni ne obeas vian patrinon.” “Sed mia patro obeas ŝin,” diris la knabineto kun granda seriozeco.

### RIDINDA FLEGISTINO

Flegistino haste enkuris kaj ŝkue vekis malsanulon.

“Kion vi volas?” demandis la malsanulo kun dormemaj okuloj

“Mi forgesis doni al vi dormigilon.”

### VETO

A: De nun mi ne plu fumos.

B: Mi ne kredas.

A: Ĉu ni vetu?

B: Je kio?

A: Je skatolo da cigaredoj.

### BONA ESTAS KOLORBLINDECO

S-ro Gŭo estas lerta flatemulo. Foje li babilis kun sia estro, kiu diris kun veo, ke li estas kolorblindulo. Kaj Gŭo tuj konsolis lin:

“Bona estas kolorblindeco, ke vi jam ne bezonas aĉeti kolorar. televidilon.”

### AMUZKUNVENO DE E-ISTOJ DE PEKINO KAJ TJANĜIN

Antaŭtagmeze de la 21-a de julio 1985 la teatra grupo de la Pekina Esperanto-Asocio okazigis amuzkunvenon kune kun e-istoj de Tjanĝin. En la kunveno ili prezentis 3 unuaktajn dramojn "Anal-fabeto", "Lotusfloro" kaj "Verda Kortumo" (Songo de Kursgvidanto), ĉinajn kaj fremdlandajn kantojn ktp., el kiuj la dramo "Lotusfloro" kaj la humura dialogo "Aĉeti Avon" estis verkitaj kaj prezentitaj respektive de e-istoj de Tjanĝin kaj Pekino, kaj iuj kantoj, kiel "La Ronda Luno" kaj "Kanto de Bondeziroj", estis tradukitaj de e-istoj de la du lokoj. Apartan plezuron oni donis al la spektantoj

### LA ŜENJANG-A ESPERANTO-ASOCIO FONDITA

La 24-an de julio 1985 fondiĝis la Ŝenjang-a Esperanto-Asocio. Pli ol 200 personoj ĉeestis la fondkunvenon kaj respondecoj de rilataj organizaĵoj de Ljaŭning kaj Ŝenjang faris paroladon en la kunveno.

Ŝenjang estas la ĉefurbo de Ljaŭning-provinco kaj la plej granda urbo en nordorienta Ĉinio. La fondiĝo de la asocio akcelos la disvolviĝon de la Esperanta movado en tiu regiono. Pri la fondiĝo raportis la televidaj stacioj kaj la radiostacioj de Ljaŭning kaj Ŝenjang, "Ŝenjang-a Ĵurnalo" kaj "Scienca kaj Teknika Ĵurnalo de Ŝenjang".

Ma Ĉiŭfan kaj Ĝeng Bangĝjun estis elektitaj kiel honoraj prezidantoj de la asocio, Ŝjaŭ Janfang kiel ĝia prezidanto, Ju Ĉinĝi, Ŝjang Ĉjŭanŝen kaj Li Jing kiel ĝiaj vicprezidantoj, Ĉaŭ Ĉenghŭa kiel ĝia ĝenerala sekretario, Ljaŭ Ĝongĉi kiel ĝia vicĝenerala sekretario kaj Ĝang Ĝjaŝeng kiel ĝia konsilanto.

### LA 98-A DATREVENO DE LA APERO DE "UNUA LIBRO" FESTATA

La 14-a de julio de la kuranta jaro estis la 98-a datreveno de la apero de "Unua Libro". La Esperanto-Asocio de la Ŝenjang-a Metalurgia-Maŝina Kolegio kaj la redakcio de la Esperanta gazeto "Norda Stelo" kune okazigis memorkunvenon kun pli ol 60 ĉeestantoj.

*Esperantistoj de Ŝenjang, kiuj ĉeestas la memorkunvenon*



*Ĉirkaŭ 500 esperantistoj kun rubandoj kaj flagoj kunvenas sur la placo Zamenhof en Belo Horizonte, unu el la plej grandaj urboj en Brazilo*



### LA 21-A BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

En la 17-a ĝis la 21-a de julio okazis en Belo Horizonte la 21-a Brazilia Kongreso de Esperanto. En ĝi partoprenis 608 personoj el 18 brazilaj ŝtatoj kaj unu el Usono. Ĝi estas unu el la plej grandaj naciaj E-kongresoj en Brazilo kun la grandega atento de amaskomunikiloj al la evento. Antaŭ la malfermo okazis la gazetara



intervjuo, en kiu partoprenis pluraj TV-, radio-stacioj kaj ĵurnaloj.

### E-PROGRAMO EN LOKA RADIOSTACIO DE ITALIO

Ekde la 2-a de septembro, loka itala radiostacio "Radio International, str. P. Palio 36-37100 Verona, Italio", ekelsendis dekminutan Esperantlingvan programon dufoje semajne: Lunde kaj ĵaŭde je la 22.30 (1621 kHz kaj M.F. 100.5 kaj 100.8). Verona E-Grupo invitas ĉiujn aŭskultontojn skribi foje al tiu radiostacio por kuraĝigi la novan elsendon.

### ESPERANTO INSTRUATA EN MALTA LICEO

La 12-an de marto 1985 kun afabla permeso de la lernejestro s-ro John Testa fondiĝis en liceo Vassalli de Malto la Klubo Tutmonda Amikeco, kies celo estas amikiĝi la maltajn geknabojn kun la homaro pere de Esperanto. La gvidanto de la klubo estas s-ro Anthony Mercieca, kiu instruas la Internacian Lingvon al la lernantoj

dum la tagmeza paŭzo ĉiutage. La klubo estas malfermita al ĉiuj, kiuj interesiĝas pri amikeco tra la tuta mondo. La lernantoj deziras kores-

pondi tutmonde. Ĉi-rilate ilin helpas ilia instruisto s-ro Anthony Mercieca, kies adreso estas 20 Valletta Road, Qormi, Malto.



*S-ro Anthony Mercieca kaj liaj lernantoj*

### KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo:** 1 internacia respondkuponon por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

#### Korespondi Deziras

\* Grupo de gejunulaj kaj plenkreskulaj esperantistoj dez. kor. tutmonde pri naciaj kutimoj, folkloro ktp. Adreso: Pola Esperanto-Asocio, Urba Fako 63-600 Kepno, UL-Bronie-wskiego 5, Pollando.

\* Szocs Annamoria (13-j.), Str. Bradului, nr. 1, bc 1, Sc. B, ap. 14, et. 3, 4100, Miercurea-Ciuc, Harghita, Rumanio, dez. kor. kun amikoj el Hungario, Anglio kaj Rumanio.

\* Dum la 4-a kaj 5-a de aŭgusto 1986 okazos en Malago la Unua Renkontiĝo de Esperantistoj Feriantaj. Petu kompletajn informojn sendante du internaciajn respondkuponojn al: Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, Trinidad Grund, 28,2°, 29001-Malaga, Hispanio.

\* Junaj lernantoj de Esperanto-Grupo de Malago deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj. Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, Trinidad Grund, 28,2°, 29001-Malaga, Hispanio.

\* Mezaĝa komercantino dez. kor. tm. pri ĉt. precipe kuirarto, pk.

pm. Adreso: Irena Knysko, OS. XXX-Leue PRL 7/II/9, 57-300 Ktodzko, Pollando.

\* 25-j. studento vol. kor. tm. pri ĉt. Adreso: Cristobal Duran Castillo, Pedro Montt 2771, Valdivia, Ĉilio.

\* Esperanto-Fako "Geava Domo", strato Circumval-lacio 60, Manresa, Hispanio, deziras korespondi tutmonde kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kaj aĵojn.

\* 28-jara fraŭlo deziras korespondi tutmonde pri vojaĝado kaj diversaj temoj esperante, angle, ruse, hungare kaj rumane. S-ro Aleksandro Muzsnai, Of Pttir Tirgu-Mures 2, Rumanio.

\* S-ro Francisco Cabezas, Los Doscientos, 37-3°-izda, 03007 Alicante, Hispanio, dez. kor. tutmonde pri diversaj temoj, interŝanĝi poŝtmarkojn.

# Libreto Utila

de LOUISE MARIN (Francio)

## Tyburcjusz Tyblewski: **SKIZO PRI PERSONECO DE ESPE- RANTISTO.**

Varsovio 1985, "Ritmo", 67 p.,  
prezo 12 guldenoj.

Certe estos recenzoj de specia-  
listoj, kiuj parolos pri la scienc-  
velo de la skizo; kiuj atentigos pri  
la bonoj kaj mankoj laŭ vidpunkto  
de fakulo. Fakulo pri psikologio  
mi tute ne estas kaj mi komprenis  
kial la aŭtoro "reziĝnas pri pure  
teoria argumentado".

La valoron de tiu ĉi eseo mi  
sentas en tio, ke ĉi-foje "la fenome-  
non de la interreta komunikado  
oni ne bildigas per nombroj, sed

per ĝia psika efiko por la aplikan-  
toj". Jen la libro alirebla al "tiuj,  
kiuj mem spertis aŭ kapablas ima-  
gi". Esperantistino de preskaŭ 40  
jaroj, mi travivis per la internacia  
lingvo multon sperteban intelek-  
te, emocie. Post la unua atentema kaj  
longdaŭra legado mi konservas ĝin  
submane por mediti pli profunde.

Mi opinias la libreton utila an-  
kaŭ al tiuj, kiuj ekmarŝas sur la  
internacian trakon, kaj kiuj dank'  
al ĝi pli sekure, pli firme, eble pli  
rapide ol la antaŭaj generacioj tra-  
vivis disvolviĝon de sia personeco.

Ni nun eniras la duan jarcenton  
de esperantismo kaj tiu ĉi libreto  
certe donos al la nuntempaj geju-

nuloj "efektivan ŝancon por evo-  
luigi sian individuecon". Espere-  
ble ili ne perdos "multon el sia  
vivo antaŭ ol ili ekposedos sufi-  
ĉan orientiĝon kaj scion pri si mem  
— akorde kun siaj bezonoj".

La konciza scienc-nivela stilo de  
Tyburcjusz Tyblewski estas ĝuo,  
ĉar oni sentas lin spertulo pri la  
tempoj, sed neniam — jen la kon-  
duto de la vera sciencisto — li dro-  
nigas nin en la konoj kaj faktermi-  
noj. Li gvidas amike, invitante re-  
legi, kvazaŭ ankaŭ li nefacile atin-  
gus la internaciismon. La aŭtoro  
antaŭdiris la verkon antaŭ kelkaj  
jaroj/El la valo. Jelenia Gora  
1981/, bonŝance ĝi tamen aperis.  
Mi relegos ĝin, ankaŭ vi provu.

## Abonu "Akvo- kaj Grundokonservo de Ĉinio" por 1986

La ĉinlingva revuo raportas pri sciencoj  
kaj teknikoj de akvo- kaj grundokonservo de  
Ĉinio. Ĝi havas jenan enhavon: la principoj  
kaj politikoj pri akvo- kaj grundokonservo de  
Ĉinio; sciencaj kaj teknikaj fruktoj, progre-  
saj teknikoj kaj aktivadoj de Ĉinio kaj aliaj  
landoj pri akvo- kaj grundokonservo; kon-  
cernaj fundamentaj scioj; sperto pri raciaj  
ekspluatado kaj utiligado de naturaj riĉfon-  
toj de montregiono, preventado de akva kaj  
grunda perdiĝo, plibonigo de produktaj kon-  
diĉoj kaj starigo de ekologia agrikulturo. La  
revuo servas al la departementoj de akvo-  
kaj grundokonservo, akvoadministrado,  
agrikulturo, forstokulturo, brutobredado,  
akvo- kaj grundokonservaj laborantoj, laŭ-  
kontrakte specialigitaj familioj de plibonigo

de akvo- kaj grundokonservo, kaj koncernaj  
altlernejoj kaj sciencaj institutoj.

Monata revuo distribuata en kaj ekster  
Ĉinio kaj aperas en la 3-a ĉiumonate en la  
urbo Ĝengĝoŭ de Henan-provinco. Ĝia en-  
landa indeksa numero: 36-63. En Ĉinio oni  
abonu ĉe lokaj poŝtofojejoj. Prezo: 0.40  
jŭano por unu numero kaj 4.8 jŭanoj por  
unu jaro. Ĝia eksterlanda indeksa numero  
estas M 748. Ĝenerala distribuanto: Inter-  
nacia Libro-komerca Kompanio de Ĉinio  
(GUOJI SHUDIAN), P.O. Kesto 2820, Bei-  
jing, Ĉinio.

**LA REDAKCIO DE "AKVO- KAJ  
GRUNDOKONSERVO DE ĈINIO"**



## NOVE RICEVITAJ LIBROJ

**LA CENTA SIMIO** de Ken Keyes Jr. eldonita de la INTERNACIA ESPERANTO-INSTITUTO. Verko por averti la homojn, ke nuklea milito estas malutila por ĉiuj kaj oni devas ĝin preventi. Formato: 9.5 × 19.5 cm. 135 p. Prezo: 7.5 gld. plus sendokostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj.

**LA MONTO** originala romano de István Nemere, eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 15 × 21 cm. 166 p. Prezo: 16.10 gld.

**VORTOJ DE ANDREO CSEH** redaktita de Ed. Borsboom, eldonita de Societo Andreo Ĉe. Formato: 13.7 × 20.2 cm. 210 p. Prezo nemontrita.

**DISKRIMINACIO** prelegaro el la 65-a Universala Kongreso de Esperanto, eldonita de la Universala Esperanto-Asocio. Formato: 15 × 20.7 cm. 175 p. Prezo: 21.00 gld. plus sendokostoj.

**KOMPUTADA BAZA TERMINARO** kompilita de: Gerhard Kalckhoff k Antony C. Pick en kunla-

boro kun inĝ. Auguste Broise. Formato: 14.5 × 21 cm. 52 p. Prezo 9.8 G.M. Aĉetebla ĉe Alfred Schubert, Linguistisches Bureau Munchen, 195342-802, FR Germanio.

**NE NUR LETEROJ DE PLUMAMIKOJ** de Marjorie Boulton pri la Esperanta literaturo, eldonita de la Eldona Societo Esperanto. Formato: 14.3 × 19.7 cm. 63 p. Prezo nemontrita.

**SEP VANGOFRAPOJ** de Karoly Aszlanyi, esperantigita de Laszlo Somlai, dua eldono farita de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 14 × 20 cm. 148 p. Prezo: 15 gld.

**VARMEGA KAMPARO** romano de Zsigmond Móricz, tradukita el la hungara de István Nagy, eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 14 × 19.7 cm. 169 p. Prezo: 18 gld.

**SCIENCAJ KOMUNIKAĴOJ**, 1985 marto. redaktita de LUKACS Andras, eldonita de la Scienca Eldona Centro. Formato: 16.5 × 23.5 cm. 96 p. Prezo nemontrita.

**AKADEMIAJ STUDOJ** de 1985,

eldonita de Esperanto Press. Formato: 20.8 × 28.8 cm. 317 p. Prezo: 13.5 US. dolaroj. Triona rabato por 3 ekzempleroj, kvardek-procenta rabato por 10 ekzempleroj. Aĉetebla ĉe R. Eichholz, Bailieboro, Ontario, Kanado.

**SERIO DE 6 ESPERANTAJ ILPK** por propagando de Esperanto, eldonita de la Union Francaise pour l'Esperanto. Prezo nemontrita.

**INITIATION (THEORIQUE ET PRATIQUE A LA LANGUE INTERNATIONALE ESPERANTO)** de D-ro Pol Denoel, 6a reviziita eldono, de Sonorilo. Formato: 13.5 × 21 cm. 96 p. Prezo: 80 B fr. kun la kutima rabato.

**39 MODERNAJ POETOJ** Antologio de la postmilita bosnia-hercegovina poezio, esperantigita de Ladislav Rezek, eldonita de la Esperantoligo de Bosnio kaj Hercegovino. Formato: 14 × 19.7 cm. 110 p. Prezo: 10 gld.

**LA LASTAJ ESTAS LASTAJ** de Aldo Onorati, tradukita de Giuseppe Lacertosa. Formato: 15.5 × 21 cm. 96 p.

*(Daŭrigo de p. 17)*

polucio de gaso ellasita en trafiko estas tre serioza. La kvanto de nitrogen-oksidadaj kombinaĵoj en la aero ambaŭflanke de la ĉefaj trafikaj vojkruciĝoj tutjare superas la normon difinitan de la ŝtato. Laŭ statistiko, la proporcio de la trafikaj policanoj suferantaj spirkanalan malsanon estas pli granda ol tiu de hortikulturistoj suferantaj de la malsano je 10%. En la pasintaj jaroj oni intensigis la traktadon de malpura akvo, sed la polucio ankoraŭ estas pli serioza. 76% de la riveroj kun

longeco de 642 kilometroj trapasantaj la urbon kaj antaŭurbojn estas poluciitaj malsamgrade.

La media polucio multe suferigas la homaron, rezulte de tio la homaro konis la gravecon de la media protektado kaj ekologia ekvilibro. Ĉinio nun prenas la median protektadon kiel unu el la gravaj ŝtataj politikoj, fundamentan garantion de la moderniga konstruado kaj strategian taskon. Laŭ la postulo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, ke Pekino fariĝu urbo pura, bela kaj ekologie racia, la

Pekina magistrato decidis pluaŭpaŝe preventi kaj elimini polucion kaj ekologian detruon en la Sepa Kvinjara Plano komenciĝonta en 1986 por konstrui Pekinon en la unuaklasan urbon, kiu estos la plej pura kaj bela en la tuta lando, je la fino de la nuna jarcento.



# LA ENERGIO DE TIBETO


de SUN MINGĜEN

La energio de Tibeto estas mirinde abunda. Tie eble aperos la plej granda hidroelektrujo en la mondo. La rivero Jarlung Zangbo, trapasante la sudan Tibeton, abrupte sin direktas suden en la sudorienta Tibeto kaj faras U-forman kurbiĝon inter altaj montoj kaj profundaj valoj. La riverujo longa 220 km malleviĝis je

2 230 metroj. La rivero torentas malsupren kun pli ol 40 milionoj da kilovattoj da energio. La du ekstretoj de la U-forma kurbiĝo distancas unu de la alia nur 40 kilometrojn. Hidrologoj antaŭdiris, ke, se oni fosos tunelon inter la du ekstretoj, do la akvo falos rekte de la loko 2 200 metrojn alta, kio ebligos starigi grandegan


hidroelektrujon kun generatora kapacito de 40 milionoj da kilovattoj.

Tibeto, kiel trezorejo de energioj, estas riĉa je energioj akva, tervarma, suna kaj venta. Nun oni jam komencis utiligi tiean energion. Ĝis la fino de 1984, Tibeto jam havis 701 malgrandajn hidroelektrujojn kun genera-



*Ekspluatantoj de tervarmo*





*Nova sunenergia banejo*

Foto de ĈENG ŜJI


tora kapacito de 113 295 kilovattoj. Nun la sufiĉe granda parto de la loĝantoj, kiuj uzis olelampojn en la pasinta tempo, uzas elektrajn lampojn kaj parto de la urbanoj kaj iuj kamparanoj kaj paŝtistoj boligas akvon kaj preparas manĝon per elektro anstataŭ per bov-fekaĵo. Tie disvolviĝas ankaŭ industrio, scienc-esplorado kaj kultura afero kun pliiĝo de la elektro. Energio ludas pli kaj pli grandan rolon en plibonigo de la vivo de la tibetanoj kaj disvolviĝo de la tiea ekonomio kaj kulturo.

En Tibeto kun areo de 1 200 000 kvadrataj kilometroj interkruĉiĝas torentaj riveroj, al kiuj kontinue liveras abundan akvon la sennombraj glaĉeroj kaj neĝo sur la altaj montoj. La unua-paŝa kalkulo montris, ke en la

tibetaj riveroj latentas 200 milionoj da kilovattoj da natura akvo-energio, kiuj konsistigas 29.7% de la totala kapacito de energio en Ĉinio. Tamen, antaŭ la paca liberigo de Tibeto la torentaj riveroj vane fluis kaj la abunda akvoenergio ne estis utiligata. En la malnova Tibeto oni importis 125-ĉevalpovan generatoron el Britio kaj en 1928 ĉe Dŭodigoŭ apud Lhasa, la ĉefurbo de Tibeto, oni konstruis malgrandan hidroelektron kiu liveris elektron nur al la tiama monfarejo kaj malmultaj aristokrataj hejmoj. Tio estis rigardata kiel merito en la historio de la energi-utiligo de Tibeto. Tamen la elektron ne plu funkciis post 15 jaroj. En 1951, kiam la Ĉina Popola Liberiga Armeo atingis Lhasa, la tieaj loĝantoj lumigis siajn ĉambrojn

per olelampo kaj kandelo kiel antaŭe.

La paca liberigo en 1951 kaj la demokratia reformo en 1959 vekis la dormantajn naturajn riĉfontojn sur la monda tegmento kaj komencis doni sian lumon kaj varmon. En 1955 la Centra Popola Registaro de Ĉinio asignis monsumon kaj sendis teknikistojn helpi la tibetan lokan registaron en rekonstruado de la hidroelektron Dŭodi, kiu havis generatoran kapaciton de 660 kilovattoj egalan al 7 malnovaj elektronj Dŭodi, kaj komencis liveri elektron al Lhasa en la fino de la sekva jaro. Tiel ordinara loĝantoj de Lhasa unuafoje en la historio ekuzis elektran lampon. En la pasintaj pli ol 30 jaroj la ŝtato asignis grandan monsumon kaj nur en la lastaj dek jaroj ĝi asig-



*Parto de la tertermoelektrejo Jangbaĝjajn*

Foto de **ŜJŬE ĈAŬ**

nis 270 milionojn da jŭanoj (ĉ. 3 jŭanoj egalas unu usonan dolaron) por la tibeta elektra konstruado. En Lhasa, Lhoke, Sigaze kaj Ĉamdo oni konstruis hidroelektrejojn, ĉiu kun generatora kapacito de 3 000-6 000 kilovattoj, kiuj fundamente kovris la bezonon de la tieaj urbanoj, oficejoj, lernejoj, fabrikoj, minejoj kaj aliaj entreprenoj en la ĉiutaga vivo kaj produktado. Ekde 1965, kiam naskiĝis la Tibeta Aŭtonoma Regiono, helpate de la registaro la tieaj kamparanoj kaj paŝtistoj levis altan tajdon por konstrui elektrejojn. Ekde 1980 pli rapide disvolviĝas la vilaĝaj hidroelektrejoj kaj ĝis la fino de 1984 Tibeto jam havis 665 malgrandajn hidroelektrejojn kun generatora kapacito de 51 700 kilovattoj. Nun plejparto de la tibetaj gubernioj jam havas siajn

elektrejojn kaj la loĝantoj de pli ol 670 subdistriktoj, t.e. 33% de la subdistriktoj en Tibeto, ekuzis elektron. Kamparanoj kaj paŝtistoj de iuj lokoj per elektro pumpas akvon por irigacii kampojn, prilaboras agrokulturajn kaj brutajn produktaĵojn kaj funkcias vilaĝajn industriojn.

Nun oni tre aktive ekspluatas la akvofontojn kaj funkciigas hidroelektrejojn. Novaj hidroelektrejoj estas en streĉa konstruado kaj malnovaj ekspansiigataj. Estas decidite konstrui la hidroelektrejon Jangĝŭojonghu kun generatora kapacito de 120 000 kilovattoj kaj nun oni faras preparan laboron por ĝi. Tiu ĉi elektrejo post sia ekfunkcio donos sufiĉe da elektro al Lhasa.

La Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo estas la plej juna en la mondo.

La movado de ĝia geologia strukturo hodiaŭ ankoraŭ draste daŭras. Ardanta magmo fluas laŭ la fendoj de la terkrusto al ĝiaj malprofundaj tavoloj kaj faras varminterŝanĝon kun la subtera akvo, kio formas termofontojn kaj dotas Tibeton per abunda tervarmo. La rezervo de tervarmo en Tibeto okupas la unuan lokon inter la provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio. Nun oni jam trovis pli ol 600 tervarmajn indikpunktojn kun natura varmo-fluo de 0.69 miliono da grandaj kalorioj ĉiusekunde. Ĉiujare ili eligas varmon egalan al tiu de 3 milionoj da tunoj da norma karbo, alivorte, al tiu de 0.8 miliono da kilovattoj da elektro. Antaŭe la tibetanoj rigardis tervarman indikon kiel "dian fornon" kaj "dian fonton" kaj ne kuraĝis ĝin tuŝi. Ekde la mezo de la 70-aj jaroj la tiea tervarmo feliĉigas la homaron. Nun Tibeto estas avangarda en ekspluatado kaj utiligado de tervarmo kaj faras teknikan kunlaboron kun Italio kaj aliaj landoj tiuflanke.

La fama tervama kampo Jangbaĝjajn estas la plej frue ekspluatita en Tibeto. Ĝi, je 90 km. for de Lhasa, situas en malgranda baseno ĉirkaŭita de montoj. Antaŭe tie dissemiĝis termofontoj, bolantaj fontoj kaj unu stranga varma lago, kie de tempo al tempo okazis eksplodo de varma akvo. Tio rare videblis en aliaj lokoj. Gazsimila vaporo ŝvebis en aero kaj donis misteran impreson. En 1975 sciencistoj tien atingis kaj akiris unuapaŝan sukceson en eksperimento de elektroproduktado per tervarmo. Tuj poste, centoj da konstruantoj sin direktis tien kaj komencis konstrui termoelektrejojn la unuan en Ĉinio. Dank' al ilia penema laboro, la unua 1 000-kilovatta generatora kompleto estis muntita kaj



komencis produkti elektron en 1977 kaj poste oni muntis du 3 000-kilovattajn generatorajn kompletojn kaj starigis alttensian transsendan lineon inter Jangbaĝjajn kaj Lhasa. Komence de 1982 la tevarma elektrejo Jangbaĝjajn komencis liveri elektron al Lhasa kaj aŭguste de 1985 ekfunkciis la tria 3 000-kilovatta generatora kompleto. Nun la elektrejo kun generatora kapacito de 10 000 kilovattoj jam fariĝis la plej granda tevarma elektrejo en Ĉinio kaj unu el la elitaj elektrejoj en la elektra reto de Lhasa. En la lastaj jaroj ĝi liveris al

Lhasa pli ol 80 milionojn da kWh da elektro.

Post kiam sukcese ekfunkciis la tevarma elektrejo Jangbaĝjajn, en la printempo de 1984 komplete komenciĝis la ekspluatado de la tevarma kampo Langĝiŭ en la regiono Ali de la okcidenta Tibeto kaj nun oni boris 10 varmakvajn putojn. La unua 1 000-kilovatta generatora kompleto estis muntita kaj komencis produkti elektron en la fino de aŭgusto, 1985. Laŭ plano oni muntos tri 1 000-kilovattajn generatorakompletojn en Langĝiŭ, kiuj liveros elektron ĉefe al Sengkekabab,

la sidejo de la administrejo de la regiono Ali. Nun oni jam komencis bori la tevarman kampon en Jangjingŝjang je 30 km. for de Jangbaĝjajn kaj tiun proksime de la urbeto Nagĉju en la norda Tibeto kaj espereble, ke ili post nelonge estos uzataj por produkti elektron. Elektroproduktado per tevarmo en Tibeto jam montris ĝojigan aŭguron.

En Tibeto oni konstruas forcejon per tevarma energio por kulture legomojn, disvolvas sanitariajn kaj turismajn aferojn per termofontoj kaj planas prilabori brutoproduktaĵojn kaj manĝaĵojn

*Granda forcejo,  
kie oni produktas  
legomojn per ter-  
varmo*




Foto de ĜASI

per tia energio. Nun en Jangbajĝajn estas starigitaj tervarmaj forcejoj kun areo de pli ol 20 000 kvadrataj metroj. Tie tutjare verdas legomoj. Ĉiu kvadrata metro povas doni ĉ. 15 kg. da legomoj en la jaro. Sur la altebenaĵo pli ol 4 300 metrojn super la marnivelo antaŭe neniam kreskis legomoj, nun oni povas rikolti diversspecajn legomojn en ĉiu sezono kaj eĉ en la frostaj tagoj oni povas manĝi freŝajn kukumojn kaj tomatojn, tio estas vere bela ĝuo.

La Tibeta Altebenaĵo estas meznombro pli ol 4 000 metrojn super la marnivelo, tie la aero estas maldensa kaj la klimato seka, pro tio la sunlumo estas aparte forta. La sunenergio de Tibeto okupas la duan lokon en la mondo, nur post Saharo de Afriko. En pliparto de Tibeto la horoj de sunlumado atingas 2 500-3 400 kaj ĉiu kvadrata centimetro ricevas 150-200 grandajn kaloriojn da varmo ĉiujare. En Lhasa, la horoj de sunlumado atingas 3 005 ĉiujare kaj pro tio la urbo estas nomata "sunluma urbo". Frue en la 50-aj jaroj oficistoj kaj teknikistoj venintaj de la landinterno konstruis forcejojn uzante sunenergien por kulturi legomojn, tamen nur en malgranda skalo. En 1966, en Lhasa aperis la unua sunenergia banejo, kaj poste pro la kultura revolucio tiu afero ne estis disvastigita. De 1976 oni denove komencis la esploradon pri utiligo de sunenergio. La scienc-esploraj departementoj de la aŭtonoma regiono provfaris sunenergiajn akvoboligan aparaton, fornon, moveblan banejon kaj aliajn ekipaĵojn. En la lastaj jaroj oni enkondukis novajn teknikojn de la internaj partoj de nia lando kaj sukcesis konstrui plastmembran oranĝerion, sunenergio-hejtatan domon k.a., kie oni kulturas lego-

mojn per sunenergio. La loka registaro asignis pli ol 14 milionojn da ĵuanoj por utiligi sunenergien. Ankaŭ la ŝtata scienca komisiono kaj provincoj, municipoj de Ĉinio multe helpis al ĝi en teknologio, ekipaĵoj kaj homfortoj. En la fino de la lasta jaro en la tuta aŭtonoma regiono estis konstruitaj sunenergiaj forcejoj kaj plastmembranaj oranĝerioj kun areo de 115 000 kvadrataj metroj, pli ol 40 sunenergiaj banejoj, sunkolektiloj kun areo de pli ol 6 000 kvadrataj metroj, aro da sunenergie kolektaj domoj kun pli ol 5 000 kvadrataj metroj. La lokanoj fabrikis aŭ aĉetis 1 900 sunenergiajn fornojn, akvoboligajn aparatojn kaj bakujojn, kiuj jam estis disdonitaj al la loĝantoj de diversaj lokoj. Nun iuj familioj ekuzis ankaŭ sunenergiajn siliciajn pilojn. En Gjalakar-vilaĝo de Doilungdeĉjen-gubernio la 28 familioj ĉiu havas sunenergiajn fornon kaj akvoboligilon, 3 el ili transloĝiĝis en sunenergie hejtatajn domojn. En la vilaĝo konstruiĝis unu sunenergia banejo kaj unu sunenergia silicia pilaro. Nun ili boligas akvon kaj preparas manĝon per sunenergio anstataŭ per bovfekaĵo, kio tre favoras al la media protektado.

Tibeto estas ankaŭ ventriĉa. En la paŝta regiono de la norda Tibeto la furioza vento forportis sennombrajn bovojn, ŝafojn kaj tendojn, kaŭzante katastrofon al la loĝantoj. Hodiaŭ per modernaj scienco kaj tekniko oni transformas ĝin en movforton. Aprile de 1982 la Scienca Komisiono de Nagĉju enkondukis de la Interna Mongolio 2 000-kilovattan ventenergian generatoron kaj post ĝia sukcesa ekfunkcio oni enkondukis aron da tiaj maŝinoj. En 1984, helpate de la loka registaro, en tri loĝpunktoj de la norda Tibeto ĉiu familio muntis 100-vattan ventenergian generatoron por

lumigo, televidado kaj aŭskultado de radi-diktafono. Ĝis oktobro de 1984 la tuta aŭtonoma regiono havis pli ol 120 ventenergiajn generatorojn kun totala kapacito de 103 kilovattoj. Nun pli da grandpovaj generatoroj estas muntataj en diversaj lokoj de Tibeto kaj espereble ke ili superos 400 en la fino de 1985.

Krom akvo, tervarmo, sunenergio kaj ventenergio, oni prospektoris ankaŭ karbon, nafton kaj uranion en Tibeto. Ili malkovris aron da minejoj kaj certigis la geologian rezerv-kvanton. Nun tie estas konstruitaj kelke da karbominejoj kun jara produkto-kvanto de ĉ. 30 mil tunoj da karbo, kiuj liveras hejtaĵon al parto de la entreprenoj.

La energi-utiligado en Tibeto estas ĵus komencita, tamen jam montriĝas granda latentata forto kaj brila perspektivo. En la laborkunveno pri Tibeto okazigita de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, februare de 1984, la konstruado de energi-fonto estis metita en la unuan lokon de la ekonomia konstruado de Tibeto kaj klaraj postuloj kaj konkretaj rimedoj estas prezentitaj, t.e. antaŭ ĉio disvolvi hidroelektrejojn kaj samtempe elektrejojn hidroenergian, tervarman, sunenergian kaj ventan, plenenergie disvolvi la tiean energion, por ke en 2 000 la tuta regiono havu generatorojn kun totala kapacito de 500 000 kilovattoj, kaj iom post iom realigi la elektrizadon de la tuta Tibeto. Nun la energi-konstruado de Tibeto jam eniris en la prosperan periodon de sia vigla disvolviĝo kaj pli da novaj elektrejoj aperos sur la monda tegmento. Diversaj specoj de energio kunportos pli da feliĉo al la popoloj de Tibeto.






*Ventenergiaj generatoroj uzataj en paŝtista vilaĝo*

Foto de ĈAŜI

*En regadejo de hidroelektrejo*

Foto de JAN ĜIN





*Tervarmo ekspluatata en Tibeto*


Foto de **ŜJŬE ĈAŬ**



*Paŝtistoj konstruas ventenergian muelejon.*

Foto de **ĈEN ZONGLJE**





*La tervarmoelektrejo Jangbağajajin*

Foto de LIŬ LIĞJA



*Paŝtisto uzas sunenergian fornon.*

Foto de ŜJŬE ĈAŬ

de HŪANG ĜONG



*Draka danco*

*Unu el la drakoj sur la Naŭ-draka Muro en Bejhaj-parko*





*Laŭ peto de nia brazila leganto s-ro C.P. Castanho, ni aperigas jenan artikolon pri drako.*

### LA RED.

En Ĉinio cirkulas multaj legendoj pri drako, kaj ankaŭ estas popularaj aktivadoj pri drako, kiaj konkurso de drakboatoj, ludado de draklanternoj kaj drakdancoj. Inter la kortegaj kaj popolaj ornamaĵoj ofte vidiĝas figuroj de drako. Pro tio oni kutime nomas Ĉinion hejmlando de drako kaj posteulojn de la ĉina nacio idoj de drako. La drakoj en la ĉina antikva folkloro ne estis naturaj bestoj videblaj sur la terglobo, sed imagaj animaloj propraj al Ĉinio.

Ĝi plej frue aperis kiel totemo adorata de la ĉina klana tribo. En la primitiva socio ĝi estis priskribita kiel animalo kun homa kapo kaj serpenta korpo. En la jaro 1100 en iu literatura verko estis skribite, ke la kornoj de la drako similas al tiuj de cervo, la kapo al tiu de kamelo, la okuloj al tiuj de diablo (aŭ al tiuj de salikoko), la kolo al tiu de serpento, la skvamoj al tiuj de karpoo, la ungoj al tiuj de aglo, la piedoj al tiuj de tigro kaj la oreloj al tiuj de bovo. Poste, el la kortegaj kaj popolaj artaĵoj la plejparto de la drakfiguroj havis suprediritajn trajtojn. La diferenco inter ili estis: En la popolaj artaĵoj la drakfiguroj plejparte aspektis simple, naive kaj aminde, montrante la belan esperon de la laboruloj al la drakoj. Kaj en la kortegaj artaĵoj la drakfiguroj plejparte aspektis majeste, furioze kaj terure, montrante la dignon de imperia krono.

La drako, kiel adoraĵo de la primitiva socio, havis intiman rilaton kun la batalo de prahomoj kontraŭ la naturo. Tiam la dra-

ko, kiel simbolo de la supernatura forto, estis diigita figuro.

Tial ĝi ĉiam estis ligita kun herooj en folkloro. Ekzemple, ĉinaj legendoj diras, ke Fuŝji, la kreinto de la universo, Njuŭa, kiu faris homojn el argilo, Hŭangdi, kiu gvidis la popolon en venko super forta malamiko kaj kreado de materia kulturo, kaj Ŝennong,



*Imponeco de drako*


kiu lernigis kultivadon, ĉiuj havis homan vizaĝon kaj korpon drakan aŭ serpentan. En ĉina legendo Ju estis heroo pri superrego de inundo. Laŭdire, kiam Ju superregis la inundon, iu diodrako perforte bildigis riveron sur la tero por forfluigi la inundon. En la antikva Ĉinio la drako estis rigardata kiel senkompare forta diaĵo, kiu levis venton kaj donis pluvon. Tial, en multaj lokoj de Ĉinio troviĝis temploj de drakreĝo. Kiam oni estis atakataj de trosekeco aŭ inundo, ili venis preĝi en la temploj, kun peto, ke la drakreĝo donu al ili favoran veteron.

En la primitiva socio la drako estis komuna spirita riĉaĵo de la tuta socio. En la komenco de la sklava socio, kun naskiĝo de hereda sistemo de monarkio kaj

monopoligo de riĉaĵoj far la sklavoposedanta klaso, la drako fariĝis la prapatro de la familio de la plej alta reganto. En la feŭda socio la drako jam fariĝis simbolo de la plej supera aŭtoritato de imperiestro. La feŭda imperiestro pretendis, ke li estas la "Vera Drako — Filo de la Ĉielo". La ĉiutagaj bezonaĵoj de imperiestro

ĉiuj portis nomon koncerne al drako. Ekz., la imperiestra robo estis nomata "drakrobo", lia sidloko "draka sidloko", lia lito "draklito" ktp. La robo de imperiestro surhavis multe da broditaj drakoj, maksimume 192.

Cie en la ornamaĵoj de kortegaj konstruaĵoj vidiĝas drakfiguroj. Ekzemple, la halo Tajhe de la Imperiestra Palaco en Pekino estis loko, kie imperiestro okazigis grandan ceremonion por celebri sian surtroniĝon kaj gravajn festojn kaj publikigis siajn ediktojn al la tuta lando. En ĝia mezo estas lokita trono kun oraj drakoj, ambaŭflanke de la trono staras po ses grandaj kolonoj, ĉiu kun unu ĉirkaŭvolvinta drako. Ĉe la supra parto de la plafono estas la ligne gravurita drakego




*Draka sidkuseno*

ore lakita, kun perlo en la buŝo, kiu kun klinita kapo rigardas malsupren. La drakoj sur la kolonoj kaj plafono harmonias kun la trono. Sur la ekrano malantaŭ la trono estas gravuritaj flugantaj, rampantaj kaj sidantaj drakoj. Tra la tuta halo prezentiĝas grandioza spektaklo, ke multe da drakoj dancas ĝoje. Por montri sian suverenecon, imperiestro ordonis ornami per drakfiguroj ne nur la halon, kie li plenumis sian aŭtoritaton, sed ankaŭ la dormoĉambrojn de liaj edzinoj kaj im-

periestrajn ĝardenojn. En la parko Bejhaj proksima al la Imperiestra Palaco estas la Naŭdraka Muro fama en kaj ekster la lando. Sur la fronta kaj dorsa flankoj de la muro estas po naŭ naĝantaj drakoj kun malsamaj pozoj kaj en diversaj koloroj, kiuj saltas en ondanta maro, kio aspektas tre grandioza.

En Ĉinio oni emas personigi la drakon. En literaturaj verkoj estas diversaj drakfiguroj, el kiuj iuj kreas feliĉon por la popolo, aliaj portas malfeliĉon al ĝi.

En Jŭan-dinastio (1279-1368 p.K.) estis la teatro Ĝang Ju Boli-gas la Maron. Ĝi priskribas, ke instruitulo Ĝang Ju enamiĝis al filino de la drakreĝo de la maro kaj estis malhelpata de la drakreĝo. Poste Ĝang Ju havigis al si trezoraĵon kaj boligis la maron. Per tio li venkis la drakreĝon kaj sukcesis edziĝi al lia filino. La rakonto esprimas la aspiron de la popolo al bela afero kaj ĝian reziston kontraŭ malvirta forto kun drako kiel la reprezentanto.



*Kolonoj kun skulptita drako*



## Rakonto pri serpentvino

Tio okazis en iu drinkejo de urbeto de suda Ĉinio antaŭ centoj da jaroj:

Iutage, multaj klientoj venis en la drinkejon. Post nelonge elĉerpigis la vino. La mastro do sendis kelneron Li Bo al tenejo preni vinon.

Malfermiĝis la pordo. Hu! li ekkriis kaj tuj kuris returne. Li kriegis: "Helpu! Helpu!"

En la tenejo estis ĉ. 7 metrojn longa serpento. Ĝi volvis la voston ĉirkaŭ la trabo, etendis la kapon al vinvazo kaj trinkis la vinon. Aŭdinte la kriadon de Li Bo, oni tuj alkuris. Sed neniu kuraĝis eniri, vidante la serpenton. Post momento la serpento ebriiĝis kaj falis en la vazon. Li Bo rapide kovris la vazon kaj metis grandan ŝtonon sur la kovrilon. Poste, ĉiufoje, kiam Li prenis vinon, li staris ĉe la vazo por aŭdi, ĉu sono venas el ĝi aŭ ne.

Pasis du jaroj. El ĝi aŭdiĝis neniom da sono. Li pensis, ke la serpento certe mortis kaj estas neniom timinda. Li aliris al la vazo, demetis la kovrilon kaj trovis, ke la serpento vere mortis kaj la vino fariĝis ruĝa kiel sango. Tion sciinte, la mastro diris al li: "Forverŝu la vinon en libera tempo!"

En la urbeto estis kanajlo Liŭ,

kiu ofte venis al la drinkejo. Li lame iradis. Kiam ventis aŭ pluvvis, la talio kaj kruroj doloris al li tiel forte, ke li devis kuŝi en lito. Li neniam pagis por vino. Se la kelnero ne donis vinon al Liŭ, li do estis batata de la lasta; se la kelnero donis vinon al Liŭ, li do estis insultata de la mastro. Iutage Liŭ refoje venis trinki vinon. Ĉe tiu momento la kelnero ekpensis pri la vino en la vazo. Li do elprenis bovlon da vino kaj proponis ĝin al Liŭ. La lasta demandis: "Kia vino ĝi estas? Kial mi neniam ĝin vidis?" Li respondis: "Ĝi estas la plej bona vino, kiun oni ne povas aĉeti en alia loko." Transpreninte la vinon, Liŭ ĝin flaris, dirante: "Ja bonodoras!" Liŭ eltrinkis ĝin per unu tiro. Li ankoraŭ volis trinki, tamen, liaj vortoj ankoraŭ ne finiĝis, kiam li falis sur la teron. Pensante, ke Liŭ mortis de toksigo, Li Bo tuj trenis lin en sian ĉambron kaj intencis trakti la aferon en la nokto.

Nokte, enirinte la ĉambron, Li Bo eklumigis la lampon kaj vidis, ke Liŭ sin turnis supren kaj sidiĝis kun vortoj en la buŝo: "Bona vino, bonega!" Sekve li stariĝis kaj eliris el la ĉambro. Li iris facile kaj ne lame. Post du tagoj, sub pluvado Liŭ refoje venis kaj petis la vinon. Li Bo demandis al li: "Vi ne povas iri en pluva

tago, kial vi povas atingi ĉi tien?" Liŭ respondis: "Trinkinte vian vinon, mi sentas min multe pli bone kaj ne doloras al mi la talio kaj kruroj dum pluva tago. Donu al mi ankoraŭ iom da vino." Li Bo donis al li duonbovlon da vino. Trinkinte li ankoraŭ petis. Sed la kelnero ne volis plu doni al li kaj diris: "Elĉerpите jam." Vidante lin eliri, Li Bo pensis en si, ke kredeble tia vino povas kuraci malsanon.

Ankaŭ la patro de Li Bo suferis de talia kaj krura doloro kaj kuŝis senmove en lito ĉiutage. Lia hejmo estis malriĉa kaj ne havis monon por kuraci. Li Bo do kunportis kelkajn botelojn da serpentvino al sia patro. Trinkinte la unuan botelon da vino, la patro jam povis leviĝi; post kiam li trinkis la duan botelon, la talio kaj kruroj neniom doloris al li. Li trinkis aliajn botelojn da vino, la korpo rektiĝis kaj li eĉ povis labori en kampo. Poste Li Bo donis tian vinon al malriĉuloj, kiuj suferis de talia kaj krura doloro. Trinkinte la vinon, ili ĉiuj resaniĝis. Tion sciinte, la mastro malpermesis al Li Bo senpage doni la vinon al aliaj kaj diris, ke li vendu la vinon en tre alta prezo.

De tiam la serpentvino estas uzata kiel ĉina medicinaĵo kaj servas al malsanuloj.

# 第十八课 Dekoka Leciono

## 问住址

### *Demandi pri Adreso*

#### Ofte uzataj vortoj

您家住在那儿  
我家住在百万庄路  
二十四号  
欢迎您来  
我住在北京饭店  
您住在几层  
我住在十二层  
您住多少号房间  
我住在1208号

您的电话号码呢  
我的电话是  
668451

nínjiā zhù zài nǎr  
wǒjiā zhù zài Bǎiwànzhūāng-  
lù èrshísì hào  
huānyíng nín lái  
wǒ zhù zài Běijīng Fàndiàn  
nín zhù zài jǐcéng  
wǒ zhù zài shíèr céng  
nín zhù duōshǎo hào fángjiān  
wǒ zhù zài yīqiān èrbǎi líng  
bā hào  
nín de diànhuà hàomǎ ne  
wǒ de diànhuà shì liù liù bā  
sì wǔ yī

kie estas via hejmo  
mia hejmo estas en n-ro 24,  
Baj'uangūang-strato  
mi bonvenigas vin al mia hejmo  
mi loĝas en la Pekina Hotelo  
en kiu etaĝo vi loĝas  
mi loĝas en la dekdua etaĝo  
kiu estas via ĉambro-numero  
mia ĉambro-numero estas 1208  
kiu estas via telefon-numero  
mia telefon-numero estas  
668451

#### Dialogo

- A: 王先生, 您家住在哪儿?  
A: Wáng xiānsheng, nínjiā zhù zài nǎr?  
Ŭang sinjor-, vi hejm- troviĝ- en kie  
A: Kie estas via hejmo, sinjoro Ŭang?  
B: 我家住在百万庄路二十四号。欢迎您来。  
B: Wǒjiā zhù zài Bǎiwànzhūāng-lù èrshísì hào. Huānyíng nín lái.  
mi hejm- est- en Baj'uangūang-strat- 24 numer- Bonven- vi ven-  
B: Mia hejmo estas en n-ro 24, Baj'uangūang-strato. Mi bonvenigas vin al mia hejmo.  
A: 谢谢。我住在北京饭店。  
A: Xièxie, wǒ zhù zài Běijīng Fàndiàn.  
dank-, mi loĝ- en Pekin- Hotel-  
A: Dankon. Mi loĝas en la Pekina Hotelo.  
B: 您住在几层?  
B: Nín zhù zài jǐcéng?  
vi loĝ- en kiu etaĝ-  
B: En kiu etaĝo vi loĝas?  
A: 我住在十二层。  
A: Wǒ zhù zài shíèr céng.  
mi loĝ- en dekdu- etaĝ-  
A: Mi loĝas en la dekdua etaĝo.  
B: 您住在多少号房间?  
B: Nín zhù zài duōshǎo hào fángjiān?  
vi loĝ- en kiu numer- ĉamb-  
B: Kiu estas via ĉambro-numero?  
A: 我住在1208号。  
A: Wǒ zhù zài yīqiān èrbǎi líng bā hào.  
mi loĝ- en 1208 numer-  
A: Mia ĉambro-numero estas 1208.  
B: 您的电话号码呢?  
B: Nín de diànhuà hàomǎ ne?  
vi telefon- numer- ĉu  
B: Kiu estas via telefon-numero?  
A: 892518  
A: Bājiǔ èr wǔ yī bā.  
892518.  
A: 892518.

#### Klarigoj:

- 我家住在百万庄路二十四号: La strukturo: "verbo + 在 + vorto signifanta ejon montras lokon, kie estas iu aŭ io.
- 您的电话号码呢: "呢" ĉe la fino de la frazo estas demanda vorto.





## FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

1. *Stonmonumentoj antaŭ 4 000 jaroj*  
de **BOLLA ERNEST** (Francio)
2. *La monto Norikura*  
de **FUSACUGU KIDO** (Japanio)





21527

始射儂人鍊玉砂丹光暗貫洞中霞  
無端半夜東風起吹飲江南第一花

甲申九秋擬己人筆 意 步 顏而龍

